


evangeliaj kajeroj

LA BIBLIO



1

1987

el
kie
fontas
nia
fido

EVANGELIAJ KAJEROJ

internacia revuo en Esperanto

listo de la planataj sekvantaj numeroj

- 2 EKOLOGIO, kiel ni admistras la teron
- 3 LA SPIRITA VIVO, Ne mi mem sed Kristo vivas en mi
- 4 KOMUNIKADO
- 5 LA REGNO DE DIO, ĝia veno, kiam? kiel?
- 6 ARKEOLOGIO, radikoj de la historio

Ni daŭre serĉas kunlaborantojn. Se vi deziras kunlabori, vi povas peti instrukciojn. La Artikoloj estas petataj, sed vi povas libere sendi Kontribuaĵojn, Recenzojn, Noticojn.

Eldonisto, revuo, lernejo, organizo, estas en la revuo sufiĉe da liberaj spacoj por via reklamo. Tiu sistemo helpas kaj vin, kaj nin. petu por nia propono.

Redakcio, administracio : Philippe Cousson, Le Hameau des Plais, Nouaillé-Maupertuis, 86340 La Villedieu du Clain, Francujo, tel : 49 46 80 21, el eksterlando 33 - 49 46 80 21.

Directeur de la publication : M. Philippe Cousson.

Dépôt légal : Avril 1987.

Imprimé par : Ets Michel Brun, 12 rue des Frères Lumière, Beaulieu, BP 252, 86006 Poitiers Cedex.

EVANGELIAJ KAJEROJ

Vu nun havas en la mano novan revuon en Esperanto. Ĝi estas la rezulto el leteroj, personaj kontaktoj, tajpado, atendado, espero.

En Esperantujo, tia literaturo ne tre oftas. EVANGELIAJ KAJEROJ celas plenigi vakuon, siaskale.

Se finfine ĝi aperas, tion permesis nia Dio, kaj mi volas danki al Li. Ankaŭ al la aŭtoroj, al la verbantoj, al la amikoj.

Vi povas konstati, ke la diverseco de la aŭtoroj, se ne maksimuma, estas tamen granda, de evangelika presbitero al remonstranta pastoro, de romkatolika monaĥino al juda israelano. Ili volas lasi al vi siajn studojn, siajn pensojn, siajn travivaĵojn, siajn konvinkojn.

En tiu unua numero, ni parolis al vi pri la libro, kiun ni kunhavas, el kie ni ĉerpas nian vivmotivon, nian vivon mem, pri la Biblio. Ni esperas, ke poste vi aliros al la Biblio, se ne por la unua fojo, almenaŭ kun novaj okuloj, serĉante tion, kion oni povas trovi, ricevi tie.

Kunlaboris en la verkado de la artikoloj :

D-ro Rudolf HORSKÝ (*horski*) naskiĝis en 1914. Li estas emerita profesoro de la Hus-fakultato en Praha (Prago). Dum kelkaj jaroj, li estis dekano de ĉi tiu teologia fakultato, kaj ankaŭ episkopo de la Ĉeĥoslovaka Husana Eklezio en Ostrava. Li laboras kiel pastoro (laboranta pensiulo) en religia komunumo de la Ĉ. H. E. en Praha-Spořilov (*sporfjilov*).

Alain Georges MARTIN (*martē*), D-ro pri teologio, naskiĝinta en 1933, edziĝinto kun tri infanoj, pastoro de la Reformita Eklezio de Francujo, nun en Nîmes (*nîm*, en suda Francujo), lekciisto en la teologiaj fakultatoj de Aix-en-Provence kaj Montpellier (*eksaprovās, mōpelje*).

KUNLABORINTOJ

Adolf BURKHARDT, naskiĝinta en 1929, studis teologion, sociologion kaj la anglan lingvon 1951-1957 en Usono kaj en la universitatoj de Tübingen kaj Bonn. En 1957 ordinita kiel pastoro de la Evangelia-luterana Eklezio de Württemberg. Deĵoras kiel paroĥa pastoro. Plurajn semajnojn ĉiujare simultana interpretisto en teologiaj konferencoj. Edzino kaj 3 gefiloj ankaŭ parolas Esperanton. Prezidanto de KELI 1961-1975 kaj de 1981.

Theotima ROTTHAUS, naskiĝis en 1937 en Gladbeck/Vestfalio. Studis teologion kaj matematikon en la universitato de Münster/Vestfalio. En 1960, ŝi fariĝis benediktanino en la monaĥejo St. Lioba en Freiburg/Breisgau (*Freiburg*). Poste ŝi studis en la pedagogia universitato en Freiburg. Ŝi nun instruas en Messkirch religion kaj matematikon. Eklernis Esperanton en 1981. Sendas ĉiunonate biblioteleon en Esperanto. Tio estas plano por ĉiutaga biblio-legado.

Gerrit BERVELING (*Berit*), naskiĝinta en 1944, fakulo pri klasika filologio latina kaj helena, teologo, esperantisto depost 1972. Pastoro en la Remonstranta Eklezio. Nacilingve verkas poezion kaj etaskale pri teologiaj aferoj. En Esperanto eldonisto de "Voĉoj Kristanaj". Kunlaboras en "Dia Regno", "Monato", "Fonto", k.a.

Jeremi GISHRON (*gišron*) naskiĝis en Svedujo en 1948 kaj elmigris al Israelo en 1972. Li studis ekonomion, geografion kaj religion en la universitatoj de Stockholm, Uppsala, Jerusalema kaj Lund. Li doktoriĝis pri Religiaj trajtoj en Esperanto. Li nun studas en Juda Ortodoksa Seminario en Jerusalemo. Li Esperantistis en 1975, fondis Esperanto-centron en 1984, kaj daŭrigis kun Eldonejo Sivron.

David FEATHERSTONE (*deĵvid feðestoŭn*), reĝa stipendiulo de Westminster School, London, licenciulo pri teologio en la universitato de Oxford (*oksf*, Oksfordo), kolegia kaj universitata lekciisto, nun emerita, laboris en Hindujo kiel Bibli-societa sekretario dum kvin jaroj, kaj poste instruis en Anglujo. Li estas presbitero en sia evangelika eklezio en suda London, kaj Fratulo de la Esperanto Asocio de Britujo.

John-Frederic TWILLEY (*tŭile*), naskita en 1914, edukita en kristana etoso, fariĝis dungito en komerco. Tiam li komencis prediki kaj studis per korespondado en Wolsey Hall, Oxford ĝis licencio, fariĝis pastro en London kaj apud Bournemouth. Depost 1964, li senpage dissendas ĉiusemajnan predikon.

Thomas NEIL, naskita en 1928, konvertiĝis kaj baptiĝis kiel junulo, aliĝis al la Baptista Eklezio en Skotlando, kie li servis i.a. kiel diakono. Diplomit de la universitato de Glasgow (*glasgou*, Glasgovo) pri matematiko kaj klasika greka literaturo, li lekcias pri matematiko. Lerninte Esperanton en 1949, li estas nun kasisto de la brita sekcio de K.E.L.I.

BEDEGI Győző (*djözö*), hungaro, naskiĝis en 1948. Laŭ bapto romkatoliko, li interesiĝis pri marksismo-leninismo, sed baldaŭ li turnis sin al diversaj religioj, inter kiuj li pli speciale esploras branĉon de budhismo, *theravada*, pri kiu li jam publikigis. Li estis i.a. asekuraganto, direktoro de vojaĝoficejo.

Leif NORDENSTORM, naskiĝis en 1960, diplomiĝis pri rusa lingvo kaj teologio en la universitato en Uppsala, laboris en la sveda ambasadejo en Moskva. Nun li estas pastoro en Boden, norda Svedujo. Li redaktas Kontakton.

David J. LAMB (*deĵvid lemb*) naskiĝis en 1949 en Colchester, la plej malnova urbo en Britujo. Li estis membro de anglikana eklezio, konvertiĝis kaj aliĝis al reformita baptista eklezio. Li laboris kiel instruisto pri muziko. De 1975 li estas instruisto en speciala lernejo per profunde mense handikapuloj. Li edziĝis en 1985.

EVANGELIAJ KAJEROJ

JAN HUS KAJ LA BIBLIO

Tra la tuta Bohemia regiono estas dissemataj statuoj de Majstro Jan Hus (Johano Hus), martiro en Konstanz (Konstanco). Oni povas trovi ilin en grandaj urboj, same kiel en vilaĝoj. Ili montras la fakton, ke la ĉefoj vere amas ĉi tiun reformaciiston, ŝtiparumitan la 6-an de julio 1415. La plimulto de la statuoj montras ĉi tiun grandan ĉefon kun la Biblio en la mano. Kial? Ĉar oni simple ne povas imagi al si la vivon kaj la verkon de Hus sen Biblio. Sen la Sankta Skribo ne povus komenci la ĉefa - aŭ kiel oni hodiaŭ diras - la unua Reformacio, kies komenco estas datita unu jarcenton antaŭ la Reformacio tutmonda. La menciita unua Reformacio trovis sian komencon dank'al la Biblio.

Lerta kaj sperta predikisto en Betleĥema kapelo kaj rektoro de la Praga universitato, Jan Hus (naskita en 1479) deklaris, ke la Biblio estas la unusola fonto de religia kaj morala ekkonoj, same kiel la unusola juĝisto en la kristana kredo-konfeso. Ĝuste pro tio li ekstaris kontraŭ ĝenerale valida opinio, ke nur la Eklezio, en la frunto kun la Papo kaj la episkoparo rajtas deklari kaj ekspliki la kristanan doktrinon. Hus kontraŭstaris, li rifuzis ĉiun homan aŭtoritaton, li ribelis kontraŭ la papa escepteco. Precipe neinda papo ne devus reprezenti la tutan Eklezion. Kiel la plej alta aŭtoritato en la Eklezio devas esti levita la Vorto de Dio en la Biblio. Ĉiu kristano rajtas mem meditati super la Sankta Skribo kaj rajtas por si konservi la liberecon de konscienco. Pro ĉi tiu sia konvinko, li devis pagi per martira morto en flamoj.

Al sia amiko Křišťan (*krjištjan*) el Prachatice (*praĥatice*) li skribis pri la Biblio:

"Ĝi estas mia fundamento kaj mia nutrigo, kiu fortigas mian spiriton, por ke mi trovu necesan forton kontraŭ ĉiuj malamikoj de la vero."

Hus profunde enamiĝis al la Biblio, kiu tute ŝanĝis lian vivon. Dum sia juneco, li sopiris al nobla kaj komforta vivo, tamen post bona ekkono de la Biblia mesaĝo, li fariĝis tute alia homo. La Biblion li tenis en la manoj kaj en la koro kiel fundamenton kaj fonton de la Dia vero kaj kun ĝi, li gvidis sian malfacilan lukton kontraŭ reprezentantoj de tiamaj mondo kaj Eklezio. Hus malfermadis la Biblion ĉiam kun preĝo kaj kun arda peto al la Sankta Spirito. Poste, li ĉiam travivis benitajn horojn, dum kiuj li ekkonis veran rekonon de spirita forto el la Dia alparolo. Ĉi tie komenciĝis korpura vekigverko de Hus en la Eklezio. Dank'al la ĉiutaga diligenta studado de la Biblio, kreskis Hus al modela

servanto de Dio, vera sacerdoto kaj atestanto de Kristo en Bohemio. Hodiaŭ oni povas supozi, ke ĉiu pastro kreskas sur la Biblio, sed la grandeco de Hus baziĝas en tio, ke li kuraĝis montri pli bonan vivon de eklezio en la epoko, kiam oni starigis la eklezian doktrinon super tiu de la Biblio. Estis vera graco de la Sankta Spirito, ke entuziasma vorto de predikisto ekflamis la korojn de multaj kredantaj homoj. Desur la predikejo Hus provis alproksimigi la kristanan mesaĝon eĉ al la plej simplaj homoj. La homamasoj sopiris al nova, pli pura vivo en la Eklezio. Hus bone rekonis, kiel profunda estas la diferenco inter biblia kaj reala bildoj de la Dia popolo. Inter la vivo de la unuaj kristanoj kaj tiuj de la samtempuloj malfermiĝis vera abismo. Li en la propraj spertoj devis jesi al la Sankta Skribo, kie oni ja legas (Heb 4:12-13) :

"La Vorto de Dio estas viva kaj energia, kaj pli akra ol ĉiu glavo dutranĉa, kaj penetranta ĝis divido de la animo kaj spirito, kaj de artikoj kaj medolo, kaj kritikanta la pensojn kaj celojn de la koro. Kaj ne ekzistas kreitaĵo kaŝita antaŭ Lia vidado ; sed ĉio estas nuda kaj evidenta al la okuloj de Tiu, al kiu nia afero rilatas."

La Vorto de Dio vere havas sian potencon kaj efikon pro sia interna forto, influanta per la Sankta Spirito. Sed la biblia vorto penetras en la menson kaj koron de homo, ĝi povas kaŭzi totalan ŝanĝon de la vivo. Kun la Vorto de Dio en la koro sentas la homo sian gravan respondecon por siaj agoj kaj vivo. La Dia Vorto fariĝas mezurilo por la tuta dumviva orientiĝo. Same roliĝis ĉe Hus. La vereco de la Dia Vorto vokis lin al ĉiam nova klopodo, obei ĉi tiun Vorton. Liaj admonoj celis al ekleziuloj same kiel al laikoj. En sia verko "Ekspliko de la kredo" li skribas :

"Fidela kristano, serĉu la veron, aŭskultu la veron, lernu la veron, amu la veron, diru la veron, tenu la veron kaj defendu la veron ĝis la morto, ĉar la vero liberigos vin de la diablo, sekve de la spirita morto kaj fine de la morto eterna."

Hus bone komprenis la superan nivelon pri la vero de Kristo. Ĝi baziĝas ne nur en racia jesado, sed en la tuta dumviva stilo. La veron oni devas travivi. Tia estis la konvinko de Hus. Laŭ la Dia vero li vivis kaj tiel fariĝis bela ekzemplo por siaj samtempuloj, same kiel por estontaj generacioj. La ekzemplo de Hus iniciatis surbaze de la Dia Vorto potencon hysanan movadon. Ĝiaj plej gravaj branĉoj estis Tabor-anoj, kaj poste ĉefaj fratoj. Oni povas diri, ke ĉio, kio estis kristaneca dum la tempo de Hus en Bohemio, kreskis el la Dia Vorto kaj laŭ la ekzemplo de Hus. Oferemo por la noblaj idealoj de vero, mora pureco kaj justeco, egaleco kaj

libereco, alportis por la tuta popolo ĝeneralan plialtigon kaj progreson. Ĉi tie komencas ankaŭ disvolvo de scienco kaj klereco. La nacio ne plu celas al nuraj materiaj havaĵoj. Hus estis laŭbiblie gvidata por lukti favore al premitaj malriĉuloj. Ili prezentis la plimulton de la mezepoka socio kaj estis ekspluatataj per profanaj kaj ekleziaj suverenoj. Kun la Biblio en la manoj kaj en la koro, komencis la granda ĉefa reformaciisto fortan proteston kontraŭ misuzo de papa kaj sacerdota potenco. En sia verko "Pri la Eklezio" li skribas :

"Kiu kontraŭstaras erarirantan papon, tiu povas sekvi Kriston."

Hus ne staris ĝenerale kontraŭ la aŭtoritato de la Papo, sed instruis, ke necesa supozo de ĉi tiu aŭtoritato estas senkondiĉa obeo al Kristo. Se la Papo kaj la Eklezia hierarkio ordonas ion kontraŭ la Dia volo, oni ne devas plenumi la ordonon. Nur tiam, estas la Papo kaj la kardinaloj sekvantaj apostolojn, se ili instruas kaj agas laŭ la vortoj de la Biblio. Vera kapo de la tuta Eklezio estas Kristo, pri kiu atestas la Sankta Skribo. Ĝian vorton devas ĉiu kristano akcepti serioze, ĝin li devas diligente legi kaj en ĝi serĉi konsilon.

Sindonemo al la Dia Vorto en la Biblio provizis al Hus internan forton en lia sufero, eĉ dum liaj lastaj paŝoj al la ŝtiparo. Ĝi pliriĉigis lin per supereco antaŭ la tribunalo en Konstanz. La juĝantaro respondis al la defendaj vortoj de Hus per kriado kaj ofendoj. Neniu antaŭ Hus metis tiel akcenton al la Biblio. La tiama Eklezio ne ŝatis vidi nacilingvajn bibliajn tekstojn. Eĉ alte edukita viro Jean Gerson (*ĵā ĵersō*), propranome Jean Charlier (*ĵā ŝarlje*), nomita *doctor christianissimus* (tre kristana doktoro), asertis komence de la 15-a jarcento, ke bibliaj tradukoj delogas simplajn homojn al neobeco de samtempaj aŭtoritatoj. Kia eraro ! Malgraŭ tiuj kontraŭdiroj aperis ĉiam pli da nacilingvaj tradukoj kaj la Biblio iom post iom trovis la ĝustan lokon en la Eklezio. La Biblio ne plu estis escepte legata nur de pastroj. Eĉ simplaj homoj komencis kompreni, ke la savon oni povas atingi nur per kredo al Kristo (Agoj 4:12) kaj per respekto al la Biblio (Joh 5:39). Legi la Skribon kaj prediki, prezentas laŭ Hus la bazan devon de ĉiu pastro. En sia libro "Pri kvin devoj de sacerdoto" substrekas la aŭtoro devon laŭvere prediki la Evangelion, senĉese preĝi, senpage servi per sakramentoj, studi la Biblion kaj doni al la popolo bonan ekzemplon per la tuta vivo.

Kiam la Papo ordonis ne prediki la Dian Vorton en la kapeloj (tio estis intenca paŝo kontraŭ Hus), tiam la reformaciisto brave

defendis sin kaj revokis sin al la Sankta Skribo kaj al Kristo, kiu diris :

"Iru en la tutan mondon kaj prediku la Evangelion al ĉiu kreitaĵo. Kiu kredos kaj estos baptita, tiu estos savita ; sed kiu ne kredos, tiu estos kondamnita." (Mk 16:15-16)

En sia "Postila" aldonas Hus :

"Kristo ordonis prediki ĉie. Mi estas fidela kristano kaj volas obei Lin. Pro tio, mi ne ĉesos prediki ĝis mia morto kaj ne sekvos la malpermeson. Mi ne rajtas plenumi kontraŭdiajn ordonojn."

Jesuo Kristo, pri kiu atestas la Biblio, estis do por Hus la plej alta aŭtoritato kaj la lasta juĝisto en la aferoj de la kredo. Ĉi tiu substreko kreas la plej signifan karakteron de la ĉeĥa kaj poste ĝenerala Reformacio. Laŭ la ĉeestantaj atestantoj vokis Hus al Kristo eĉ en la lastaj momentoj de sia vivo sur la ekflamanta ŝtiparo :

"Gracoplena Sinjoro Jesuo Kristo, mi estas preta humile kaj pacience mortsuferi pro via Sankta Skribo kaj pro la prediko de via Vorto."

Nelonge antaŭ la morto, li skribis al sia disĉiplo, Majstro Martin el Volyně (*volinje*) :

"Ne timu morti por Kristo, se vi kun Kristo volas vivi. Li diras : Ne timu tiujn, kiuj mortigas la korpon, sed ne povas mortigi la animon."

En sia traktato "Pri simonio" esprimas sin Hus :

"Estu fidelaj al Kristo ! Vi ne povas trovi pli bonan gvidanton kaj majstron. Ni sekvu Lin, obeu Lin, en Li ni fortigu niajn kredon, esperon kaj amon, same kiel bonajn agojn. Nure kaj sole Kristo prezentas la pordon, per kiu ni povas paŝi al la Dia graco hodiaŭ kaj al la vivo eterna spite de la morto."

Studante la Biblion kaj sekvante Kriston, Hus neniam forgesis la samtempajn problemojn. Male, li ĉiam reale vidis la disfalantan feŭdan societaton, la disharmonion inter riĉuloj kaj senhavaj homoj. Observante la maljustecon, ĉu en la Eklezio, ĉu en la ŝtato, li ne silentis kiel aliaj, sed kritikis kaj montris la vojon al la forigo de malordoj. La reprezentantoj de la samepoka eklezio ne volis aŭdi la alvokon de Hus. Li estis nedezirata por ili, ĉar lia personeco minacis iliajn privilegiojn kaj materiajn interesojn. Pro tio li devis esti forigita, spite de ĉio.

Tamen, la respekto al la personeco de Hus kreskis, kiam la koncilio en Konstanz ricevis protestan folion de Bohemiaj kaj Moraviaj nobeloj kun 452 subskriboj. La Karola universitato en

Prago, la 23-an de majo, en sia deklaro skribas, ke Hus estis viro de sankta vivo, kies pureco estis neelparolebla. Baldaŭ ekestis forta husana movado, postulanta reĝustigon kaj bonmorigon de la tuta Eklezio laŭ la Dia Vorto kaj laŭ la modelo de la unuaj kristanoj. Kontraŭ tio oficiala koncilio postulas tujan perfortan rompon de la ĉeĥa ribelo. Kontraŭ ribeloj estis aranĝitaj kruc-kavaliraj militiroj. Sed ni konas la rezulton. La husanoj sub la gvido de Žižka (*ĵiĵka*) kaj poste sub Prokop la Granda venkis la soldatan plimulton dank'al la braveco kaj la entuziasmo.

Kion fari ? Perfidema reĝo Siegmund (*zigmund*, Sigismondo) prudente komencis intertraktadi sur la diplomata kampo. Oni publikigas poste traktaton ("*compactata*"). Siegmund komencas regi kaj la potenculoj klopodas forviŝi la husanan movadon de la ĉeĥa historio. Ili ne sukcesis. Ili fiaskis malgraŭ kruela kontraŭ-reformacio. Vivoplenaj ideoj de Hus jam havis bonajn radikojn kaj fariĝis realaj en la popolo. Ili eĉ hodiaŭ estas aktualaj. La novaj reformitaj eklezioj daŭrigas en la postlasataj doktrino kaj ekzemplo de Hus. La Eklezio, kiu estas trapenetrita per biblia mesaĝo, fariĝas firma kaj fidela al Dio en Kristo. La Dia vero, kiu elradias el la personeco de Hus, ne velkas. Ĉiam validas, ke la respekto al la Sankta Skribo kaj al la fido al Jesuo Kristo kreas fundamenton de nia savo. Ni do amu la Biblion same kiel Hus. Ni legu kaj studu ĝin diligente kaj tiel formigu nian kredon. Ĝi ja montras Kriston, kiu estas la sama hieraŭ, hodiaŭ, kaj ĝis eterneco (Heb 13:8). Ĉiam validas la promeso :

"Kiu trovas sian vivon, tiu ĝin perdos ; kaj kiu perdos sian vivon por mi, tiu ĝin trovos." (Mat 10:39)

Rudolf Horský, Ĉeĥoslovakujo



ESPERANTISTA LIGO en la Ekumeno

KELI ★ DIA REGNO

Kristana Esperantista Ligo Internacia
Fondita en 1911

Neneŭtrala ligo, kunlaboranta kun U.E.A.
Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.

Prez.: A. Burkhardt, Ev. Pfarramt, D-7311 Bissingen/Teck, Fed. Resp. Germanujo.

Sekr.: E. van Dijk-Kuperus, Koningsmantel 4, 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando. Tel. 01720-20222.

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto minimume 25 ned.gld. Membro-subtenanto 37,50 ned.gld. Membro de IKUE 12,50 ned.gld.

Monsendoj al poŝta ĝirkonto n-ro 5506132 de Kristana Esperantista Ligo Internacia KELI, van Hogendorplaan 4, 3135 CF Vlaardingen (Nederlando).

Dia Regno

Oficiala organo de KELI
Fond. 1908

Redaktoro: J. van Keulen, v. Beethovensingel 91A, 3131ED Vlaardingen, Nederlando. Tel. 010-4351198.

Abonprezo, sen membreco en KELI: 21 ned.gld. aŭ egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kaso de KELI, vidu supre.

Ekspedo de Dia Regno, membrolisto de KELI: L. Hordijk, van Hogendorplaan 4, 3135 CD Vlaardingen, Nederlando.

Esperanto-Misio

Box 7, Östansjö · 694 02 HALLSBERG 2 · Svedujo

EVANGELIAJ KAJEROJ

LA REFORMACIISTOJ KAJ LA STATUSO DE LA BIBLIO

La reformaciistoj ne inventis la Biblion. Ilia intenco eĉ ne estis meti la Biblion en la unua rango; ili ne defendis ties aŭtoritaton, sed tiun de Dio. Ili jesis la liberecon de Dio kontraŭ la homan aŭtoritaton. Pli precize, ili asertas, ke Dio rivelas sin per la Sankta Spirito en la Sanktaj Skriboj.

La aŭtoritato de la Biblio neniam estis neita antaŭ la reformaciistoj, sed en la dekseca jarcento, oni bezonis reveni al la fonto de la kristana fido pro pluraj kaŭzoj:

1. spiritala bezono retrovi la aŭtentikecon de la fido kaŝita malantaŭ la komplikeco de la eklezia organizaĵo, kiu estis sentata kiel baro inter la kredanto kaj Kristo, kerno de la fido.
2. intelekta bezono retrovi la fontojn de la kulturo; la venkopreno de Konstantinopolo per la turkoj alkondukis multe da bizancaj kleruloj kaj manuskriptoj al la okcidento. Oni ne plu kontentiĝis de la nuraj latinaj tekstoj, sed oni interesiĝis pri malnovaj orientaj lingvoj.

Oni devas ankaŭ noti, ke la intereso pri la Biblio faciligis pro la ekonomia kaj teknika progreso. Presarto malpliiĝis la koston de la biblioj kaj pliiĝis ilian disdonon. Sed ĉi-tiu disdono estis ankoraŭ limigita, kaj oni ne devas imagi, ke ĉiu kristano havis sian biblion: la individua posedo de unu biblio estis ebla nur de la komenco de la deknaŭa jarcento pro tipografia progreso. En la dekseca jarcento, la biblia legado restis komunuma; oni devis ope kuniĝi ĉirkaŭ unika biblio: tial la nocio pri loka Eklezio estis tre grava en la dekseca jarcento, malsame ol en la mezepoka Eklezio, kiam la Biblio ne estis novaĵo, ĝi estas ĉiam konata; sed la novaĵo estis, ke oni volis koni kaj legi ĝin senpere, sen la perantoj kiuj antaŭe gardis kaj transsendis la mesaĝon de la rara libro.

Ĉi tiu retroa movo al la Biblio ĉiam ekzistis en la kristanismo. Sed en la dekseca jarcento, ĉi tiu movo koincidis kun teknika progreso kiu permesis plian disdonon.

Sed kia Biblio?

La reformaciistoj remetis malnovan demandon pri la limo kaj la teksto.

La kanono: pri la Malnova Testamento, la reformaciistoj revenis al la hebrea kanono, kontraŭ la okcidenta kaj orienta tradicio de la greka kanono. La greka Biblio (Septuaginto) estis la Biblio de la praa Eklezio. La Septuaginto havas librojn, kiuj

LA REFORMACIISTOJ KAJ LA STATUSO DE LA BIBLIO

ne estas ricevitaĵoj de judismo ; ili estas kontestataj de Hieronymus (*hieronymus*, Hieronimo), la tradukinto de la latina Biblio (la Vulgato). Reveninte al la hebrea Biblio, la reformaciistoj volis montri, ke la Biblio ne estis la kreaĵo de la Eklezio sed, ke la Eklezio, ricevinte la Biblion, lokiĝas post kaj sub la Biblio.

La biblia kanono estis akceptita de la okcidenta kaj orienta Eklezioj per tradicio, sen oficiala decido. La unuaj, la reformaciistoj fiksas kanonon de la Sanktaj Skriboj : ni povas legi ĝin ekzemple en la Kredokonfeso de La Rochelle (*la roŝel*, Roĉelo), reformita kredokonfeso, en la tria artikolo (*Dia Regno*, 1972, 3, p. 1574).

La reformaciistoj limigis la Skribon, sed ankaŭ ili deziris pli bone starigi ĝian tekston ; en Okcidento, la Biblio estis konita nur per sia latina traduko, la Vulgato, farita de Hieronymus en la fino de la kvara jarcento. Tiu traduko, farita el la hebrea kaj la greka, estis entute bona kaj fidela. Sed ĝi estas tamen peraĵo. Oni volis reveni al la praa teksto. Post unuaj tradukoj el la latina, oni laboris el la hebrea kaj la greka. Plie oni komencis kompari la fontojn kaj la manuskriptojn. Oni starigis akceptitan tekston (*textus receptus*) por la Nova Testamento. Tiu estas la komenco de scienca laboro, kiu poste montriĝis nesufiĉa apud freŝdataj malkovroj, sed kiu, por la deksesa jarcento indikas volon plibone koni la biblian tekston. La reformaciistoj, kiuj havas grandan respekton por la Biblio, ne estas malserenaj pro tradukaj alternativoj aŭ manuskriptaj malsamecoj. Ofte oni legas en la bibliaj komentoj de la reformaciistoj, ke oni povas legi versiklon tiel aŭ tiel ĉi.

Samtempe kiam ili revenas al la praa teksto, la reformaciistoj volas doni ĉi tiun tekston en la parolatajn lingvojn. Ili tradukas aŭ tradukigas la Biblion. Oni konas la gravan laboron de Luther (Luter) en la germana. Li studis la hebrean kaj la grekan por doni la Biblion en la lingvon, kiun parolas :

"la patrino en la domo, la infanoj en la strato, la viro en la vendejo."

Sed la tasko estis malfacila.

"Ni laboris, kelkafoje dum kvar tagoj por apenaŭ traduki tri liniojn el la libro Ijob. Nun post la traduklaboro, la leganto ne rimarkas, kiaj blokoj kaj rokoj estis tie, kaj li promenas kiel sur bone rabotita tabulo tie, kie ni ŝvitis kaj penis por forpreni la kontraŭaĵojn."

EVANGELIAJ KAJEROJ

Ĉi tiuj tradukoj en la eŭropajn lingvojn estis tre gravaj, ne nur por la eklezioj kaj kristanoj, sed ankaŭ por la kulturo de la diversaj landoj. Ili fiksas klasikan kaj komunan lingvon, kaj estis la komenco de disvolviĝo de naciaj literaturoj, angla, germana, sed ankaŭ de mallarĝa kulturo kiel la kimra en kiun la traduko estis tre fidela al la hebrea.

Dum kelkaj jarcentoj la Biblio iĝis la unika libro legata de la popolo. Libro kie ĝi lernis legi, preĝi kaj ankaŭ libro fonto de kulturo kaj pripenso.

La reformaciistoj faris el la Biblio ankaŭ la plej lastan aŭtoritaton pri religio. Poste, ĝi prenis la lokon de la papa aŭtoritato. La Eklezio povas dividiĝi kaj multobliĝi en multaj nomindikoj (denominacioj) por inter si kvereli, la Biblio restis ĉiam ne diskutata kaj la sama por ĉiuj. Ĝi estis signo de unueco kaj komuneco inter diversaj kristanaj sentmanieroj. Tio estas tre okulfrapa en la angle-parolanta mondo.

Ĉiuj reformaciistoj jesas la aŭtoritaton de la Sankta Skribo pri fido. Sed ĉiu ĝin faras kun sia personeco. Tiel Luther, kiu opiniis, ke la tuta Biblio ne havas ĉie la saman gravecon. Tio estas la kanono. Li nomis la epistolon de Jakobo, epistolo de pajlo, ĉar ĝi diras, ke la fido ne povas ekzisti sen la faroj :

"Fido aparte de faroj estas malviva." (Jak 2:26)

Tiu parolas kontraŭ Paŭlo, kiu parolas pri fido sen faroj :

"Vi saviĝis per fido, ne per vi mem... ne el faroj."

(Efe 2:8)

Pro teologiaj kaŭzoj, Luther opiniis, ke ĉi tiu epistolo ne havis evangeliecan karakteron. Tio ne estas absoluta juĝo :

"Mi ne povis doni al ĝi lokon en la esencaj libroj, sed mi volas malebligi nenium ŝati ĝin laŭ sia plaĉo." (en la antaŭparolo de la germana Biblio)

La libro, kiun malpli ŝatis Luther estis Apokalipso. Kiel Calvin (*kalv*, Calvin), li neniam komentis ĝin. Luther mallaŭdis ĝin, ĉar ĝi estas ne klara, parolanta per vizioj : ĝi ne donas instruon kompreneblan de ĉiuj. Eĉ li opinias, ke ĝia aŭtoro estas nek apostolo nek profeto.

Kontraŭe Luther donas grandan gravecon en la Malnova Testamento al la Psalmoj, kiuj laŭ li, estas resumo de la tuto de la Biblio. Sed li kontraŭmetas Malnovan kaj Novan Testamentojn. Moseo estas ĉefe leĝodonanto, kiu postulas, minacas, frapas, kondamnas : li kreis la timon, dum la NT estas la mesaĝo de Kristo.

LA REFORMACIISTOJ KAJ LA STATUSO DE LA BIBLIO

Por Luther, la kerno de la Evangelio estas la graco, kiun Dio donas al ni per Jesuo Kristo. Tial estas inter la bibliaj libroj, kelkaj kiuj pli montras la gracon ol aliaj. Luther rezonas ne per jes aŭ ne, sed per pli aŭ malpli. En la NT Luther privilegias Johanon kaj la epistolojn de Paŭlo, kaj inter ĉi tiuj, tiujn al la Romanoj kaj al la Galatoj. Li preferis ankaŭ la unuan de Petro.

Kelkafoje oni akuzas Luther-on pri montanismo. Sed Montanus estis dualisto : pri kanono li disigis la bonon - Luko kaj paŭlaj epistoloj - disde la malbono : la cetero. Luther ne faras tiel : li serĉas la ĉenon, la fadenon, kiu trairas la tutecon de la Biblio. Laŭ li, la tutpovo de la dia graco estas Jesuo Kristo mem. La sola kaj vera demando pri Luther estas : se oni privilegias unu aserton el la Biblio inter multaj, ĉu oni ne malpliigas kaj forgesigas aliajn ?

Kiel Luther, Calvin fondas sian teologion sur la Biblio. Ĝia aŭtoritato ne venas de la Eklezio, sed de la ago de la Sankta Spirito. La Skribo

"komencas vere tuŝi nin, kiam ĝi estas sigelita en niaj koroj de la Sankta Spirito... Ni submetas al ĝi nian juĝon kaj inteligentecon, kiel al io superigita super la neceseco esti juĝata." (Kristana Institucio, I, VIII, 1)

"La Vorto ne donas fidon en la homa koro, se ĝi ne estas sigelita de la atesto de la Sankta Spirito." (K.I., I, VII, 4, ambaŭ el STROHL (Henri). - *La Pensée de la Réforme*, 1951, p. 79)

Luther same diras :

"Neniu povas kompreni Dion kaj Lian Vorton, se ĝi ne estas senpere klarigita de la Sankta Spirito. La ago de la Sankta Spirito devas esti eksperimentata, spertata, sentata. Farante ĉi tiujn spertojn, oni estas en la Sankta Spirito. Se oni ne trairas ĝin, la vortoj restas vortoj." (Weimar 7 : 546).

Sed estas inter Luther kaj Calvin diferenco de akcentado pri la maniero ekstrakti la enhavon de la Biblio. Se Luther serĉas distingi la plej-gravaĵon disde la akcesoraĵo, Calvin ricevas la Skribon kiel inspiritan en ĝia tuteco ; li donas tiom da graveco al la MNT kiom al la NT, ĉar laŭ li, la MNT antaŭanonce Jesuon Kriston en ĉiuj siaj partoj. Li ne rifuzas ian ĉefecon al la Nova Testamento, sed li ne volas privilegii kelkajn pecojn : la Sankta Spirito parolas kaj per la profetoj kaj per la buŝo de la apostoloj :

EVANGELIAJ KAJEROJ

"Se la Spirito de Dio ne parolas per la buŝo de la profetoj, tio ne estas granda krimo malestimi tion, kion ili anoncas kaj kion ili predikas ; sed ĉar Dio faras el ili siajn mesaĝistojn kaj ilin metas tie por ke, tio, kio estas aŭdata de ilia buŝo, estu vera." (14-a prediko pri Harmonio de la tri evangelioj)

La pozicio de Calvin pri la Sankta Skribo estas nek iluminismo nek fundamentismo. Li ne kredas, ke per si la Biblio parolas pri Dio : sed la Spirito parolas. Sen Li (mi skribas Li, ne ĝi : la Spirito estas persono) la homo ne povas kompreni la Biblion :

"Pro la surdeco de la homoj, la Sankta Spirito devas bori la orelojn por ke ili aŭdu la Vorton de Dio en la Skribo." (STAUFER. - *Dieu, la création et la Providence dans la prédication de Calvin*, p. 66)

Calvin konfidas ne la homan inteligentecon sed Dion. Tial Calvin kritikas la siatempan roman Eklezion, kiu destinis la teologion kaj la legadon de la Biblio al kelkaj specialistoj :

"Dio ne turnis Sin nur al iu doktoro sed Li komunikis Sian voĉon al la tuta popolo, ĝis al la plej malkleraj (*jusques aux plus idiots*)." (42-a prediko pri Readmono)

Tio estas la veto de la Reformacio pri la Biblio : ĉiu povas per si legi ĝin. Neniu eĉ la plej scioplena homo povas postuli pli bone kompreni la Biblion, ol alia malpli klera. Calvin ŝatas diri, ke Dio metis Sin en la nivelo de la homa kompreno : Li balbutas kiel nutristino balbutas al infanoj. Ekzemple en la unuaj ĉapitroj de Genezo, Dio parolas, ne kiel scienculo, sed laŭ la nivelo de scienca kono de homoj.

La Sankta Spirito, ne la libera ekzameno, estas interpretisto de la biblia revelacio. La vereco estas ununura en la Spirito : ĝi ne disiĝas en la konscio de ĉiu kredanto. Al ĉiu sia vero estas la malo de la opinio de la reformaciistoj. La biblia vero estas nek en la Eklezio, nek en la individua konscio, sed en la Spirito donita al ĉiu.

La Reformacio postulis la liberecon ne de la homo sed de Dio, la dia libereco paroli laŭ la Spirito, nek per la individua konscio, nek per la eklezia organizo, sed per la frata komuneco de la loka Eklezio, kie kristanoj kolektiĝas ĉirkaŭ la aŭskultata Vorto kaj la sakramentoj. Tiu grava aserto estis kontestata de la Katolika Reformo en la Tridentina Koncilio, kiu metis unua la Eklezian aŭtoritaton antaŭ la Skribo. Sed ĝi estas ankaŭ kontestata de la protestantismo, kie la kredanto estas, laŭ la vorto de Bossuet (*bosüe*) "Ĉiu, papo la Biblio en la mano."

LA REFORMACIISTOJ KAJ LA STATUSO DE LA BIBLIO

Sed tio apartenas al la historio de la protestantismo post la jarcento de la Reformacio. La centra mesaĝo de la Reformaciistoj estas, ke la Biblio apartenas ne al la homo sed al Dio.

Alain G. Martin, Francujo

EVANGELIAJ KAJEROJ

JOHANN ALBRECHT BENDEL KAJ LA BIBLIO

Miloj da pastoroj tra la tuta mondo uzadas la grekan tekston de la Nova Testamento, kiun eldonis Eberhard Nestle kaj poste ties filo, Erwin Nestle¹. Por multaj, la nomo Nestle fariĝis sinonimo por la libro mem. Se ili iam legis la antaŭparolon, en latina lingvo, ili vidis la noton, kiun Nestle metis super la tuto :

*"Te totum applica ad textum,
rem totam applica ad te."* (J. A. Bengel)²

Nestle citas el la antaŭparolo por la greka NT preparita de Bengel en 1734. La citaĵo bone resumas la du flankojn de la vivlaboro de tiu teologo, kies datreveno en la jaro 1987 liveras oportunon por memori lin ankaŭ ĉi-loke.

Johann Albrecht Bengel (*johan albrecht bengl*, latine li nomis sin *Albertus Bengelius*) naskiĝis la 24-an de junio 1687 en la virtemberga (Württemberg, *vürtemberg*, Virtembergo) urbeto Winnenden. Lia patrino estis pranepino de la ŝvaba reformaciisto Johannes Brenz. Lia patro, pastoro, havis ampleksan privatan bibliotekon, sed ĝi forbrulis, kiam la armeo de Louis XIV (*lui*, Ludoviko) travagis la landon kaj detruis la pastoran domon. Post la frua morto de la patro, Bengel iris al Stuttgart (*štutgart*), sesjara, kaj tie ricevis sian edukigon en la domo de decida kaj originala pietisto. Fininte la tiel nomata "latinan lernejon", li ricevis stipendion en la tradicioplena "*Stift*", la duka stipendiejo de la universitato en Tübingen, kiu servis por prepari la estontan pastraron de la Virtemberga Eklezio.

Apenaŭ dek-ses-jara, li komencis studi filozofion kaj matematikon, poste teologion. Lia sento por ordo kaj ĝisfunda ekzakto tie akiriĝis solidan bazon. Post sukcesa ekzameno, en 1706, li restis sep jarojn en la universitato kiel asista instruisto por helpi junajn studentojn kaj kiel vikario por la pastrado de najbaraj vilaĝoj.

Dudek-ok jarojn li instruis en la seminario de Denkendorf kaj donis sian stampon al tuta generacio de virtembergaj pastoroj. Prepare al la universitato, la junaj lernantoj³ tie tralegis, en dujaraj kursoj, la tutan Novan Testamenton en la greka. Observante striktan disciplinon kun multa simileco al monaĥejo, Bengel tie plene disvolvis sian karakterizan kombinaĵon de persona pieco kaj postulema scienceco. Poste, kiel prelato de simila seminario, li estis membro de la virtemberga parlamento, kaj dum siaj lastaj jaroj, membro de la gvida instanco de la tiama dukaĵo, kvankam li ne ŝatis tro tiun devon agadi "en la tumulto de la mondo". Ke oni

neniam proponis al li profesorecon en la universitato de Tübingen certe doloris, sed li serene toleris ĝin, same kiel sortobatojn pro la morto de ses el liaj dek du infanoj. Kiel prelato de Alpirsbach (*alpirsbach*) rezidanta en Stuttgart, J. A. Bengel mortis la 2-an de novembro 1752. Pri lia tombo oni nenion scias.

Jam kiel studento li rimarkis en la teksto de la Biblio, tuj kiam prezentis sin okazo por kompari diversajn eldonojn kaj manuskriptojn, amason da variantoj. Tio forte maltrankviligis la konsiencon de la pia juna homo, sed li ne kuraĝis paroli pri siaj duboj kun iu ajn. Sed la prema demando restis, ĉu ni disponas fidelan formon de la Sankta Skribo. Tiu persona problemoj kaj lia posta devo regule instrui lernantojn kondukis lin al skrupula filologia laboro, kiu okupis grandan parton de lia vivo. Ege diligente li esploris malsamajn eldonojn kaj tralaboris tridek manuskriptojn de la NT, kiujn la tiama angla eldono de la greka teksto ne konsideris. Sola celo de lia scienca kritiko estis, trovi la plej bonan tekston, distingi pli freŝdatajn formojn de pli originalaj kaj pli bonajn variantojn de difektitaj. Jam frue li konstatis, kun granda malpeziĝo de sia koro, ke ja temas pri granda amaso da tiaj lokoj en la Biblio, tamen nenio vere tuŝas la fundamente⁴. En 1728 li skribas :

"Preskaŭ la tutan monaton decembro mi uzis por esplori unu malfacilan lokon, 1 Joh 5:7."

Unu el la principoj de Bengel restis valida ĝis nun, nome ke la pli malfacila teksto estas preferinda, kiam oni ne bone povas decidi. Laiko ja senhezite preferus la pli klaran vorton aŭ esprimon. Sed jen lia argumento : Iu kopiisto povus glatigi parton ne tuj kompreneblan, do ŝajne plibonigi, tamen difekti la tekston ; inverse oni ne agas - do jen la pli originala formo. Multe pensi, malmulte verki, sekvante tiun principon, nur en 1734 Bengel aperigis la grandan eldonon de sia Nova Testamento kun detala suplemento kaj kritika aparato.

Tio tamen estis nur prepara laboro, por konduki de la formo al la enhavo, de la vortoj al la Vorto. Bengel estis ĉiam konvinkita, ke la tuto de la Skribo eksplikas sin mem, unu parto la alian. Vidi la koherajn liniojn, kiuj kuras tra la tuta Biblio kaj ligas la Malnovan Testamenton kun la Nova kaj inverse, havis por li duoblan celon.

Unue, temis pri tio, ke ĉiu persono povu trovi la vojon al eterna vivo. Tio estis kaj restis lia unua emfazo.

Due, temis pri tio, ke ĉiu povu ekkoni la intencojn de Dio pri la mondo kaj Lian savo-planon en la historio. Bengel nomas tion la ekonomio de Dio, nome la vojon de Dio kun la mondo, kun la homaro,

kun Izraelo kaj kun la Eklezio tra ĉiuj epokoj. Por tion ekkoni ne sufiĉas havi peljeble seneraran tekston. Oni devas plejeble ĝuste kompreni la sencon de ĉiu frazo kaj vorto. La rolon de ekzegezisto Bengel komparas kun tiu de putofaristo⁵ :

Tiu ne verŝu akvon en la fonton, sed zorgu nur pri tio, ke la akvo fluu pura tra tuboj kaj kondukiloj. Tiam aliaj kaj li mem ricevos abundon da akvo.

Lia dika libro por klarigi la tutan Novan Testamenton, aperinta en 1742, ne volas alporti ion propran aŭ novan, sed sole montri, kio kuŝas en la Skribo mem. Tial li nomis ĝin *Gnomon Novi Testamenti* (montrilo al la NT). En konciza, preciza kaj klara latino, tiu lia ĉefverko donas klarigojn pri la tuta NT, daŭre rigardante la grekan tekston kaj instigante al memstara legado kaj pripensado. La libro trovis entuziasman eĉon inter liaj disĉiploj kaj grandan disvastiĝon inter aliaj. Jam dum Bengel ankoraŭ vivis, aperis germana traduko. En 1755, John Wesley (*ĝon ŭesle*)⁶, la fama patro de metodismo, tradukis ĝin en la anglan, forlasante sian planon eldoni propran komentariojn pri la NT. Eĉ en modernaj komentarioj oni trovas citaĵojn el *Gnomon*, plej ofte konsistantaj el nur du tri latinaj vortoj.

Post la greka NT kaj la latina *Gnomon*, kies efiko atingis la homojn en la Eklezio nur tra teologoj kaj pastroj, la tria kaj lasta laboro super la tuta NT celis la ĝeneralan kristanon : traduko en la germanan, kiu tamen restis en lia tirkesto ĝis lia lasta vivo-jaro. Fine li eldonis ĝin en 1752, sed ne ĝisvivis la aperon. La libro enhavas ekzaktan, iom lignecan kaj pedantan tradukon surbaze de la reviziita greka teksto de Bengel, kun notoj pri malfacilaj lokoj, kaj intermite, mallongaj preĝoj. Bengel konsciis, kiel malfacila estos la sorto de nova traduko apud la klasika verko de Luther, kiu donis sian stampon al la literatura germana lingvo por ĉiam. Neniam Bengel intencis rezigni pri la Biblio de Luther por la publika Diservo, sed por studo kaj edifo en la pietismaj rondoj li deziris provizi, apud la lingvaĵo de la 16-a jarcento, tiun modernan, parolantan la lingvon de la 18-a.

Plej konata fariĝis Bengel pro eraro tre grava, kies evidentiĝo okazis longe post lia morto. Ekde 1724, li aparte okupis sin, post komenca malemo, pri la Apokalipso, la lasta libro de la Biblio. Lia intereso por la historio de la savo kondukis lin al precipa atento pri profetaj nombroj en la Apokalipso. Elstaras la nombro 666 en Apo 13:18. Preparante adventan predikon en 1724, li ekhavis la ideon, ke ja la gloro de la plenumita regno de Dio certe ne havos tempa finon, tamen la mizero antaŭ-iranta kaj kondukanta al tiu gloro havos ĝin. Starigante biblian kronologion kaj farante

kalkulojn per la nomitaj nombroj li alvenis al la konkludo, ke la reveno de Kristo por la Miljara Regno okazos en 1836. Kvazaŭ nova revelacio, tiu prognozo movis la korojn de piaj homoj dum cent jaroj kaj profunde tuŝis la historion de la virtembergaj eklezio kaj lando. Kiam Dio mem korektis la prognozon de 1836, la pietisma movado suferis gravan krizon, tamen ĝi transvivis kaj tiamaniere liberiĝis de nesobra entuziasmo.

Okaze de la 300-a datreveno de lia naskiĝa tago, oni aranĝas longan vicon da festaj kunvenoj en la lokoj, kiujn lia vivo tuŝis. Nove oni esploras la signifon de tio, kio restis el lia laboro por la nuno. Pripensinda kaj vojomontra (*Gnomon*) restas ĉe Bengel tiu unika kombino de rigora filologia laboro super la originala teksto kun persona biblia pieco, de racia sistema pensado kun subjektiva kredo-sperto, de dumviva laboro en la establita eklezio kun ama zorgo pri la privataj rondoj de biblio-legantoj. Se, male ol en multaj aliaj luteranaj kaj reformitaj eklezioj, en la virtembergaj Eklezio neniam okazis disiĝo inter la oficiala eklezio kaj la pietismaj rondoj kunvenantaj en la domoj, tio ŝuldiĝas ja ne ekskluzive, sed ankaŭ al Bengel⁷. Apartigi sin de la aliaj ĉiam estis tento por homoj konsciiĝintaj pri la mizera stato de la Eklezio. Sed laŭ Bengel, tio ne respondas al la ekonomio de Dio. Dio toleras miksajon de bono kaj malbono, ankaŭ en la Eklezio. Tial, malgraŭ kritiko, li restas en ĝi⁸.

"La Skribo helpas la Eklezion kaj tenas ĝin. La Eklezio atestas pri la Skribo kaj konservas ĝin. Se la Eklezio viglas, la Skribo brilas. Se la Eklezio malsanas, la Skribo suferas."

Adolf Burkhardt, Germanujo

1) *Novum Testamentum Graece*. Unua eldono Stuttgart 1898, de Eberhard Nestle. 13-a eldono Stuttgart 1927, de Erwin Nestle. Ekde la 21-a eldono, kunlaboro kun Kurt Aland 1952. Nun en la 26-a eldono. Sume aperis pluraj centmiloj da ekzempleroj.

2) Laŭvorte:

"Vin tutan apliku al la teksto, la tutan enhavon apliku al vi", t.e. Turnu vin kun via tuta energio al la teksto, kaj apliku la tutan enhavon de tiu teksto al via propra vivo.

3) Ili estis 12-14-jaraj.

4) Kompreneble tio ne solvis la problemon de inter si kontraŭdiraj detaloj, precipe en la Evangelioj. Li ja klare ilin observis, sed ne esploris kritike. Li diras:

"Se iu pentras urbon el oriento kaj iu alia el okcidento, ambaŭ ja devas figurigi la plej altajn kaj gravajn turojn kaj domojn, sed cetere iliaj pentraĵoj povas kaj devas forte diferencii inter si, laŭ tio, kiun parton de la urbo ili havas antaŭ la okuloj."

Cetere li tute rezignis pri iuj homaj teorioj por apogi la aŭtoritaton de la Skribo. li fidis la potencon de la Vorto mem. Al juna disĉiplo, kiu traseris skrupulojn pro nekongruaĵoj renkontitaj en la Biblio, li skribis:

"Mangu la panon, kia vi trovas ĝin, kaj ne ĉagreniĝu, se ie kaj ie vi trovas sableron el la muelŝtono."

5) Same modesta sonas alia difino: temas pri la tasko de servisto, kiu purigas la meŝon de la lampo, por ke ĝi des pli hele lumu.

6) Wesley nomis Bengel-on: "Lumo de la kristana mondo".

7) La estro de la ŝtato ja estis samtempe estro de la Eklezio. En 1743, *Pietistenedikt* (edikto pri la pietistoj) formale permesis por la ŝtato de Würtemberg la kunvenojn de liberaj biblio-rondoj en privataj domoj, sub gardo de la respektiva loka pastoro. 8) Freŝdate, domo por studentoj pri teologio, pli malpli paralela al la tradicia *Stift*, portas la nomon *Albrecht-Bengel-Haus*, kun la celo firmigi kaj apogi la pietisman influon inter la estontaj pastoroj, kiuj tie ricevas sian teologian edukigon en la ŝtata universitato de Tübingen.

Literatur zu Bengel

Leicht greifbare Texte von Bengel

1. Johann Albrecht Bengel, *Gnomon Novi Testamenti*. Deutsche Übersetzung. 3. Hde. Stuttgart 1960.
2. Johann Albrecht Bengel, *Du Wort des Vaters, rede du*. Ausgewählte Schriften, Predigten und Lieder. Herausgegeben von J. Roessle. Zeugnisse der Schwabenväter, Bd. 6. Metzingen 1962.
3. Johann Albrecht Bengel, *In der Gegenwart Gottes. Bekenntnisse und Zeugnisse*. Herausgegeben von J. Roessle. Zeugnisse der Schwabenväter, Bd. 7. Metzingen 1964 (Auszüge aus verschiedenen Werken).
4. Rede, Wort des Vaters. Predigten von Johann Albrecht Bengel. Herausgegeben von E. Beyreuther. Stuttgart 1967.
5. Johann Albrecht Bengel, *Vom heiligen Heimweh. Worte für alle Tage des Jahres*. Herausgegeben von Karl Hermann. Stuttgart 1979.

Literatur zu Bengel

6. Karl Hermann, Johann Albrecht Bengel. Der Klosterpräzeptor von Denkendorf. Stuttgart 1937.
7. Julius Roessle, Von Bengel bis Blumhardt. Metzingen 1959.
8. Gottfried Mäler, Johann Albrecht Bengel. Leben und Werk. Stuttgart 1970.
9. Erich Beyreuther, Geschichte des Pietismus. Stuttgart 1978.
10. Martin Haug, Bengel und die Bibel: in Theo Sorg. Leben in Gang halten. Pietismus und Kirche in Württemberg. Metzingen 1980.
11. Richard Haug, Reich Gottes im Schwabenland. Metzingen 1981.
12. Gerhard Schäfer, Zu erbauen und zu erhalten das rechte Heil der Kirche. Eine Geschichte der Evang. Landeskirche in Württemberg. Stuttgart 1984.
13. Werner Hehl, Johann Albrecht Bengel. Leben und Werk eines schwäbischen Kirchenvaters. Quell Verlag Stuttgart (erscheint im April 1987).
14. Martin Brecht, Johann Albrecht Bengel: in Theologische Realenzyklopädie, Bd. 5.
15. Gottfried Mäler, Die Werke der württembergischen Pietisten des 17. und 18. Jahrhunderts. Berlin 1972 (Verzeichnis der Werke und der Nachdrucke von Bengel).

300 JAHRE

JOHANN ALBRECHT Bengel

Theologischer Lehrer in drei Jahrhunderten

Vortragsreihe im Hospitalhof Stuttgart

Johann Albrecht Bengel wurde am 24. Juni 1687 in Winnenden geboren. Als Theologe nimmt er die Herausforderungen neuzeitlich-wissenschaftlichen Denkens an. Er gerät dabei in eine Weise und Spannung des Denkens, die uns auch heute bewegt. Biblische Frömmigkeit wird verknüpft mit philologischer Arbeit am Urtext. Mathematisch-naturwissenschaftliches Denken wird einbezogen in die theologische Deutung von Geschichte und Natur. Wie verhalten sich subjektive Glaubenserfahrung und rational-systematisches Denken? Bengel vereint wissenschaftlich-mathematisches Interesse mit bibeltreuer Frömmigkeit. Damit wird er zu einer prägenden Gestalt württembergischer Kirchengeschichte zu Beginn der Neuzeit.

Mittwoch, 29. April 1987, 20 Uhr
Die himmlische Rechenkunst – Über die Symbolik der Zahlen
– zum 300. Geburtstag von Johann Albrecht Bengel
Professor Dr. Otto Betz, am. Ordinarius für Allgemeine Erziehungswissenschaft und Religionspädagogik an der Universität Hamburg

Mittwoch, 20. Mai 1987, 20 Uhr
Johann Albrecht Bengel und der Wortlaut des Neuen Testaments
Professor Dr. Kurt Aland, Institut für alttestamentliche Textforschung der Universität Münster, Herausgeber des NT graec

Dienstag, 26. Mai 1987, 20 Uhr
Selbsterfahrung und Glauben
Der Streit um die Innerlichkeit und psychische Erfahrbarkeit des Glaubens zwischen Bengel und Zinzendorf
Professor Dr. Lothar Steiger, Ordinarius für systematische Theologie (Dogmatik) an der Universität Heidelberg

Mittwoch, 3. Juni 1987, 20 Uhr
Bengel als Seelsorger
Professor Dr. Martin Brodtkorb, Universität Münster

Dienstag, 1. September 1987, 20 Uhr
Die Kirche und der Pluralismus
Die Beziehung zwischen der Kirche und Gruppen in der Nachfolge – Vielfalt als Reichtum und Spannung
Dr. theol. Ulrich Duchrow, Regionalbeauftragter für Mission und Ökumene in der Evangelischen Landeskirche Baden; Professor für Systematische Theologie an der Universität Heidelberg

Montag, 7. September 1987, 20 Uhr
Gemeinschaft im Glauben und im Alltag der württembergischen Protestanten des 18. Jahrhunderts
Professor Dr. Hartmut Lehmann, Historisches Seminar der Universität Kiel

Mittwoch, 30. September, 20 Uhr
Glaube und Offenbarung im Zeitalter der Aufklärung
Bengels Verteidigung des göttlichen Wortes
Dr. Stefan Ströhm, Pfarrer, wissenschaftlicher Mitarbeiter an der Württembergischen Landesbibliothek, Stuttgart

Vortragsreihe im Bengelhaus in Tübingen

Die Vorträge finden im Albrecht-Bengel-Haus in Tübingen jeweils um 20 Uhr statt. Anschrift des ABH: Ludwig-Krapf-Straße 5, 7400 Tübingen

13. Januar 1987: Dr. Gerhard Maier
Auf dem Wort trauen
Bengels Schriftverständnis
1. Februar 1987: Prof. Dr. Peter Beyerhaus
Aus dem Wort urteilen
Bengels Bedeutung für das heilsgeschichtliche Verständnis der Mission

28. April 1987: Claus Dieter Röll
Unter dem Wort leben
Bengel als Seelsorger

19. Mai 1987: Dr. Fritz Oetzel
Am Wort bleiben
Bengels Leben in Anfechtungen

2. Juni 1987: Martin Holland
Mit dem Wort leben
Bengel als Ausleger der Johannesoffenbarung

7. Juli 1987: Rolf Schefftruch
Aus dem Wort einander anschauen
Bengel im Ringen zwischen Pietismus und Separatismus

13. Oktober 1987: Hartmut Schmidt
Mit dem Wort bauen
Bengel als Schriftausleger

27. Oktober 1987: Dr. Helko Krimmer
Durch das Wort wissen
Bengel und die Endzeit

24. November 1987: Friedemann Kler
Mit dem Wort gehen
Bengel als Vertreter heilsgeschichtlicher Theologie

8. Dezember 1987: Werner Trick
Zum Wort stehen
Die »Schule« Bengels

EVANGELIAJ KAJEROJ

LA BIBLIO POST LA DUA VATIKANA KONCILIO

Post la Reformacio, la Katolika Eklezio akcentis la celebradon de la Sankta Meso, la eŭkaristio, pli ol la legadon de la Biblio. Ankaŭ la proklamo de la Evangelio estis tre grava afero por la Eklezio. Sed la Biblio estis preskaŭ nur ilo, helpilo por la prediko. La Biblio havis preskaŭ neniun memstaran valoron. Oni povas vidi la diversan gravecon, kiun oni atribuis al la proklamo de la Dia Vorto kaj al la eŭkaristio, en la nomoj de la du partoj de la meso: la unua parto nomiĝis "antaŭmeso" kaj la dua parto "ofermeso". Mi mem lernis en la katekizado:

"Vere malfruas al la Diservo tiu, kiu venas nur post la preparo al la ofero. Nur tiam oni pekas, kondiĉe ke oni mem kulpas pri tio."

Tio signifas, ke ja estis malbone ne ĉeesti dum la "antaŭmeso", sed tio ne estis peko, ne tre gravis.

Ankaŭ la elekto de la bibliaj tekstoj estis malgranda en tiu tempo. La tekstoj de la dimanĉoj ripetigis ĉiujare. Tio signifas: 52 dimanĉoj jare = 52 perikopoj el la Evangelioj, aldoniĝis plie 52 perikopoj el la leteroj de la apostoloj aŭ el la Agoj. Dimanĉe, oni neniam legis tekstojn el la Malnova Testamento. La grandaj festoj de la liturgia jaro (Kristnasko, Pasko, Pentekosto, la antaŭpaska tempo kaj la festoj de la grandaj sanktuloj) ankaŭ havis proprajn legaĵojn. Entute la elekto el la Biblio estis malgranda, malriĉa, nur ĉirkaŭ 200 perikopoj el la Evangelioj kaj po 100 legaĵoj el la MNT kaj el la leteroj de la apostoloj, la Agoj kaj la Apokalipso (Mi ne scias la ekzaktan nombron, ĉar mi ne komparis la tekstojn, ĉu oni elektis plurfoje la samajn).

En la katekizado ankaŭ, la Biblio estis ne pli valora ol la instruo de la katekismo. Oni povis vidi la diferencon – mi spertis tion, kiam mi estis lernantino –: la pastroj instruas pri la katekismo, kaj la instruistoj instruas la "biblian historion", t.e. rakontojn pri la Biblio.

La dua Vatikana Koncilio ŝanĝis tiujn praktikojn. La Eklezio konsciis, kaj ankaŭ ĉiam denove konscias, pri la graveco de la Biblio, de la Dia Vorto, kiu parolas al ni per la bibliaj tekstoj. Diversaj konciliaj dokumentoj parolas pri la graveco kaj la valoro de la Biblio, ekz.: ĉefe *Dei verbum* (La Vorto de Dio) pri la dia revelacio. En la n-ro 24 oni legas:

"La sankta teologio baziĝas sur la skribita Dia Vorto."
Kaj la n-ro 25 de la sama dokumento admonas:

LA BIBLIO POST LA DUA VATIKANA KONCILIO

"Pri tio, ĉiuj ekleziuloj, precipe la pastroj kaj la aliaj, kiuj kiel diakonoj kaj katekistoj sin dediĉas - laŭ siaj misioj - al la servado de la Dia Vorto, devas okupiĝi pri la ĉiama legado kaj la profunda studado de la Sanktaj Skriboj..."

Sed ankaŭ aliaj dokumentoj de la Koncilio substrekas la valoron de la Biblio por la vivo de la tuta Eklezio kaj por la vivo de ĉiu kristano, ekz. la dokumento pri la liturgio, pri la Eklezio *Lumen gentium* (la lumo de la popoloj), pri la servo kaj vivo de la pastroj, ktp. Preskaŭ ĉiu dokumento parolas pri la valoro de la Biblio kaj admonas la fidelulojn legi la Dian Vorton, studi kaj mediti ĝin. Ekz. la jam citita *Dei verbum* citas en n-ro 25 Sanktan Hieronymus (*hieronymus*, Hieronimo), kiu skribas:

"Ne koni la Sanktajn Skribojn signifas ne koni Kriston!"

La koncilio donas ankaŭ pli grandan tekstelekton al la liturgio.

Nun nomiĝas la unua parto de la meso ne plu "antaŭmeso", sed "liturgio de la Vorto (Parolo)" kaj tiu parto estas samvalora kiel la dua parto, la liturgio de la eŭkaristio".

Diri do la koncilio, ke la Biblio estas tiel altvalora. Kaj la vivo de la Eklezio, la ĉiutaga vivo de la fideluloj? Ĉu ĉi tie vere ŝanĝiĝas io? Laŭ mia opinio kaj sperto: jes!

La elekto el la Biblio por la Diservo pligrandiĝis:

Unue, ni havas nun en la dimanĉa Diservo tri legaĵojn: la unua estas el la MNT, la dua el la leteroj de la apostoloj, la Agoj aŭ la Apokalipso, kaj la tria el la Evangelioj. Inter la unua kaj la dua legaĵo oni kantas nun psalmon - respondon al la Dia Vorto en la legaĵo - kaj la psalmo estas vere la kvara legaĵo.

Due, la dimanĉaj legaĵoj alternas en trijara ritmo. Tio signifas ekz.: 1984 estis "jaro A". Oni legis ĉefe tekstojn el la Evangelio laŭ Mateo. 1985 estis "jaro B" kaj oni legis ĉefe la Evangelion laŭ Marko. La jaro 1986 estis "jaro C" kun tekstoj el la Evangelio laŭ Luko. 1987 estas denove "jaro A", ktp. La Evangelio laŭ Johano estas distribuita inter la jaroj A, B, C. Nature ankaŭ la unua kaj dua legaĵoj alternas laŭ tiu ritmo. La unua legaĵo, ĝia enhavo, similas al la enhavo de la Evangelio, ekz. se oni legas la perikopon pri la sanigo de la dek lepruloj (Lk 17:11-19), oni legas el la MNT pri la siriano Naaman (2 R 5:14-17). La dua legaĵo estas kontinua, sen direkta rilato al la Evangelio.

Trie, ĉiu tago havas proprajn legaĵojn. Antaŭ la dua Vatikana Koncilio, oni ripetis la dimanĉajn legaĵojn dum la semajno, kiam

EVANGELIAJ KAJEROJ

oni ne festis iun sanktulon. Nun la unua legaĵo alternas en dujara ritmo, la Evangelio havas unujaran ritmon. La ĉiutaga partoprenanto de la Snakta Meso nun havas kontinuan legadon el la Biblio, kaj oni legas en la daŭro de tri jaroj preskaŭ la tutan Biblion.

Ĉio ĉi tio montras la altan valoron, kiun nun la Biblio, la Dia Vorto, denove havas en la Katolika Eklezio, en la konscio de la Eklezio, de la fideluloj. Ankaŭ en la dua parto de la Sankta Meso la Dia Vorto estas grava, altvalora. Laŭ nia fido, la Dia Vorto, parolante per la pastro dum la konsekro, vere konsekras panon kaj vinon.

Sed la Sankta Meso estas nur unu formo de la Diservo. En la Katolika Eklezio, ĉiu pastro, ĉiu monaĥo kaj monaĥino, ĉiu ordenano, preĝas ĉiutage la brevieron. Tiu preĝado ampleksas la bibliajn preĝojn de la psalmoj, kaj himnojn el la MNT kaj NT, kaj ankaŭ bibliajn kaj ne-bibliajn legaĵojn. Ankaŭ ĉi tie la elekto de la legaĵoj pliriĉiĝis.

Sed la brevier ne nur estas pastra preĝado. Ankaŭ la paroĥaj komunumoj ĉantas partojn de la brevier kune, ekz. la matenan parton: la laŭdojn, aŭ la vesperan parton: la vesprojn, aŭ la nokto-preĝon: la kompletion (La brevier konsistas el kvin partoj: legadhoru ("Lesehore"), laŭdoj, meza horu (dum tagmezo), vesproj kaj kompletio, lasta horu de la tago). Dum la ekumena kongreso en Augsburg en 1985, ni ĉantis partojn de la brevier kune, ankaŭ kun la nekatolikaj partoprenantoj. Estas, laŭ mia opinio, tre bona afero: preĝi la Biblion. La german-lingva oficiala preĝlibro *Gotteslob* (Di-laŭdo) enhavas multajn proponojn por tiu komuna brevier-preĝado.

Post la dua Vatikana Koncilio ekzistas nun en la Katolika Eklezio memstara formo de la Diservo: la liturgio de la Vorto (Parolo) - germane *Wortgottesdienst*. Tiu formo similas al la unua parto de la Sankta Meso kaj ankaŭ al la Diservo en la protestantaj eklezioj. Ĝi ampleksas pli longajn legaĵojn kaj preĝojn, kantojn kaj tempojn de silentoj, kaj ankaŭ predikon. Sed tiu formo de la Diservo malrapide disvastiĝas. Ĉe ni, oni uzas tiun formon de la Diservo je la komenco kaj fino de la lernojaro por la gelernantoj. Oni ankaŭ celebras ĝin kiel ekumena Diservo. Mi tre ŝatas ĝin, ĉar mi opinias, ke ĉi tie estas ebleco por preĝi kune al nia komuna Patro.

Sed tiu Diservo ankaŭ estas celebrata kun la eŭkaristia manĝo, se la paroĥo ne havas pastron, se la pastro estas malsana kaj neniu povas anstataŭi lin, ktp.

LA BIBLIO POST LA DUA VATIKANA KONCILIO

Post la dua Vatikana Koncilio, la episkopoj kaj la pastroj, la eklezia instru-ofico ĉiam denove admonas kaj spronas la fidelulojn legi la Bibliion, private kaj kune en grupoj. Oni trovas nun bibliajn rondojn en la paroĥoj, malgrandajn grupojn, kiuj legas la Bibliion kaj interŝanĝas siajn spertojn kaj pensojn, aŭ kiuj meditas pri la Vorto de Dio kaj preĝas. En nia paroĥo ekzistas grupo, kiu renkontiĝas ĉiun duan semajnon por pripensi la tekstojn de la venonta dimanĉo. Kune ni provas trovi tion, kion Dio volas diri al ni pri ĉi tiuj tekstoj.

En mia loĝregiono, la pastroj havas ĉiujare seminarion dum kelkaj tagoj, kaj ili studas tre sincere la Malnovan Testamenton, aŭ parton de ĝi. Antaŭ la dua Vatikana Koncilio, la MNT estis ofte tre malbone konata parto de la Biblio, eĉ de la studentoj pri teologio kaj de pastroj. La profesoroj pri ekzegezo de la MNT ofte prelegis nur por kvin aŭ dek aŭskultantoj. Laŭ mia opinio, multaj homoj pensis la MNT-on kiel libron kun "sep sigeloj". Aliflanke, la profunda studado de la MNT estis malfacila, ĉar la ekkonoj de historia kaj arkeologia esploradoj ne estis tre ŝatataj de la instru-ofico.

Precipe, la studado de la Biblio, de la MNT kaj de la NT ŝanĝis post la dua Vatikana Koncilio. En la pasinteco, oni povis preskaŭ opinii, ke la Biblio nur devis substreki la dogmojn. Nun mi legas en la nova katolika katekismo:

"La Biblio estas la dokumento, la pra-anonco de la fido."

En la germana teksto, oni uzas vortludon: *Urkunde* estas dokumento, *Ur-Kunde* estas pra-anonco. La streketo ŝanĝas la signifon, ĉi tie la streketo estas signo por la ŝanĝita pensmaniero en la Katolika Eklezio. "Pra-anonco" signifas: en la Biblio ni legas la plej gravan anoncon pri nia fido, pri nia konfeso, ĉar ni renkontas ĉi tie la fonton de ĉiu fido, ĉar ni renkontiĝas ĉi tie kun Dio mem.

La nova konsidero pri la Biblio estas, laŭ mia opinio, tre grava konstru-briko por la ekumena movado. Dank'al Dio, ĉiuj kristanaj eklezioj legas la saman Bibliion. Nun la komuna studado de la diversaj eklezioj kreskas. Ankaŭ ĉe la bazo, en la paroĥoj, la kristanoj renkontiĝas por kune legi la Bibliion. En Germanujo ekz., dum la januara monda preĝ-semajno por la unueco de la kristanoj, la diversaj kristanaj fideluloj kunvenas kaj pripensas kune bibliajn tekstojn. La tekstoj alterne estas el la MNT kaj NT.

En Germanujo, la katolika *Bibelwerk* (oficiala komisiono, kiu prizorgas la tradukadon de la Biblio en bonan kaj modernan germanan lingvon) laboras kune kun la protestanta *Bibelwerk*.

EVANGELIAJ KAJEROJ

Ekzistas intertempe ekumena traduko de la Psalmoj kaj de la NT. Tiuj tekstoj estas uzataj por la Diservo kaj la brevierio. Ambaŭ *Bibelwerke* kune eldonas librojn pri la Biblio, helpilojn por la studado kaj legado de la Biblio.

Tiun ĉi ekumanan aspekton de la biblia laboro mi nur konas en mia lando, mi - bedaŭrinde - nenion scias pri tio en aliaj landoj. Sed mi opinias, ke en Germanujo la ekumenaj problemoj estas treege urĝaj, ĉar protestantaj kaj katolikaj kristanoj vivas tre proksime, ofte en la sama familio. Pro tio oni bezonas la komunecon en preĝo kaj Biblio.

Ĝis nun mi skribis pri la ŝanĝoj, oficiale iniciatitaj de la Eklezio. Estas la demando, ĉu la Eklezio, la fideluloj ankaŭ ŝanĝis kaj ŝanĝis sian sintenon kaj vivas nun kun la Biblio, el la Biblio. Laŭ mia opinio, la katolikaj kristanoj volas ekkoni la Bibliion pli profunde. Krekas la nombro de la ĉiutagaj legantoj de la Biblio. Kreskas ankaŭ la nombro de bibliaj rondoj, grupoj, kie oni legas kune la Bibliion kaj interŝanĝas pensojn. La preĝoj ankaŭ fariĝas bibliaj. Oni komencas preĝi la Bibliion, preĝi kun la Biblio. Antaŭ ĉio, oni denove malkovras la Psalmaron, la preĝlibron de la judoj, la preĝlibron de Jesuo mem. Kiam mi legas la tekstojn de la *Andachten* (devociaj preĝoj) en la germana preĝlibro *Gotteslob* (Dialaŭdo), mi vidas, ke ili ĉiuj orientas sin laŭ la Biblio. Estas, laŭ mia opinio, tre bona afero. Ekzistas ankaŭ "biblia litanio", alvokoj, kiuj vokas al Dio kun bibliaj vortoj, bibliaj nomoj. Ankaŭ multaj spiritaĵ kantoj havas nun biblian enhavon - nature ekzistas ankaŭ modernaj spiritaĵ kantoj, kiuj esprimas personan piecon - kiuj trovas lokon en la Eklezio.

Finfine mi opinias, ke post la dua Vatikana Koncilio la Katolika Eklezio, la katolikaj kristanoj denove turnis la plenan atenton al la Biblio. Ni lernas denove, kion ni verdire ĉiam sciis, ke Dio parolas ĉiam denove per la Biblio al ni hodiaŭ, kaj ke ni aŭskultu Lian alparolon, por respondi kaj por akcepti Lian amon kaj Lian savon. Mi opinias, ke ni denove lernas, ke ni estas alparolataj per la vorto de la 95-a psalmo:

"Hodiaŭ, se vi aŭskultas Lian voĉon,

Ne obstinigu vian koron, ... (Psa 95:7c-8a)

Theotima Rotthaus, Germanujo

serieto celanta aŭdigi la plej diversajn voĉojn
de Kristanismo:
de liberala ĝis ortodoksa,
de rom-katolika ĝis protestanta,
sendepende de dogmaj limigoj,
depost Prækristanismo ĝis la nuno:
intern-eklezio, ekumene, interreligiig kaj tuthomare.

aperis ĝis nun nur kelkaj numeroj. Ĉiu estas plene memstara.
kiu havas ion seriozan por prezenti, sciigu tion al ni. kiu
volas subteni nian entreprenon, ĉu per donaco ĉu per prunto
ĉu alimaniere, sciigu tion al ni.
diskonigu niajn eldonaĵojn! diskonigu niajn eldonaĵojn!

jam aperis:

- 1 La Evangelio laŭ Petro & La Morto de Jesuo kaj kio pos-
te? apokrifa evangelio kaj eseo originala. 12 paĝ. 1,80 guld. dua eld.
- 2 Tertuliano - Apologio (el la jaro 197 p.Kr.) gravega
latina verko el la frua eklezio. trad. de Gerrit Berveling. 116 paĝ. 9,90
guld. dua eld.
- 4 Al Diogneto. apologieto el la komenco de la 2a jc. el
la helena de Isai Sumer. 16 paĝ. 1,80 guld. dua eld.
- 5 Kenneth Twinn - Unitarismo; skizo pri la kredoj his-
torio kaj organizo de la religiuloj nomitaj Unitarianoj. la aŭtoro est-
as unitaria pastro. 24 paĝ. 1,80 guld.
- 7 Gerrit Berveling - Dio/Kristanismo/Aliaj Religioj. stud-
aĵo pri 'teologio de la religioj'. 36 paĝ. 4,20 guld.
- 8 La Evangelio laŭ Maria Magdalena. prelego kaj traduko
de la restantaj fragmentoj de ĉi apokrifa evangelio. grava pri la rolo
de virinoj en la frua kristanismo. 12 paĝ. 1,80 guld.
- 9 Jam temp' estis! la "kairos-dokumento" de Sudafrika
kristanoj. kontraŭ ras-apartigo. 32 paĝ. 4,20 guld.
- 10 Beatrijs. mezepoka romkatolika Maria-legendo. el la
nederlanda. 24 paĝ. 3 guld.
- 11 Isai Sumer - Kie oni trovas tion en la Korano? mal-
granda konkordanco. 32 paĝ. 4,20 guld.
- 12 Tertuliano - Kuraĝigo por la Martiroj. por edifo de
estontaj martiroj en Kartago, ĉ. 197 p.Kr. el la latina. 12 paĝ. 1,80
guld.
- 13 Kantu al la Eternulo. kantaro de (ĉefe ĉefaj) kristan-
oj. trad. el diversaj lingvoj de Jiri Kozinek k.a. 44 paĝ. 6 guld. dua
eld.

estas en preparo i.a.:

- 3 Sin-konservo. eseoj kaj predikoj pri nukleaj armiloj
kaj Kristanismo. dua eld.
- 6 Ekzegeza komentario pri JONA.

krome prepariĝas verkoj
(i.a.) pri la pozicio de la virino en Judismo
pri religio kaj moralo
pri samseksemo kaj Kristanismo
poemaro el la K.E.L.I.-rondo

k.m.a.

Eld. VoKo,
Coornhertstraat 50,
3132 GK VLAARDINGEN,
NEDERLANDO.

mendojn al U.E.A. aŭ Esperanto-Centro Paderborn
aŭ rekte ĉe VoKo.

Kvankam por la granda plimulto de la homoj, kiuj legas la
Biblion, ĝi estas unuavice religia verko, tamen ĝi estas ankaŭ
literatura fenomeno. Ĝi estis verkita (almenaŭ grandparte) kun
intenco literatura, kaj nur poste aliaj homoj rekonis en ĝiaj
paĝoj la Vorton (aŭ Parolon) de JHVH Dio.

Same kiel okazis ĉe multaj praaaj popoloj, ankaŭ ĉe la hebreoj,
oni notis atentindaĵojn: malnovajn legendojn aŭ sagaojn de trib-
estro, de tribaj praaĵoj; mitologiajn kantojn pri interbatalo
praorigina inter la Forto de l'Malbono (la Morto, simboligita en
Levjatano, la Monstro el la Maro) kaj la Forto de la Bono (JHVH,
Tiu-kiu-ĉeestas); piajn kantojn de pilgrimantoj, same kiel am-
kantojn de junulinoj, aŭ batalokantojn plej orgojlajn (Gen 4:18-24).

Apud tiuj pli malpli hazardaj literaturaj kreaĵoj estiĝis en
pli oficiala formo la Kortega Kroniko de la reĝa palaco: la
Kroniko ekz. kiu provas pravigi la fakton, ke Davidon postsekvis
lia bastarda filo Salomono... kroniko, verkita sub la salomona
reĝado! Do supozeble sufiĉe tendenca. Sed tio ja estis kutimo,
tiuepoke, ĉiupalace. Foje eĉ ankoraŭ nun...

Unu el la plej unuaj tiaj verkoj iĝis vera literatura juvelo:
la rakonto pri la interligo inter David kaj Jonatan: rakonto kiu
detale montras la degeneron de la mensostato de la reĝo Saul, la
amon sinceran de ties filo kun fremda knabo, la timon de la reĝo,
ke la fremdulo forpuŝos lian filon el la potenc-heredo, la
katastrofajn batalojn, la senesperon de David pro la perdita
amato: Via amo por mi pli valoris ol amo de virino (2 Sam 1:26).

Krome, kiel ĉiukulture, oni notis leĝojn kaj malnovajn
kutimojn. Kaj samkiel Solon (Solono) en Ateno dankis Zeŭson, ke
Tiu en sia saĝo bonvolis donaci tiel justajn leĝojn al sia urbo
Ateno, same tiel la hebreoj dankis sian dion JHVH, ke Li bonvolis
riĉigi sian popolon per siaj saĝaj leĝoj. Ĉar leĝojn, ĉu donas iu
dio aŭ iu reĝo - kiu notus la diferencon? Ofte, plurkulture, oni
reĝojn senplie alvoĉis dioj...

Fenomeno kiu renkonteblis en la malnova Mezoriento, en pluraj
etaj landoj kaj regionoj, estis la profetado: ekzistis homoj, ĉu
memstare aktivaj proprainiciate, aŭ en organizita formo de
oficiala kolegio, ĉu ĉe templokomplekso, ĉu ĉe reĝa kortego, kiuj
asertis pri si mem, ke de temp'al tempo ili parolas je la nomo de
difinita dio. Ofte tiaj profetoj, ja nutrataj de la lokaj potenc-
uloj, senplie subtenis la ekzistantan situacion politikan kaj

socian kaj religian ; tamen, kelkafoje, precipe se sole memstare aktivaj, ili kritikeme rilatis al tiu ekzistanta situacio : kritikante la eksteran politikon de la reĝo, ekz., aŭ atakante la kulton aŭ la oferritojn ĉe certa sanktejo. En Izrael kaj Judujo (la du ofte malamikaj inter si hebreaj ŝtatoj) tiaj profetoj neniel lasis sin limigi je sia propra lando. Amos ekz., el la vilaĝo Tekoa, sude de Jerusalema, la ĉefurbo de Judujo, iris al Izrael por profetadi kontraŭ ties loĝantaro : la plej elegantajn grandulinojn de Samario, li alparolis kiel "bovinoj de Baŝan" (Amos 4:1). Kaj - eĉ pli grave ! - la tutan socian situacion li senplie kondamnis nome de JHVH. Do, ne mirige, se la reĝo sin sentis devigita forpeli tiun malpaciganton el la lando. Ankaŭ en Izrael kaj Judujo ekzistis profetoj, kiuj plene adaptiĝis al la reganta ordo - sed la pli memstaraj profetoj tiujn kondamnis, ankaŭ nome de JHVH.

Pri reĝo Joŝija notis liaj kronikistoj, ke foje li trovis en la templo de Jerusalema libron, kies enhavo estis "la leĝo de JHVH Dio" (pli malpli, verŝajne nia nuna Readmono). Ĉu vere li *kredis* tion fakta, aŭ ĉu nur estis por li utila metodo por obeigi al si la popolon, la historiistoj supozeble neniam kun plena certeco povos pruvi, sed estas fakto, ke ekde reĝo Joŝija almenaŭ parto de la hebrea literatura heredaĵo estis konsiderata kiel "sankta", "netuŝebla", "veninta de JHVH Dio" - unuvorte : kiel "Biblio".

Joŝija (ĉ. 640-609 a.K.) do montras turnopunkton en la hebrea historio.

Multaj antikvaj popoloj, kiel dirite, posedis plej diversajn literaturajn trezorojn, plejparte tute senkohere kaj dise. Plejparte ili do malaperis, eble por ĉiam. Parte hazarde oni retrovis ilin en la lastaj du jarcentoj (Gilgameŝ-epopeo eĉ iĝis mondfama).

La helena kulturo en sia postflorado, kiun ni nomas Helenismo, faris heroan provon kolekti kaj konservi por la posteuloj la grandajn trezorojn. Faris tiun laboregon famaj sciencistoj en Aleksandrio egipta, en la t.n. Muzeo - t.e. la granda biblioteko kune kun akademio. Tie oni fiksis la kodojn : jen la sep gravaj tragedioj de Aiskhulos (Esĥilo), jen la verkos de Homēros (Homero), jen la poetoj klasikaj, k.t.p. Kaj, dank'al tiu tiuepoka entrepreno, ni nuntempuloj ankoraŭ disponas pri certa elekto el la klasika helena literaturo.

Io tia okazis pri la hebreaj literaturaj trezoroj.

Post kiam sub Josija oni ekkonsideris certan verkon kiel norman por la vivo de l'popolo, piuloj ekkolektis ankoraŭ pli da kompareblaj verkoj. Oni formis en iom pli posta epoko el malnovaj verkaĵoj, el legendoj, sagaoj, kantoj kaj mitoj, el leĝoj kaj familiaj tradicioj grandajn koherajn verkojn, kiujn ni konas nuntempe kiel la Toraon kaj la Readmonon (Deŭteronomian) historion t.e. Josuo ĝis inkl. 2 Reĝ (Kroniko estas provo reverki ĝin el nova vidpunkto). Tiel kolektante kaj por la posteularo konservante la malnovajn tradiciojn de la popolo, oni samtempe, ĉefe sub influo profeta, reverkis ilin, restrukturigis la rakontojn.

Ankaŭ en plipostaj epokoj okazis tiaj kolekt-aktivecoj : pri la literatura postlasaĵo de pluraj profetoj.

Kiam la unuaj generacioj post Jesuo ekverkis kaj ekkolektis la legendojn kaj tradiciojn ĉirkaŭ lia agado, la reago de la gvidantoj de la juda popolo estis : ŝirme limigi la literaturon - ĝuste pro ties jam ĉefe religia norma signifo - kontraŭ la novaj (laŭ ili misgvidaj) verkaĵetoj de la ekkristanismo.

Tial tiuepoke oni decidis pri la hebrea kanono : surbaze de tre limigita historia scio, neĝenate de niaj nuntempaj konoj, oni akceptis ĉiujn verkaĵojn pri kiuj oni supozis aŭ kredis ke ilin verkis la "sanktuloj" de la pasinteco. Tiel eĉ simplajn amkantojn (ĉu por geedziĝofestoj, ĉu simple nurajn amkantojn) oni akceptis ĉar pro iu hazardo ili estis ricevintaj kiel pseŭdoaŭtoron... reĝon Salomono ! Sed literaturajn perlojn oni malatentis, pro tio ke iliaj aŭtoroj estis tro ĵusaj : ekz. la belega Saĝeco de Jesuo Sirafi. Ĉar ĉe la elektado kaj selektado oni ne plu utiligis *literaturan kriterion*, kiel faris siatempe la helenismaj fakuloj en Aleksandrio, sed pure nur religia/teologia kriterio estis decidiga.

Literature, en la Biblio renkontiĝas verŝajne ĉiuj ĝenroj, kiuj estiĝis en la malnova hebrea : krom teatraĵo (kiun oni ŝajne ne konis) tie enestas poezio batala (kanto de Mirjam, k.a.), ama (Alta Kanto), persone kaj komunume religia (Psalmoj), pri doloro, ĉagreno, seniluzio same kiel pri dankemo kaj saviĝo. Krom tio, en profetaj verkoj : malbenoj, prihimnoj, gajo kaj mizero. Unuvorte : la vivo en ĉiuj ties koloroj. Kaj en la prozaj partoj : plej sekaj nombradoj de la triboj : tiom da homoj en tiu familio, k.t.p. - apud plej trafaj noveloj, historiaj romanoj, kaj vera histori-verkado anala ; krome leĝoj, ritoj, kutimoj - klarigoj pri malnovaj geografiaj indikoj apud legendoj konekse al tiuj lokoj, genealogioj apud geografia priskribo laŭpopola de la tuta Mez-

oriento. Enestas eĉ restaĵoj el mitoj de antaŭaj popoloj, kiujn oni eble ne plu plene komprenis sed tamen pro ilia aĝo ne emis forĵeti : ekz. Gen 6:1-4.

Sed - kaj tio estas la ĉefa diferenco inter la Biblio kaj la postlasaĵo literatura de la helenoj kaj romianoj, por nomi nur du malnovajn popolojn - ĉe tio superregis ne la kriterio literatura, sed la religia. Kaj, kiel dirite, grandparte oni la tekstojn unue reverkis por adapti ĝin al la nova uzo, al la nova celo, tiel ŝanĝante foje la literaturan formon. Ĉar poemo enmetita en proza teksto efikas ja tute alia ol memstare... (Nom.22-24)

Do, fakte oni aŭdace povas aserti, ke literature la Biblio ne ekzistas : ĝi ja estas krestomatio el literaturo, sed ne plu efikas kiel literatura verkaro, sed kiel religia normo por popolo.

Tamen, pliposte, ĉefe pere de multege da tradukoj, la Biblio refariĝis literaturo. La junajn lingvojn de Eŭropo ĝi profunde influis, proverbojn ĝi liveris (eĉ al la Esperanta Proverbaro !), parolturnojn ĝi sankciis, dirmanierojn eĉ plej vulgare popularajn ĝi formis.

Pri la nuna nederlanda literatura lingvo oni eĉ povas aserti, ke certasence naskis ĝin la bibliotraduko nomata Statenvertaling el la 17-a jarcento. Ĉar ja jam jarcentojn ekzistis nederlanda literaturo (ekde la 12-a jarcento !), sed tamen, tiu nova (ne unua !) traduko de la Biblio tiom ŝanĝis la aspekton de la vort-elekto, de la sintakso kaj foje eĉ gramatikajn detalojn (ekz. ĝi rekte influis la personajn pronomojn), ke depost tiu traduko la nederlanda literatura lingvo estis stile kaj forme formita de ĝi. Kaj io tia, se eĉ ne ĉiam samgrade, okazis ĉe pluraj aliaj eŭropaj nacilingvoj.

Nuntempe, por multaj la Biblio ne plu havas religian signifon. Niaepoke ja multaj homoj ne plu estas anoj de iu ajn eklezio aŭ religio (certe en okcidenta Eŭropo). Tamen por pluraj restas plu utile pristudi kaj legi la Biblion : ĝuste pro la profunda influo, kiun ĝi havis sur la disvolviĝo de la naciaj literaturoj.

Ĉar apud la klasikaj - helena kaj romia - literaturoj, precipe la bibliaj tekstoj liveris la ekzemplojn, laŭ kiuj ekverkis la nacilingvaj literaturistoj - minimume ĝis en la 19-a jarcento -. Kiu volas kompreni la eŭropan kulturon eĉ nur supraĵe, tiu ne povas ne legi la Biblion !

Gerrit Berveling, Nederlando

Minimuma bibliogr. : VON RAD (Gerhard). - *Theologie des Alten Testaments*. - 2 vol., München, 1978/1980.

LA BIBLIO EN JURO KAJ POLITIKO EN LA ŜTATO ISRAELO

"La celo estas konstrui altan civilizacion firme fonditan sur rigora juda etiko." (Chaim Weizmann)¹

Multe estas skribita pri la signifo de la lando Israelo en la Biblio kaj en la juda tradicio, kaj pri la sankteco de la lando kaj de ĝia ĉefurbo Jerusalemo². La inversa demando pri la signifo de la Biblio en la lando estas multe malpli traktata. La rolo de la religioj, do ĉefe la juda religio, en la nova ŝtato estas tamen sufiĉe ofta temo³. Mi devas ĉi tie klarigi, ke tio estas temo nek fine nek precize difinita. kontraŭe ĝi estas sufiĉe konfuza afero, kiu estas ofte diskutata el plej diversaj vidpunktoj. La rolo de la Biblio kaj de la religio en la nova ŝtato Israelo troviĝas ankoraŭ en evolua fazo.

Israelo fariĝis denove ŝtato la 14-an de majo 1948, kiam David Ben-Gurion proklamis la novan ŝtaton en Tel-Aviv. Tiu proklamo estis farita pro la evoluo en la internacia politiko kaj post la voĉdono en Unuiĝintaj Nacioj pri partigo de Palestino, sub brita mandato, en unu araba kaj unu juda ŝtatoj⁴. Antaŭ la proklamo oni parolis pri la jeŝuvo (*jeŝuv*, sidejo) en Palestino. La malnova jeŝuvo en Jerusalemo kaj en kelkaj aliaj sanktaj urboj kiel Cfat (Sefat), Tveria (Tiberias) kaj Hevron (Hebron) konsistis ĉefe el tre ortodoksaj judoj kiuj loĝis tie dum jarcentoj, kaj la nova jeŝuvo konsistis el enmigrintoj venintaj en kelkaj ondoj ekde la fino de la 19-a jarcento. Estis la nova jeŝuvo kiu plej aktivis politike kaj kiu fariĝis superreganta.

Kiam la ŝtato Israelo ekestis, la jeŝuvo nombris ĉirkaŭ 650 000 homoj (dum la tempo de Moseo, simila nombro estis liberigita - simbola koincido). Tiu nombro rapide pligrandiĝis pro enmigrado de preskaŭ miliono da judoj el arabaj kaj orientaj landoj. Hodiaŭ oni ankaŭ havas trian grupon, nome la generacioj kiuj naskiĝis en la lando - la tiel nomataj *sabras* (judaj indiĝenoj). Religie oni diferencigas en du ĉefaj tradicioj, ambaŭ kun propra ĉefrabeno, nome la sefarda (hispana) kaj la aŝkenaza (germana). Ĉiuj aparte ampleksas ĉirkaŭ duonon de la loĝantoj (dum la turka periodo estis nur sefarda ĉefrabeno tiel nomata *Riŝon-le-Cion*).

Alia popolgrupo estas la kristanoj, kiuj loĝas ĉefe en Jerusalemo, Bet-Leĥem kaj en Galileo. Ili apartenas al tre multaj diversaj eklezioj. Oni kalkulas, ke ekzistas ĉirkaŭ 95 000 kristanoj en Israelo kune kun Jerusalemo (unuigita). Ankoraŭ 30 000 kristanoj vivas en la distriktoj Judio, Samario kaj Gaza (la okupataj teritorioj). Ili apartenas al pli ol 50 diversaj eklezioj, se oni

LA BIBLIO EN JURO KAJ POLITIKO EN LA ŜTATO ISRAELO

kalkulas ankaŭ la malgrandajn grupojn. La tri ĉefaj eklezioj estas la greka, la armena kaj la latina⁵.

La islamanoj neniam sentis iun neceson organizi sin dum la periodo de la turkoj. Post la sendependeco de Israelo multaj islamaj religiaj gvidantoj fuĝis kaj oni devis denove starigi islamajn tribunalojn en Jafo, Akko, Ĥajfa kaj Tajiba (kun la helpo de Ŝeikh Tahir al-Tabari, la sola kadio kiu restis). Antaŭ 1967 Jerusalema apartenis al la tribunalo de Jafo, kaj post la reunuiĝo estas duoblaj islamaj tribunaloj por Jerusalema, situacio kiu ankoarù ne trovis kontentigan solvon.

Kvara memstara grupo en Israelo estas la druzoj, kiuj nombras ĉirkaŭ 40 000, estante iomete pli ol 10 procento de la druzoj en la mondo. En 1957, ili estis rekonataj kiel aparta religia grupo, kaj en 1962 specialaj religiaj druzaj tribunaloj estis starigitaj.

Kvina religio en Israelo estas la bahaa, kiu havas sian mondan centron en Ĥajfa kaj Akko. Tamen nur malgranda grupo de bahaanoj loĝas en Israelo. Ili favoras cionismon kaj afable salutis la starigon de la Ŝtato Israelo (ĉar iliaj sanktaj skriboj priskribas la revenon de la judoj al Palestino).

Inter ĉiuj tiuj religiaj grupoj, la Biblio estas sankta skribo unuavide nur por la judoj (la Torao, la Profetoj kaj la Skriboj) kaj por la kristanoj (Malnova kaj nova testamento)⁶. La kristanoj estas ĉiuj regataj de eksterlandaj centroj. Kutime ili dividiĝas en du grupoj, unu kiu favoras Israelon kaj la judan ŝtaton, kaj alia kiu favoras Palestinon kaj la araban regadon. La esenco de la kristana religio estas malpli rekte ligita al politiko ol la juda kaj islama religioj, kaj krome la spertoj de la kristanoj dum jarcentoj de turka regado instruis ilin ne tro sin miksi en la politikaj aferoj. Iomete tiu sinteno ankoraŭ daŭras.

Plej gravas la rolo de la juda religio en la juro kaj politiko de Israelo. La rolo de la Biblio en la juda religio estas tre vasta kaj kompleksa problemoj kaj ĝi ne fariĝas pli facila pro la apero de multaj modernaj fluoj sur la religia scenejo de Israelo⁷.

Lasu nin tiel komenci per mallonga klarigo pri la juda religio. Oni diferencigas inter diversaj religiaj skribaĵoj laŭ ilia sankteco kaj kune prenita ili konsistigas tre evoluantan leĝan sistemon por la komunumo kaj por la individuo. En la centro staras la sankta Torao. Ĝi estas la Leĝo aŭ la Instruo (la du ĉefaj signifoj de la vorto) kiu venis rekte de la ĉielo per la mano de Moseo. La postan historian evoluon oni priskribas en la profetaj libroj. La Antaŭaj Profetoj estas la libroj, kiuj en la kristana mondo estas

EVANGELIAJ KAJEROJ

nomitaj historiaj kaj la Postaj Profetoj estas ĉiuj tiuj profetoj kiuj havas propran libron. Al tiuj du grupoj de skriboj oni aldonas la Skribaĵojn, kies ĉefa verko estas la Psalmaro kaj kiu ankaŭ entenas la libron de Daniel kaj la Kronikojn kaj la t.n. kvin rulaĵojn kaj kelkajn pliajn. La nomo de la tuto de tiuj tri partoj kune estas mallongigita *Tanakh* (*Tora, Neviim, Kotvim*), aŭ kiel Martin Buber nomis ĝin la Hebrea Biblio⁸. Ĝi estas la tiel nomata skribita instruo. Sed laŭ juda tradicio, samtempe kun la skriba instruo estis donita ankaŭ buŝa instruo por klarigi la skriban. Tiu buŝa instruo evoluis dum jarcentoj en la Miŝnao, en la Talmudo, kaj en la tre vasta rabena literaturo. Ankaŭ tiuj skriboj estas konsiderataj kiel sanktaj, priskribante kaj klarigante detalojn en la Torao kaj en la aliaj libroj. Ili konsistigas kune tre evoluantan komplikan leĝan sistemon nomitan la *Halakha*, termino kiu povus esti tradukita en Esperanto kiel agomaniero aŭ ĝusta konduto. Tiu rabena literaturo plugas ege vastan terenon kaj la rabenoj havas opiniojn pri tre multaj aferoj, preskaŭ pri ĉiuj aspektoj de la vivo ekde la naskiĝo ĝis la morto, kaj eĉ pri tute modernaj aferoj kiel elektro, medicina scienco, k.t.p. Ankaŭ pri komunumaj kaj sociaj aferoj kaj kompreneble ankaŭ pri demokratio ekzistas halakhao devenanta de la originaj judaj fontoj, t.e. la Biblio aŭ pli precipe de la sankta Torao. Tradicie tiu halakhao estas la ĉefa distingilo inter judismo kaj aliaj religioj⁹, kvankam ekzistas grupoj interne de judismo (ekz. la reforma movado en Germanujo kaj en Usono) kaj ekstere (ĉefe la samarianoj kaj la karaitoj¹⁰) kiuj ne akceptas ĝin. Halakhao estas hodiaŭ la reganta principo de la ortodoksa judismo, kiu estas la sola oficiala reprezentanto de 'vera' judismo en Israelo ekde la leĝoj pri religiaj tribunaloj de 1952, 1953 kaj 1955 kaj fine la Ĉefa Rabena Komitata Leĝo de 1980. Ofta diskuto en nuntempa Israelo estas pri la rilato inter la religia leĝo kaj la ŝtataj leĝoj, kaj oni aŭdas ankaŭ multajn voĉojn, kiuj postulas rekonon de la aliaj grupoj kiuj jam forlasis la halakhaon. Ekzistas eĉ grupoj, kiuj volas enkonduki ian tipon de 'sekulara homarana' religio¹¹ interne de judismo. Aliaj diras, ke la ĉefa disputo estas inter modernismo kaj tradiciaj 'ŝtonigitaj' vivmanieroj, aŭ, ke la tuta kverelo estas inter socialismo kaj kapitalismo.

La ortodoksa halakhao tamen ne ludis gvidan rolon en la starigo de la moderna Israelo. La hodiaŭa ŝtato estas rekta rezulto de la klopodoj de la cionistoj kaj en la cionisma movado regis socialistaj liberalaj tendencoj. Ben Gurion, kiu fariĝis la gvidanto de la movado en Israelo, estis membro de la marksisma *Poalei Cion* - partio (laboristoj de Cion). Dum multaj jaroj, li, kune kun Chaim

LA BIBLIO EN JURO KAJ POLITIKO EN LA ŜTATO ISRAELO

Weizmann (*Ĥajim vajzman*), gvidis la cionisman movadon. Ben Gurion estis krome la ĝenerala sekretario de la fortega *Histadrut* (sindikato) en Israelo. Dum la malfacilaj jaroj de la fino de la dua mondmilito, li fariĝis la ĉefa gvidanto de la jeŝuvo kaj poste la unua arkitekto de la nova ŝtato. Se oni studas la Deklaracion pri Sendependeco¹² oni konstatas, ke ĝi firme klarigas, ke la juda popolo naskiĝis kaj originis en la lando Israelo kaj, ke ĝi tie ricevis sian spiritan, religian kaj ŝtatan formon kaj, ke en tiu ĉi sama lando evoluis multaj homaranismaj (humanismaj) ideoj kaj de tie "...heredigis al la tuta mondo la libron de ĉiuj libroj, tiun eternan libron." Poste oni ne plu mencias la Biblion sed daŭrigas, parolante ĉefe pri la 'historia ligo' inter la juda popolo kaj la lando. La juda karaktero de la nova ŝtato montriĝas ankaŭ per tio ke estis "... (la) reprezentantoj de la hebrea jeŝuvo kaj de la cionisma movado ..." kiuj kunvenis por la grava celo "... starigo de juda ŝtato en la lando Israelo" (*Erec Israel*, ĝia tradicia nomo). La deklaro mencias krome, ke la nova ŝtato estas malfermata por juda enmigrado kaj ke ĝi estas bazita sur la altaj moralaj principoj "... libero, justeco kaj paco laŭ la vizioj de la israelaj profetoj." Oni adoptis ne nur tiujn judajn principojn sed ankaŭ ĉiujn modernajn liberecojn kaj egalecojn, kiuj hodiaŭ karakterizas multajn okcidentajn demokratiojn. La deklaron oni konkludis per la famaj vortoj "... firme certaj pri la Roko de Israelo ..." Tiu ĉi formulo fakte estis kompromiso inter la religiuloj kiuj volis havi la nomon de Dio en la deklaro, kaj la kontraŭreligiuloj kiuj entute ne volis mencii Dion.

La vorto roko (hebree *cur*) estas ofta priskribo de Dio en la Biblio, ekz. en la lasta kanto de Moseo, kie li kantas *Ha-Cur tamim paalo* (Li estas la Roko; perfekta estas Liaj faroj - Read 32:4). Sed la vorto *cur* havas ankaŭ aliajn signifojn. En Jes 51:1 ĝi signifas la pragepatrojn de la juda nacio, Abraham kaj Sara. Ni vidas ankaŭ, ke kiam Dio volas montri al Moseo sian grandecon, Li petis lin starigi sur la *cur*, la Roko (El 33:21-22).

Tre parenca vorto estas *cor*, kiu estas uzata por fortranĉi prepuciojn, kiel ekz. Cipora faris al la filo de Moseo (El 4:25) kaj Josuo faris al la tuta popolo en la "Monto de prepucioj" (Jos 5:2-3). Tiu ĉi vorto *cur* estas la sola aludo al Dio en la deklaro pri sendependeco, kaj eble tiu ĉi rito de cirkumcido estas la sola kiun eĉ la plej kontraŭ-religia judo ankoraŭ faras.

La ceteraj reguloj kiuj estis tiam enkondukita en la leĝo ne rilatas al la Biblio, sed oni ĉie komencis uzi leĝan sistemon iomete simila al la brita sistemo (ekz. estas la malpermesoj, kiuj devas esti skribitaj, kaj ne la permesoj). El tiuj oni revokis la

EVANGELIAJ KAJEROJ

tiel nomatan blankan paperon de 1939, kiu ege limigis la enmigron al Israelo. Ĉiuj aliaj leĝoj oni nur tradukis hebrean fare de la Ministerio de Justico, kaj daŭrigis kiel antaŭe.

En la leĝa sistemo de Israelo, oni ankoraŭ trovas tavolojn de ĉiuj antaŭaj historiaj periodoj. Dum la turka periodo oni uzis turkan tradukon de araba-islama leĝo kune kun speciala turka leĝo por la tero. Kiam la moderniĝo alvenis, oni adoptis multon el la franca leĝa sistemo, interalie la kodon pri komerco kaj krimo, kaj ankaŭ la civilan proceduran kodon. por la multaj ne-islamaj loĝantoj, oni permesis la uzon de iliaj propraj religiaj leĝaroj por personaj aferoj, tiel ke la judoj uzis judajn leĝojn, kristanoj uzis kristanajn leĝojn, k.t.p. Fakte tio estis sistemo, kiu sufiĉe bone funkciis en la multpopola Mezoriento dum jarcentoj. Kiam la britoj fariĝis regantoj, ili konservis grandparte tiun turkan sistemon nomante ĝin Otomana leĝo. Kune kun tio, ili enkondukis britan leĝon, kaj ankaŭ la rutinaj decidoj de la Alta protektanto (*High Commissioner*), fariĝis parto de la tiama leĝo. Poste kiam Israelo fariĝis ŝtato, oni transprenis tiun tutan leĝan sistemon sub la nomo Leĝo de Palestino. Aldone oni tuj komencis evoluigi israelajn leĝojn, kiuj estis deciditaj de la parlamento.

Nenia unueca leĝaro (*Corpus*) ankoraŭ ekzistas en Israelo. Ĉiu nova leĝo enkondukita fare de la parlamento nuligas aŭtomate ĉiujn antaŭajn leĝojn, kiuj pritraktas la saman aferon. Aldone al tio oni havas la militajn regulojn, kiuj, kune kun la jordana leĝo, funkcias en la regionoj preter la 'verda limo' por ĉiuj personoj, kiuj portas jordanajn pasportojn. Oni facile konkludas, ke la leĝa sistemo estas tre komplika. En personaj aferoj tamen, funkcias la malnova turka sistemo kaj oni uzas nur la diversajn religiajn leĝarojn. Rajto apelacii tamen ekzistas, kaj kelkfoje la Supera Kortumo iomete miksas sin en la decidoj.

Oni povas konstati tri tendencojn en la posta evoluo de la leĝa sistemo.

- 1) La daŭrigo de la anglo-saksa tradicio.
- 2) La uzo de eŭropa kontinenta sistemo por civitanaj leĝoj kaj kodoj.
- 3) Ke la juda leĝo fariĝas pli kaj pli grava en la jura sistemo. Pri la lasta tendenco, la plej notinda influo estas la ofta uzo de juda leĝa terminologio en la evoluo de la leĝaro.

Kiel ni vidis supre, la ŝtato estis fondita fare de homoj kun socialisma kaj liberala inklinoj. Ĝi estis ekde la komenco modelita laŭ la okcidentaj demokratioj kaj ĉiuj anglo-usonaj ideoj pri individua libereco fariĝis parto de la nesribita tradicio de

LA BIBLIO EN JURO KAJ POLITIKO EN LA ŜTATO ISRAELO

Israelo. Poste la ŝtato estis regata ĉefe de la laborpartioj (social-demokrataj) ĝis la venko de Menaĥem Begin en 1977.

Sed la laborpartioj nenie povis regi solaj. Ekestis en Israelo kunlaboro inter la religiaj kaj socialismaj partioj, kaj tiu kunlaboro daŭris dum multaj jaroj. Frue oni starigis Ministerion pri religiaj aferoj, kiu estis gvidata de ministroj el la religiaj partioj¹³. Por klarigi tiun kunlaboron, mi devas menci, ke la du plej grandaj religiaj partioj ambaŭ havas fratan laborpartion. Paralele kun la partio *Mizraĥi* ekzistas *Ha-Poel ha-Mizraĥi* (la laboristo Mizraĥi-a) kaj kune kun la partio *Agudat Israel* ekzistas *Poalei Agudat Israel* (Laboristoj de Agudat Israel). Tiuj religiaj laborpartioj nature kunlaboris kun la socialistoj kaj povis funkcii kiel ponto por pli ampleksa kunlaboro¹⁴.

Por kompreni la kontribuon de la religiaj partioj en la politika vivo de Israelo, ni devas studi ilian historion. Oni vidas, ke la religiuloj jam de longa tempo estis dividitaj en du ĉefaj grupoj. Unu grupo, kiu vidas en la cionismo la plenumon de la Diaj promesoj por la juda popolo, kaj kiu elektis vojon de kompromisoj por tiel partopreni aktive en la politika vivo de la Cionisma Movado kaj en Israelo. Tiuj religiaj cionistoj fondis en 1902 la frakcion *Mizraĥi* (el la vortoj *merkaz*, centro, kaj *ruĥani*, spirita) interne de la Cionisma Movado. En 1920 la Monda Cionisma Movado decidis ke *Mizraĥi* zorgos por ĉia religia edukado en la Lando de Israelo, kaj tiu sistemo daŭris ĝis la starigo de la nunaj ŝtataj religiaj lernejoj kaj edukejoj post la sendependeco. La plejparto de la mizraĥiaj lernejoj aliĝis al tiu sistemo. Estis *Mizraĥi* kiu, kune kun sia frata partio *Ha-Poel ha-Mizraĥi* (poste ili kuniĝis en Nacia Religia Partio), instigis al starigo de Ministerio pri religiaj Aferoj.

Alia grupo estas religiuloj kiuj ne volas kompromisi, kaj kiuj dubas pri la religia signifo de la tro politika movado nomita Cionismo. Ili opinias, ke juda ŝtato devas esti starigita sur la principoj de la *halakha*, ke la nuna ŝtato ne povas esti la lando promesita de Dio, kaj ke oni devas ankoraŭ longe atendi la alvenon de la Mesio. La religia partio *Agudat Israel* (Unuiĝo de Israelo) estis fondita en 1912 kaj en 1919 ĝi ekaktivis ankaŭ en Palestino. Ĝi fariĝis la partio por la manova jeŝuvo de religiaj judoj kaj tiu komunumo daŭre batalis kontraŭ la cionisma movado, malakceptante ke tiu ĉi sole reprezentu ĉiujn judojn en Palestino. Post la starigo de la ŝtato, *Agudat Israel* tamen partoprenis en la politika vivo, sed multaj ortodoksaj judoj elektis daŭrigi sian batalon kontraŭ la ŝtato, kiun ili opiniis kontraŭ-religia kaj abomena.

EVANGELIAJ KAJEROJ

Multaj tiaj grupoj ekzistas. En Jerusalemo aktivas, inter aliaj *Neturei Karta* (Gardantoj de la Urbo) kaj *Lemaan Geula Šlema* (Por plena nova vivo).

Post la sestaga milito komencis agi *Guš Emonim* (la Kredanta grupo), nova branĉo de la Nacia Religia Partio. Ĝi estis fondita kiel memstara grupo en februaro 1974 por daŭrigi la koloniigon de la okupataj teritorioj.

Dum la lastaj jaroj ekestis rapide nova religia partio, nome *Šas* (Sefardim Gardantoj), kiu estas partio malkompromisema sed tamen provante partopreni en la politika vivo. Ĝi konsistas ĉefe el religiaj orientaj judoj, kiuj estas konataj pro strikta ortodoksa vivmaniero sed samtempe granda toleremo.

La reveno de la juda popolo al la Sankta Lando kaj la revivigo de la hebrea lingvo estas por ĉiu religia aŭ ne-religia judo tre grava afero. Kutime oni parolas pri la tri sanktecoj de la juda religio: la sankteco de la juda popolo, la sankteco de la hebrea lingvo¹⁵ kaj la sankteco de la Lando Israelo. Ili ĉiuj estis elektitaj de Dio, la popolo el la homaro, la lingvo el laabela konfuzo kaj la lando el la tuta terglobo, por fariĝi sanktaj heredaĵoj. Pro tio, ke oni en moderna tempo sukcesis kombini tiujn tri sanktecojn, oni esperas multe el la proksima estonteco.

Unu el la spiritaĵoj gvidantoj dum la periodo de la jeŝuvo, kaj unu el la plej grandaj pensuloj de tiu generacio, estis la unua aŝkenaza ĉefrabeno en la Lando de Israel, Abraham Jizĥak Ha-Kohen Kook (persone li preferis la titolon 'rabeno' sen epiteto 'ĉef-'). Li ne estis kontenta pri la kontraŭ-religiaj tendencoj en la tiama juda socio en Palestino, sed tamen li vidis en la animoj de la pioniroj la fajreron de la dieco. Li provis dum kelke da tempo starigi politikan movadon por gardi la 'sanktecon' de la juda tradicio. Sian movadon li nomis "Standardo de Jerusalemo" kaj ĝi celis labori por "starigi la Snaktecon en ĝia plena signifo"¹⁶. En tiuj politikaj aferoj li tamen malsukcesis kaj lia movado ne vekis sufiĉan respondon kaj iom post iom ĉesis ekzisti. En ekonomiaj aferoj Rabeno Kook volis iri mezan vojon inter socialismo kaj kapitalismo, kies spiritojn li opiniis fremdaj al la judismo (almenaŭ la kapitalismon li opiniis fremda, la socialismo estis tro kontraŭreligia).

Israelo multe ŝuldas sian ekziston al Chaim Weizmann, la prezidanto de la Monda Cionisma Movado dum multaj jaroj, kaj la persono malantaŭ la deklaro de Balfour (*balfor*). Li tre respektis la religion sed opiniis, ke ĝi nur povus esti alta ilo por la privata konscienco, kaj ke ĝi ne taŭgus por konstrui ŝtaton¹⁷. Li estas

LA BIBLIO EN JURO KAJ POLITIKO EN LA ŜTATO ISRAELO

ekzemplo de tradicia judo kiu tamen volis modernigon de la socio en Israelo.

Alia konata persono de tiu antaŭ-ŝtata periodo estis Martin Buber, sufiĉe hejma ankaŭ en kristanaj teologiaj debatoj. Li multe agis por revivigi la spiritan flankon de la Cionisma Movado.

Dum kelkaj jaroj li estis redaktoro de la organo de la cionistoj *Die Welt*, sed poste li transiris al la opozicio kontraŭ Herzl. Jam en 1919 li ellaboris sian ideon pri la Sankta Vojo (*Der Heilige Weg*), kiu estis klarigo pri la spirita karaktero de la cionismo, kiu diferencigas ĝin de ĉiuj aliaj naciaj movadoj. En postaj skriboj en Israelo, li multe cerbumis pri politikaj demandoj kaj li evoluigis la Teo-Politikan principon, laŭ kiu li opiniis ke Israelo devus ordigi sian vivon. Kun tiu termino li volis diri ion tute alian ol la kutime uzata termino 'teokratia regado'¹⁸. Tiu lasta signifis regado de la pastraro aŭ rabenoj. Lia termino signifis la regadon de Dio mem. Buber multe reesploris la Bibliion kaj li ne akceptis senkritike la ortodoksan pensmanieron.

Kio estis la rilato inter la unua ĉefministro kaj plej granda viziulo por la ŝtato Israelo, David Ben-Gurion, kaj la Biblio? Li estas bonega ekzemplo de nova tipo de judo, kiu kreskis sur la Palestina tero, kaj kiu trovis siajn radikojn rekte en la Biblio¹⁹. Li ne volis vivi mem laŭ la halakhao sed private li firme kredis je Dio, kaj dum sia tuta vivo li konsideris la Bibliion kiel sian ĉefan gvidilon. Ĉiam troviĝis biblio sur lia skribotablo, kaj post kiam li fariĝis ĉefministro li eĉ komencis gvidi rondon por privataj Bibliostudoj²⁰. En la praktika politiko li estis tre fleksebla, kaj li forte komprenis la neceson gardi la unuecon de la juda popolo, kaj tiel li enkondukis koŝeran manĝon (manĝo preparita laŭ la religiaj reguloj) en ĉiuj ŝtataj ejoj kaj ankaŭ en la armeo. Li ankaŭ faris multajn pliajn praktikajn kompromisojn kun la religiaj partioj.

La moderna israela ŝtato, rilate al la sferoj de juro kaj politiko, ne estas rekte ligita kun religio aŭ kun la Biblio, sed tamen tiuj aferoj estas multloke interplektitaj en la teksaĵo de la socio. Rekte okupita pri religiaj aferoj estas nur la Ministerio pri Religiaj Aferoj, kaj ĝi zorgas pri la rilatoj inter la diversaj religiaj grupoj kaj institucioj, kiuj sufiĉe abundas en Israelo, kaj ĝi gardas la diversajn antaŭŝtatojn (*statu quo*), pri kiuj oni interkonsentis dum diversaj fazoj de la historia evoluo de la regiono²¹.

EVANGELIAJ KAJEROJ

Oni estimas, ke triono de la juda loĝantaro en Israelo estas religiuloj, kaj sepono regule voĉdonas por iu el la religiaj partioj, kiam temas pri elekto al la parlamento. Multaj ritoj kiel la cirkumcido, edziĝo kaj entombigo estas sekvataj de preskaŭ ĉiuj. Ne-religia geedziĝo, ekz., ne ekzistas en Israelo. Estas tiu sepono, kiu ĉiam voĉdonas por religiaj partioj, kiu gardas la religian vivon en Israelo. Ĉar ankaŭ en ĉiuj aliaj partioj troviĝas multaj religiuloj, oni povas antaŭvidi daŭran influon de la Biblio en Israelo.

Jeremi Gishron, Israelo

notoj

- 1) WEIZMANN (Chaim). - *Trial and error*. - New-York, 1949. - p. 465.
- 2) Propradire tio estas la PLEJ GRANDA signifo de la Biblio hodiaŭ en Israelo, nome la uzado de ĝi por subteni la rajton de la juda popolo al la lando de Israelo.
- 3) La vorto religio estas iomete problemata en hebrea lingvo. Ĝi estas koncepto fremda al la juda tradicio, kaj estis enkondukita nur fare de la reformistoj kaj asimilistoj. Rabeno Samson Raphael Hirsch (*rafael hirsch*) skribis: "Ni devas konkludi ke Torao estas nek 'religio', nek 'teologio', nek 'Diservo'. La Torao de Dio estas TORAO, la semo, kiun Dio semis en la mezo de unu popolo tiel ke kresku el ĝi ĉiuj detalaj karakterizoj de tiu popolo." (*Iggerot Zafon, In the Cycles of the Year*).
- 4) Tiu evoluo komenciĝis kun la Cionismo kaj daŭris kun la Balfour-a deklaro. Kiam oni voĉdonis en UN la 29-an de novembro pri la rezolucio pri divido, ĝi estis akceptita de 33 voĉoj por, 13 kontraŭ (10 rezignis).
- 5) La plej malnova estas la Greka Ortodoksa eklezio, kiu devenas de la tempo de S. Cirilo, episkopo de Jerusalema. La plej nombra estas la Greka Katolika eklezio kun 40 000 membroj.
- La moderna kristana agado devenas de la mezo de la 19-a jarcento. Ankaŭ

multaj protestantaj eklezioj aktivas de tiam en la urbo.

6) La Malnova Testamento de la Grekaj Ortodoksanoj kaj de la Rom-Katolikoj ampleksas ankaŭ la apokrifajn skribaĵojn.

7) Rabeno Moshe Chaim Weiler (*moŝe Hajim veiler*) skribis: "La fakto, ke ne ekzistas iu konvena hebrea termino por la vorto pluralismo, emfazas la fakton, ke la koncepto estas importita, kaj plue, ke ĝi ankoraŭ ne enradikiĝis en la konsciencojn kaj parolmanierojn de la israelanoj. Tio, tamen, ne malgrandigas la neceson kompreni kaj solvi tiun tre gravan demandon, kiu fariĝas ĉiam pli urĝa kaj pli kompleksa." (*The status of religious pluralism in Israel*. - Jerusalem. - p. 40 - parolado la 2-an de septembro 1979: *On religious pluralism in Israel*).

8) Tanakh ne estas la sola hebrea nomo por la Biblio. La plej malnova termino estis *Ha-Sfarim* kion oni trovas jam en Dan 9:2 *Binoti besfarim* (mi rimarkis en la libroj). Tiu estas ofta termino en la talmudo. Poste la grekparolantaj judoj tradukis ĝin en la greka kiel *Ta Biblia*. Alia ofta nomo en talmudo estas *Mikra*, vorto kiu aperas en Neĥ 8:8 *Vejavinu bamikra* (ke oni komprenu la legataĵon). En la islama vorto *Qur'an* (korano) oni

LA BIBLIO EN JURO KAJ POLITIKO EN LA ŜTATO ISRAELO

trovas ekzakte la saman radikon K-R-A, kiu estas de komuna semida origino. Ni povas ankaŭ noti ke Torao estas ofta nomo por la Biblio eĉ en la NT, ekz. Joh 10:34, kie ĝi signifas la psalmaron.

9) Prof. Ephraim Urbach (efraĵim urbaĥ) skribis:

"Ni kunhavas teologiajn, etikajn kaj moralajn valorojn kun la kredantoj de ĉiuj religiaj komunumoj inter la nacioj, sed estas la hakhao kiu distingas nin aparte."

(*The Status of religious pluralism in Israel*. - Jerusalem. - p. 17)

10) La samarianoj estas miksevena popolo en Samario kiu konvertiĝis (sed ne plene) al judismo. Karaitoj estas juda sekto de la 8-a jarcento. Ili kontraŭas la rabenan tradicion.

11) Per sekulara oni volas diri ne profana, sed laŭ la signifo de la latina *saeculum* - la tempa mondo (kp. sekularaj pastroj en P.I.V.).

12) *Ha-Haŝra al hakamat medinat Israel*, Iton Raŝai 5708/1948, p. 1.
13) En la jaro 1953 konsentis la Laborpartio dividi la sferojn de respondeco kun Misraĥi, tiel ke la Laborpartio sin okupiĝos pri planado, financoj, eksteraj rilatoj, defendo kaj similaj aferoj, kaj Misraĥi pri internaj aferoj, religiaj aferoj kaj poste ankaŭ pri edukaj aferoj.

14) Ekzistas en la Torao socia elemento, kiu oni malofte trovas en aliaj religioj. Mi pensas ke ne estas hazardo, ke ekzemple Karl Marx (*marks*) kaj multaj aliaj (eble 75 %) fruaj socialistoj estis de juda deveno. Mi nur citas mallongan ekzemplon:

"Nur la profeta socialismo de la judismo povas garantii absolutan justecon sen egoismaj interesoj. Ĉar ĝi estas bazita sur kredo kaj sur la sankteco de la vivo. Nur kredanto je Dio kaj je la justeco de Lia Torao ne faros maljustaĵojn, eĉ en la plej sekretaj ĉambroj li abomenas ekspluati aliajn." (HEL OR, YOM-TOV L. - *The Spiritual-ethical renaissance of the people of Israel*. - Jerusalem, 1977. - p.

154)

15) La hodiaŭa parolata hebrea lingvo reiras rekte al la lingvo de la Biblio. Estis tiu lingvo, kiu ĉefe daŭris vivi kiel literatura kaj sankta lingvo. Ĝi estis antaŭe uzata ĉiutage en la religiaj preĝoj, kaj fakte estis tiu obstina uzo de la hebrea lingvo por ĉiuj religiaj aferoj, kiu gardis la hebrean nacion de disigo. Kiam oni komencis uzi la lingvon por ĉiuj aferoj de la vivo, oni prenis tiun bibliajn hebrean lingvon kaj modernigis ĝin.

16) JARON (Cvi). - *Mišnato ŝel Harav Kook* (The Philosophy of Rabbi Kook). - Jerusalem, 1983. - p. 260. Vidu ankaŭ: KOOK (A. I.). - *The Banner of Jerusalem*. - An open letter by Rabbi A. I. Kook. - London, 1918.

19) Berl Katznelson, kiu estas konsiderata kiel la plej granda pensulo kaj ĉef-ideologo de la socialisma movado en Israelo, skribis:

"La hebrea lingvo ludis gravan rolon, ne sole en la Cionisma Movado, sed ankaŭ en la socialisma movado. Estas preskaŭ neeble priskribi la judan socialisman movadon, eĉ tiu parto de ĝi kiu neis Israelon kaj paŝis sur la vojo de asimilado, sen la tradicio de la Biblio." (*Imrot (Sayings)*, vol. XI, p. 32)

17) WEIZMANN (Chaim). - *Trial and Error*. - New York, 1949. - p. 464.

18) DIAMON (Malcolm L.), BUBER (Martin). - *Jewish existentialist*. - New York, 1960. - p. 98.

20) Ankaŭ Ben-Gurion rekonis la grandan spiritan heredaĵon de la juda popolo:

"Ni ne estos veraj al ni mem, se ni turnas nian dorson al la granda etika heredaĵo, kiu niaj profetoj kaj grandaj saĝuloj kaj hodiaŭaj instruistoj donis al ni. ... Ni estas konstruantaj la ŝtaton de Israelo al profeta vizio kaj esperoj Mesiaj - por esti ekzemplo kaj gvido por la homaro." (*The Spiritual and pioneering goals of Israel, en Government Annual*, 1952)

EVANGELIAJ KAJEROJ

21) Eble la plej konata antaŭstato estas tiu, kiu koncernas la statusojn de la diversaj sanktaj lokoj. Ĝi devenas de la turka tempo kaj estas

hodiaŭ malfacile difini ĝiajn diversajn rajtojn laŭ modernaj juraj principoj.

Bibliografio

ALBREKTSON (B.), RINGGREN (H.). - *En Bok om gamla testamentet*. - Lund, 1970.

DIAMOND (Malcolm L.). - *Martin Buber - Jewish existentialist*. - New York, 1960.

EBAN (Abba). - *En Självbiografi*. - Stockholm, 1978.

ELON (Amos). - *The Israelis - founders and sons*. - Jerusalem, 1981.

HEL-OR (Yom-Tov L.). - *The Spiritual-ethical renaissance of the people of Israel*. - Jerusalem, 1977.

JARON (Cvi). - *Mišnato shel Harav Kook*. - Jerusalem, 1983.

Jerusalem - Aspects of law. - Discussion Paper n° 3 (The Jerusalem Institute for Israel Studies), Jerusalem, 1983.

SCHNALL (David J.). - *Radical dissent in contemporary Israeli politics: Cracks in the wall*. - New York, 1979.

The Status of religious pluralism in Israel. - (Symposium 1-st of February 1981) Reprint of The American Jewish Committee, Jerusalem, 1981.

STEWART (Desmond). - *Theodor Herzl - artist and politician*. - London, 1974.

WEIZMANN (Chaim). - *Trial and error, the autobiography of Chaim Weizmann*. - New York, 1949.

N-ro	Titolo	Prezo en DM	N-ro	Titolo	Prezo en DM
1	Pri la homa laboro; Johano Paŭlo II. Tradukis el la pola Tyburcjusz Tyblewski. Meßkirch 1985, 90 p., 21 cm. En sia multelegata encikliko la Papo aplikas la eklezian instruon al la nuntempa vivo substrekkante la homan dignon de la laboro.	15.-	5	Kantfolioj "Nia kantoro" I, II, III, IV. Kvarpaĝaj folioj kun popolkantoj el la germana kaj el aliaj landoj kun notoj kaj gitar-signoj.	1 folio: 1.- 10 folioj kun kovrilo: 5.- 100 " 20.-
2	Pri la taskoj de la kristana familio en la nuntempa mondo; Johano Paŭlo II. Tradukis el la pola T. Tyblewski. Meßkirch 1985, 90 p., 21 cm.	18.-	6	Wörterkartei der tausend häufigsten Wörter (Silparo de la mil plej oftaj vortoj). Deutsch-Esperanto/Esperanto-Deutsch (Germane-esperante/esperante-germane).	18.-
3	Esperanto-tradukoj de la Sankta Biblio ekde Zamenhof ĝis la nova Ekumena Biblio tradukita de la Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj (IABO). Prelegoj de d-ro Angelo Duranti, Ravenna Meßkirch 1985, 48 p., 21 cm.	5.-	7	Postkarto kun bildo kaj priskribo de Meßkirch / sudgermana urbeto.	1 karto: -.50 10 kartoj: 3.- 100 kartoj: 20.-
4	Eta Sabat-Dimanca Breviero. Meßkirch 1985, 60 p., 21 cm. Psalmoj kaj preĝoj kun muziknotoj por gregoria kantado dum Semajnfino laŭ la oficiala preĝordo. Kun bildoj de Habdank. (atentu n-ro 10).	18.-	8	Duobla karto kun bildo de la Meßkircha kirklaco ĉirkaŭ la 1800ajaro.	1 karto: -.50 10 kartoj: 3.- 100 kartoj: 20.-
			9	Kasedo kun prelego de d-ro W. Bormann: La evoluo de Esperanto - ĉu libera aŭ direktita. Konstanz 30.9.1984. Meßkirch 1985, C 60.	7.-
			10	Kasedo kun Horoj de la Breviero; Meßkirch 1985, C 60, Ekzemplaro de kantado laŭ n-ro 4.	7.-

Tiuj titoloj estas nun haveblaj.
Eldonanto: Bernhard Eichkorn.

Interesiĝantoj el landoj kun devizaj malfacilaĵoj demandu pri specialaj eblecoj.
Aĉetantoj de 3 ekzempleroj ricevas rabaton de 33%. Al la prezoj estos alkalkulataj la send-kostoj.

Armin Gmeiner
Ehnrled-Hof
D-7790 Meßkirch

EVANGELIAJ KAJEROJ

LA BIBLIAJ SOCIETOJ

KIAL ? KIAM ? KIEL ?

En la unua jarcento, skribistoj faris kopiojn de la Torao, kaj de la aliaj partoj de la hebrea Biblio. En la dua kaj tria jarcentoj, kelkaj kristanaj pastroj faris siajn proprajn tradukoj de la Nova Testamento, el la greka en la latinan lingvon.

En la unuaj jaroj de la kvina jarcento, Hieronymus (*hieronymus*, Hieronimo) eldonis la tiel nomatan "Vulgaton." Ĝi estis Biblio en la vulgara, aŭ ordinara, latina lingvo. Tio fariĝis la oficiala Biblio de la eklezio en okcidenta Eŭropo, kaj dum mil jaroj, monaĥoj, per siaj propraj manoj, faris kopiojn de ĝi.

En la dek-kvina kaj dek-sesa jarcentoj, presistoj eldonis la Biblion, ne nur latine (1456), sed ankaŭ germane (1466), itale (1471), katalune (1478), ĉeĥe (1488), greke (1517), nederlande (1522), france (1530), angle (1535), svede (1541), dane (1550), hispane (1553), pole (1561), slave (1581), slovene (1584), kimre (1588), hungare kaj islande (1590), kaj hebree (1599). Bedaŭrinde, la prezo ofte estis alta, kaj biblioj ne estis facile haveblaj.

Inter 1804 kaj 1816, multe da societoj fondiĝis, kun unika celo, presigi kaj disvastigi la Vorton de Dio, je tia prezo, kiun la aĉetontoj povos pagi. Tiu laboro komenciĝis eĉ pli frue en Hindujo, kie William Carey (*ŭiljam keĵri*) kaj liaj kolegoj, Joshua Marshman kaj William Ward, tradukis la Biblion en multe da lingvoj. Ili eldonis unue la Novan Testamenton, sed ili plej ofte nomis ĝin "la Biblio - kvina parto." En dek unu lingvoj, partoj de la Malnova Testamento aperis poste. En dek ok lingvoj, ili eldonis nur la Novan Testamenton, kaj en aliaj kvin lingvoj, ili aperigis almenaŭ unu evangelion. Ili helpis ankaŭ pri la traduko de ne-hindaj lingvoj, kiel la birma kaj la ĉina.

La Brita Societo, en sia raporto pri 1954, listigis la datojn de la komenco de tia laboro en diversaj landoj, jene : Britujo kaj Germanujo 1804, Irlando kaj Pollando 1806, Kanado, Kongo, Niĝerio kaj la Kariba insularo 1807, Skotlando 1809, Egiptujo kaj Hungarujo 1811, Finnlando, Vjetnamo, Ĉinio kaj Hongkongo 1812, Birmujo 1813, Nederlando, Danlando, Irano, Indonezio kaj Malajlando 1814, Svedujo kaj Islando 1815, kaj Usono kaj Norvegujo 1816.

La ideo evoluis, kaj la Sanktaj Skriboj eldoniĝis en pli kaj pli da lingvoj. En 1938, la Usona Biblia Societo eldonis libron kun la titolo "*The Book of a Thousand Tongues*" (la libro de mil

LA BIBLIAJ SOCIETOJ

lingvoj). En ĝi oni trovas specimenojn de mil dek ok lingvoj. Se eble, la libro inkluzivis parton de la paĝo, kiu enhavas Joh 3:16, sed en kelkaj lingvoj oni ĝis tiam ne eldonis la kvaran evangelion. Tiukaze ili presis alian versiklon, ekz. Mat 4:10, Mk 3:35 aŭ Lk 15:10. Pri ĉiu lingvo, D-ro E. M. North (noŝ) aldonis kelkajn rimarkojn. Pri Esperanto li skribis :

"Ĝi estas artefarita lingvo, elpensita de rusa kuracisto. Edukita en regiono, en kiu kvar lingvoj interbatalis, li penis evoluigi neŭtralan lingvon. Ĝi unue presiĝis en 1887. La unuaj kompletaj libroj de la Biblio (Rut kaj Johano) aperis (eble) en 1893. La Nova Testamento eldoniĝis en 1912. Ĝin tradukis komitato starigita de la Internacia Kongreso de Esperanto kaj de la Brita Esperanto Asocio, sub la gvido de Pastro J. C. Rust, helpate de S-ro Wackrill (*Wackrill*). La Malnova Testamento tradukis D-ro L. L. Zamenhof, la inventinto de Esperanto. La Biblio eldonis la Brita kaj la Skota Bibliaj Societoj en 1926."

La nombro da lingvoj, en kiuj la Skriboj estas eldonitaj, daŭre kreskas, kaj nuntempe estas preskaŭ mil naŭcent. En la plimulto da landoj, nun ekzistas nacia Biblia Societo. Mi iam min demandis, ĉu ni devus starigi Biblian Societon de *Esperantujo* ! Eble ne, sed necesas, ke iu okupu sin pri la havebleco, ne nur de biblio, sed ankaŭ de eroj, kiujn oni povos uzi, por instigi intereson, aŭ pri la lingvo, aŭ pri la mesaĝo. Mi aktuale negocas kun la Brita Societo, pri la presado de la evangelio laŭ Johano, pere de la Hongkonga Societo, kiu aranĝis la eldonon de 4 000 biblioj en 1984, kaj de 5 000 novaj testamentoj en 1986.

Laŭ mia peto, ekzemplerojn de la Nova Testamento jam ricevis almenaŭ dek du aliaj societoj, ĉar ili peris Esperantajn bibliojn. Informo pri tiaj eldonaĵoj fakte iras, kvazaŭ aŭtomate, tra la tuta mondo. Kiel tio okazas ?

Post du kunvenoj en Anglujo en 1946, dek ses naciaj Bibliaj Societoj, aŭ federacioj de lokaj Bibliaj Societoj, starigis novan organizaĵon por kunordigi sian laboron. Ili nomis ĝin la "Unuiĝintaj Bibliaj Societoj (U.B.S., United Bible Societies, Alliance Biblique Universelle, Weltbund der Bibelgesellschaften). En 1947 kunveno okazis en Nederlando. En 1948, dek ok societoj reprezentiĝis en Skotlando, kaj kiam en 1949, kunveno okazis en Usono, dudek kvar societoj estis anoj.

EVANGELIAJ KAJEROJ

Nun, kvardek jarojn post sia fondiĝo, U.B.S. havas sepdek Bibliajn Societojn kiel anojn, kaj tridek du kiel kunlaborantojn, entute cent du naciajn societojn ! Ĝiaj programoj de tradukado, produktado kaj distribuo atingas cent okdek landojn aŭ teritoriojn.

Ekzistas kvar regionaj komitatoj : unu por la okcidenta hemisfero, la dua por Afriko, la tria por Eŭropo, kaj la kvara por Azio kaj Pacifiko. Ili interkonsultas, kaj kunlaboras, por ke ili uzu siajn rimedojn, kiel eble plej bone. Entute ili uzas preskaŭ cent milionoj da guldenoj jare. Neniam ili havas sufiĉe da mono por fari ĉion, kion ĉiuj deziras. Proksimume kvaronon de la petoj, kiujn ili ricevas, ili devas rifuzi, pro manko da mono.

Antaŭe la Bibliaj Societoj helpis precipe protestantajn aŭ anglikanajn ekleziojn, sed nun ili pli kaj pli laboras kun romkatolikoj kaj ortodoksanoj. Kelkaj malgrandaj Bibliaj Societoj, kiuj ne ŝatis tian kunlaboron ne aliĝis al U.B.S. Antaŭe la Brita Societo rifuzis distribui la apokrifojn (aŭ duakanonajn librojn), sed nuntempe ili ĝoje vendas "ekumenajn bibliojn." Se la traduko de la apokrifoj, kiu nun estas en la manoj de I.A.B.O. (Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj) estus akceptebla, la Brita Societo povus eldoni Ekumenan Biblion Esperantan. En ĝi, la tiel nomataj apokrifaj libroj troviĝus inter la Malnova Testamento, tradukita de Zamenhof, kaj la nuna Nova Testamento, kiu estis reviziita en 1926, kun kelkaj malgrandaj ŝanĝoj; faritaj eble en 1947.

En la tuta mondo estas pli ol 5 000 lingvoj. La tutan Biblion oni ĝis nun eldonis en nur 286 lingvoj. Novaj testamentoj estas haveblaj en pliaj 594, kaj oni taksas ke naŭdek procentoj de la monda loĝantaro povas kompreni almenaŭ unu el tiuj 880 lingvoj. Tamen, oni ne devus forgesi, ke la dek procentoj, kiuj ne havas la Novan Testamento en siaj lingvoj, estas pli ol la loĝantoj de la tuta Eŭropo ekster Sovetunio.

Kun la helpo de U.B.S. oni nun tradukas en 360 linvojn partojn de la Biblio, kiuj ĝis nun neniam aperis. En aliaj 159 lingvoj, oni produktas novajn tradukojn, ĉar la pli fruaj tradukoj ne sufiĉe bone donas al la nuntempaj legantoj la ĝustan signifon de la originalaj tekstoj. Krome, en 27 lingvoj, oni revizias la tradukon por plibonigi ĝin. En 170 de tiaj projektoj, romkatolikoj aktive partoprenas. Antaŭe la Brita Societo ne permesis "notojn aŭ komentojn," sed nun, ili malpermesas nur disputeblajn komentojn.

LA BIBLIAJ SOCIETOJ

Por novaj legantoj, la Bibliaj Societoj jam eldonis, en pli ol tricent lingvoj, partojn de la Biblio en pli simplaj tradukoj. Ofte temas pri mallonga ekstrakto. La rezulto estas, ke en la jaro 1984 la societoj, kiuj estas anoj de U.B.S. disdonis tutmonde 12 077 852 bibliojn, 13 241 007 novajn testamentojn, 39 339 748 apartajn librojn de la Biblio, kaj 451 960 562 ĉerpaĵojn.

Tia granda laboro meritas nian helpon.

David Featherstone, Britujo

EVANGELIAJ KAJEROJ

PREDIKI LA VORTON DE DIO

Por la vera predikisto, estas evento kiam li scias, ke li estas elektita de Dio por ĉi tio. Je la komenco, oni sentas sin malforta sed certa, ke Dio certe alvokas. Pro la beno de saviĝo, estas la deziro altiri aliajn al Kristo la Savanto kaj al la Vorto, kiu instruas pri la neceso de spirita sperto. En la Nova Testamento, ŝajnas, ke ĉiu kristano estas ankaŭ misiisto. Oni devas konstati, ke ĉie estas multaj, kiuj ne lernis pri la Savanto. Ĉi tiu sento iĝas pli kaj pli forta ĝis oni komencas. Ekemple, kiel instruisto, laborante inter infanoj, oni akiras reputacion, kiam aliaj deziras predikonton. "Li instruas, en la laboro inter infanoj, li kapablos alporti la mesaĝon de Dio."

Kiam ĉi tio okazis en mia propra vivo, mi estis forte konvinkita, ke mi devus studi la tutan Sanktan Skribon. Kun miaj gepatroj, mi devis esti inter la ĉeestantaro jam de frua aĝo, sed multon mi ne povis kompreni, kvankam mi penis. Du aspektoj influis min :

- unue, la predikisto malfermis la Biblion ĉe la komenco, ĉe la mezo aŭ ĉe la fino por anonci sian tekston.

- due, lia emfazo ĉe la fino de la prediko rilatis al Kristo kaj al la devo decidiĝi pri Li. Kvankam ĉe la komenco mi havis nur la familian biblion kun komentoj, iom post iom mi ricevis donacojn por povi studi. Estas grave, ke ĉiu predikisto ricevu de aliaj, kaj estas utila la kutimo pri ĉiutaga legad-instruo. Ĉi tiu sistemo devas rilati al la tuta Biblio. Mi trovis per ĉi tio, ke ofte tekstoj estus evidenta temo por predikado. Konsideru :

"Prediku la Vorton ; instigu ĝustatempe, malĝustatempe ; konvinku, admonu, konsilu, en ĉia pacienco kaj instruado." (2 Tim 4:2)

"Ĉiu skribaĵo inspirita de Dio estas ankaŭ utila por instruo, por admono, por korekto, por disciplino en justeco." (2 Tim 3:16)

La ŝlosilo de la tuta Sankta Skribo estas la persono de Kristo kaj la ŝlosilo de ĝi estas la kruco. La bezono rilate al ĉi tiuj devas esti la centra temo pri predikado, kvankam la saĝo estas Dia, kaj preter la pensado de homoj. En 1 Kor 1:21, oni legas pri la "malsaĝeco de la prediko" aŭ "predikataĵo", la κήρυγμα, la neklarigebla mesaĝo de la kruco. La greka vorto indikas "tion, kio estas predikata", la bazan evangelian mesaĝon. La kruco estas la anema amo de Dio en ago, sed oni ne povas pli klarigi ĝin. Ĉi tio estas la grava kristana aksiomo, kiu kondukas al διδασχῇ, "doktrino".

Kiu traduko estas la plej bona ? Ĉi tie estas du celoj :

(a) atingi la veran tekston malgraŭ preterlasoj kaj ermetoj.
(por anglalingvanoj, la traduko eldonita en 1611 - *King James Version* - estas grava)

(b) ĝuste traduki la sencon kaj signifon. Se eblas, oni devas studi la hebrean kaj la grekan.

Ĉiam oni devas konstati la situacion, kvazaŭ oni konas jam la sperton de la aŭskultanto, kiel Charles Heim (*Ĉals hejm*) atestis pri sia prediko rilate al la mesaĝo pri la erarinta filo :

"La povo de la Vorto estas kaŝita kiel la elektra povo en la dratoj de latismasto al latismasto tra la tuta lando. Laŭŝajne la drato estas senpova, sed ĝi povas elektromortigi la tuŝanton. La povo eblas pro malproksima fonto, kiel akvofalo, kiu produktas elektron."

Simile estas pri la Vorto de Dio, kies aŭtoritato estas en Dio. Pro ĉi tio oni devas zorge ekzameni la fonon de ĉio. La Vorto de Dio estas donita de la Spirito, kaj la sama Spirito interpretas.

Se oni deziras prediki, estas grave ke oni konsideru la aŭskultantojn aŭ legontojn. Kiam mi komencis, mi vizitis paroĥojn, sed iom post iom mi ankaŭ skribis. Oni povas klarigi pli profunde per la skribita mesaĝo. Mi sugestus, ke oni komencu per la parolita vorto, kaj skribu pli poste. Iuokaze mi penis helpi mallertajn homojn, sed aliookaze estis oportunaĵoj inter studentoj.

Oni devas konstati la situacion. Se oni devas prediki al aliŝtatanoj, oni devas iom konsideri iliajn situaciojn, tradiciojn, historion kaj eĉ lingvon. Ĉi tiu sinteno indikas la simpation de la predikanto kaj estas grava.

La ĝenerala metodo de la predikisto estas plaĉi, instrui kaj apliki.

Unue, oni devas interparole retenigi iun, kaj alkrampiĝi al li. Ĉi tio estas precipe grava afero, kiam oni ekpredikas en nekutima loko, kiel ekz. sur la strato.

Due, ĉiu deziras lerni ion novan, kio devas esti klara kaj interesa. Estas grave trovi ligilon kun bonkonata doktrino, tio, kio tiamaniere iĝas pli utila.

Trie, oni devas indiki la gravecon de la temo rilate al la ĉiutaga vivo. Ekz. estas grava instruo pri la rilato inter sklavoj kaj mastroj, kiu helpus pri moderna laboro.

La meza parto devas esti malsama je ĉiu okazo kaj teksto, kvankam famaj predikistoj sugestis ke la instruo de la plimulto

ankaŭ dividiĝas en tri aspektojn, kiujn oni trovas per preĝo kaj penso, logike ; mi dirus, ke la preĝo estas la plej grava.

Oni povas indiki la klimakson de la pensaro per la laŭtigo de la voĉo. Ĉiuj elementoj estas diversaj laŭ la vortgrupoj esprimataj. Konsideru la emfazajn vortojn, pozitivajn kaj negativajn, kaj la aktuala vivo. Oni povas klarigi la temon kvazaŭ per diagramo, eble kiel ŝtuparo aŭ kiel kirlo, kaj tiel plu. La fidela predikisto devas aŭskulti aŭ legi predikojn por povi akiri teknikon.

Oni devas uzi vortilustraĵojn de ĉiutaga vivo aŭ scio. Ili estas kiel fenestroj por lumigi la predikon, sed ne konstruu flordonon ! La plej bonaj klarigoj troviĝas en la persona sperto de la predikisto. Estas bona afero porti notlibron, por noti ilustraĵojn de predikistoj, ĝenerala legado observado de la naturo kaj ĉiutaga vivo - eĉ eltranĉaĵoj, memoroj, pri ĉiutagaj malfacilaĵoj, ekz. dum la milito, aŭ je lastlima saviĝo.

Pri la skribita prediko, oni devas konstati ke ĉi tio estas pli daŭra, kaj oni povas legi ĝin laŭvole. Ĝi povas esti pli komplika ol la buŝa mesaĝo. Ankaŭ oni povas citi antaŭajn predikojn pri la sama temo aŭ el la sama libro de la Sankta Skribo. Aliflanke, rilate al la buŝa prediko en Diservo, oni povas uzi trafikajn himnojn por emfazi la ĉefan temon. Pro la diversaj temoj en la himnoj, oni povas ankaŭ aludi al aliaj aspektoj de la Biblio, kiuj rilatas al la baza temo. La plej emfazaj ilustraĵoj kaj himno devas troviĝi ĉe la fino de la Diservo. Ĉe la katedro, oni povas uzi notojn de la predikaj rubrikoj aŭ legi la tutan predikon. Se oni legas ĉion, oni devas legi tre esprimplene por retenigi la atenton de la aŭskultantaro.

La libroj de la predikisto estas gravaj. Uzu tiujn, kiuj estas fidelaj rilate al la Vorto de Dio. La aktualaj publikaj bibliotekoj (NDLR : en certaj landoj) estas utilaj, kaj per ilia helpo oni povas elekti librojn, kiujn oni devas aĉeti. Ne malestimu la vortojn de la predikistoj, kiuj estas malmalmodernaj, ĉar la bazaj bezonoj estas similaj nuntempe. Spite de novaj eltravaĵoj, la homa koro estas ankoraŭ pekema, kaj eĉ pli serioze. En la NT oni legas pri la lastaj tagoj, kiam homoj iĝos eĉ pli pekemaj en ĉiuj vivadsferoj (2 Tim 3:1-7 ; Jud 3). Se vi renkontas novajn doktrinojn, ekzameni ilin per la Vorto de Dio.

Pri la fina puŝo de la prediko, mi sugestus la sintenon de C. H. Spurgeon (*spöĝn*), kiu estis baze kalvinisto, sed ne limiĝis al tiaj doktrinoj. Kiel en sia propra konvertiĝo, li opiniis, ke predikisto devas esti konvinkema por efektiviĝi la Vorton de Dio.

PREDIKI LA VORTON DE DIO

Tamen, oni devas fidi al Dio kaj al la Sankta Spirito, ĉar sen ili, la predikisto ne povas fari ion ajn.

Kiam Spurgeon konvertiĝis kiel junulo, en preĝejo, kiam li vizitis dum neĝa tago, kiam li ne povis atingi sian propran, li ricevis la mesaĝon de sensperta predikanto, kiu helpis pro la for-esto de la predikisto. Li multe ripetis, sed precipe fingromontris al la junulo sub la galerio, kaj invitis lin alfronti Kriston. Ĉio estis klara laŭ la volo de Dio per la Spirito.

J. F. Twilley, Britujo

Ekde 1964, la aŭtoro sendas senpage al petintoj ĉiusemajnan predikon. Jen unu el ili.

N-ro 1072 : 1 Tim 4:5 "Ĉar ĝi estas sanktigita per la parolo de Dio kaj per preĝo."

SANKTIGO : Dum la historio de la Eklezio, de filozofio kaj etiko, troviĝis tri rendencoj, kaj ili penetris en la sperton de Sankta Paŭlo per la medio, dum li laboris. Ili estas legismo, asketismo kaj moralismo, kiel klarigitaj en *Gemeinde-bibelachule* (komunuma biblia lernejo), 1/77. Sed la mesaĝo de Paŭlo estas, ke vera kristana vivo eklipsas ĉion. Oni devas percepti inter spiritoj aŭ instruoj. Sanktigo iĝas fakto per la beno de Dio, kaj por ricevi ĝin, oni devas forturniĝi de la vivo de vazo de malhonoro, laŭ 2 Tim 2:21 :

"Se do iu purigos sin de ĉi tiuj, li estos vazo por honoro, sanktigita, taŭga por la mastro, pretigita por ĉiu bona laboro."

Tiamaniere oni estas starigita en la spiritan regnon. Kaj tie devas esti komunuma pretigo.

Estis interesa artikolo en la itala gazeto *Il Cristiano* (La Kristano), decembro 1971, paĝoj 244-250. Ĝi rilatis al la Eŭropa Kongreso pri Evangelizo en Amsterdam, verkita de "M. P.", kaj titolita : Kiamaniere evangelizi, kiu klarigas diversajn aspektojn. En paĝo 246 estas :

"Sed ne estas eble eliri malprudente en la mondon, sen esti preparita : por ĉi tio necesas, ke ĉiu komunumo faru inventaron de siaj propraj talentoj, de la donacoj, kiujn la Spirito donis, por estigi ĝin moviĝema, kaj sekve, produktema. Tiu provizo riskus fariĝi senmova kaj senprodukta por ĉiame."

EVANGELIAJ KAJEROJ

Por la kristano, manĝado kaj trinkado ne estas sole sekularaj agadoj, laŭ 1 Kor 10:31 :

"Ĉu do vi manĝas, aŭ trinkas, aŭ kion ajn vi faras, faru ĉion por la gloro de Dio."

Oni antaŭe petegas kaj dankas, kaj Dio benas. Ĉar manĝado kaj trinkado estas bazaj en la vivo, ĉi tiuj iĝas simboloj de la tuta ĉiutaga sperto. Estas vojo per kio la tuta vivo estas sanktigata ĉiutage, kaj Paŭlo klarigas ĝin...

PER PREĜO : Estas la dua aspekto en la teksto, sed ofte oni trovas en la instruo de la Biblio, ke la hebreaj instruantoj indikas ion gravan fine por emfazi ĝin. Efektive, la sanktigita vivo de pasinta tago estas kiel konversacio, dum kiu homo parolas en preĝo, kaj Dio parolas reciproke. Jakobo indikas la antaŭecon de la preĝo en 4:8 :

"Alproksimiĝu al Dio, kaj Li alproksimiĝos al vi. Purigu la manojn, vi pekuloj, kaj ĉastigu la korojn, vi, duobl-animuloj."

Komparu la miksaĵon de la legado de la Vorto de Dio kaj preĝo en Neĝ 8. En kristanaj Diservoj, preĝo kutime antaŭas la legadon de la Sankta Skribo. Tamen en vere spirite kondukata konversacio, ne gravas kiu parolas unue, ĉar Dio agas en ĉio.

En preĝo devas esti du aspektoj, laŭdo kaj peto, kiel en la preĝo, kiun Jesuo instruis al siaj disĉiploj preĝi. Kutime la fino de la preĝo estas la vorto *Amen*, kiu emfazas la fidon de la preĝanto, kaj efektive estas nomo de Kristo en Apo 3:14 :

"Kaj al la anĝelo de la eklezio en Laodikea skribu : tiele diras la Amen, la atestanto fidela kaj vera, la komenco de la kreo de Dio."

Estas anklaŭ la lasta vorto de la NT. Tamen ni devas emfazi, ke preĝo estas komencejo rilate al sanktigo kaj agado.

Mi speciale ĝojis legi pri la laboro de Ges-oj Hofmann, menciita en mia Neukirchena Kalendar-folio. Estis fondita en 1968, kaj la nomo de la movado estas *Offensive Junger Kristen* (Ofensivo de Junaj Kristanoj). Certe ili preĝas, sed poste emfazas pensadon kaj prizorgon. Tiamaniere la vivo estas sanktigata.

Je ĉi tiu sezono, ni dankas Dion pro la donacoj, kiuj ebligas nian vivon ; En televid-Diservo je la 30-a de septembro la gvidanto emfazis la bonajn donacojn de Dio ĉie, laŭ Psa 67:7 :

"Benos nin Dio ; kaj respektu Lin ĉiuj limoj de la tero." Oni oferis ankaŭ mangojn, kokosojn kaj sukerkanon, en Papulando-Novgvineo, kie episkopo David Hand (*deĵvid händ*), la gvidanto, laboris dum 37 jaroj. Oni devas redoni al Dio pro Lia fideleco.

PREDIKI LA VORTON DE DIO

Simile, ĉiuj membroj de la korpo estas donacoj de Li, kaj ankaŭ posedaĵoj, parencoj kaj amikoj. Ĉiuj devas esti sanktaj en nia uzo de ili.

PER LA PAROLO DE DIO¹ : Per ĉi tio Dio parolas al ni, precipe per la Biblio. Tiu, kiu parolas same, estas saĝa, laŭ Jer 26:16 :

"Tiam la eminentuloj kaj la tuta popolo diris al la pastroj kaj al la profetoj : Ĉi tiu homo ne estas kondamninda al morto, ĉar li parolis al ni en la nomo de la Eternulo, nie Dio."

Aliflanke, estas malvera profetado laŭ Jer 28:15 :

"Tiam la profeto Jeremia diri al la profeto Ĥananja : Aŭskultu, Ĥananja ; la Eternulo vin ne sendis, kaj vi kredigas al ĉi tiu popolo malveraĵon."

Ĥananja estis aprokema, sen prizorgo, kaj mensogema.

La parolo de Dio vundas, montras, kiam estas malproksimeco de Dio kaj kulpeco. Nur Dio povas korekti kaj restarigi per la persona konversacio. Eĉ la Vorto de Dio estas kiel nutraĵo. Per la Vorto alvenas rikolto de saĝeco en la Spirito kaj maturigo per spirita sperto, kiel beno.

Unu el miaj legantoj skribis, ke la Sankta Skribo iĝas por li kaŝita ĝardeno. La ŝlosilo estas preĝo ; kia vero ! Ne bruligu la ripetotan vorton sen timo (Jeremia 36), ĉar nek glavo, nek fajro povas neniigi ĝin. Aŭdu la voĉon de Dio !

PREĜO : "Ho Dio, mi kaj parolas kaj aŭdas en konversacio."

J. F. Twilley, Britujo

¹⁾ NDLR : La greka vorto en tiu teksto estas la sama, kiu estas tradukata per vorto en Joh 1.

EVANGELIAJ KAJEROJ

BIBLIA AŬTORITATO - RADIKO DE EVANGELIKECO

Paŭlo diras al Timoteo :

"Vi konas la Sanktajn Skribojn, kiuj povas fari vin saĝa por savo per la fido kiu estas en Kristo Jesuo. Ĉiu skribaĵo inspirita de Dio estas ankaŭ utila por instruo, por admono, por korekto, por disciplino en justeco ; por ke la homo de Dio estu perfekta, plene provizita por ĉiu bona laboro." (2 Tim 3:15-17)

De siaj pli fruaj epokoj, la Eklezio substrekas la gravecon de la Sanktaj Skriboj, komprenante, ke en ili troviĝas, la Diaj leĝaro kaj ordonaro, la inspiro por esti fidela al la vero, kaj al la fonto de ĉiu vero, la Sinjoro Jesuo Kristo.

Bedaŭrinde en la serĉado por tio, kio estas vero, la ekleziaj instancoj eniĝas en polemikojn, disipante siajn energiojn por diskutado pri, kaj formulado de iu simbolo, forgesante ke ĝia celo estas prediki la Evangelion, sciigi al la homaro ilian kondiĉon antaŭ Dio, konsciigi ilin pri la neceso penti kaj akcepti la savon, kiun gajnis por ili sur la kruco la Filo de Dio, Jesuo.

Tiel la Eklezio, kiu dekomence estis kaj evangelika kaj evangelizanta perdis la vizon, estiĝante enrigardema kaj introspekta. Ĝi iĝas gardio de la Dia heredaĵo, zorge protektante la fidon, kaj forgesas ke Jesuo ordonis siajn sekvantojn :

"Iri en la tutan mondon, kaj prediki la Evangelion al ĉiu kreitaĵo." (Mk 16:15)

Estas la celo de evangelikaj eklezioj kaj de la individua kristano ne nur esti fidela al la Vorto de Dio kaj al la Sinjoro, sed ankaŭ kondukti sin kaj vivi laŭ kristeca maniero kaj sciigi al aliaj la Evangelion, kiun nia Savinto urĝis nin proklami.

Ne dirante, ke evangelikeco sinonimas kun evangelismo, oni tamen ofte trovas la unuan kun la alia. Ĝenerale, la termino evangelika, klare signifanta sian rilaton al la Evangelioj - Mateo, Marko, Luko kaj Johano - tamen nun plilarĝiĝis inkluzivante konformecon kun la bazaj kaj fundamentaj doktrinoj, tiaj, kiaj oni nun trovas en la tuta NT, kaj kompreneble ankaŭ kun elementoj el la MNT. Tion oni komprenas, kiam oni legas en 1 Kor 15:3 :

"ke Kristo mortis pro niaj pekoj laŭ la Skriboj." kompreneble citita el la judaj skriboj.

La evangelika individuo aŭ organizaĵo do enfokusigas en la doktrinojn, kiuj estas klare pritraktitaj en la Biblio, esperante tiel eviti la miksadon kun kredoj kaj praktikoj, kiuj disvolviĝis

kiel tradicioj dum la daŭro de jaroj kaj jarcentoj.

Multaj instancoj envortigas tiujn kredojn, petante tiujn, kiuj deziras aliĝi al ili akcepti ilin kiel fundamentajn kaj nekontraŭdireblajn verojn. Hodiaŭ kiam estas kristanoj - teologoj, pastroj kaj laikuloj - kiuj neas, ekzemple la enkarniĝon kaj dian naturon de Kristo, la evangeliko sentas la neceson firme konfesi sian kredon en la faktoj, kiuj, li scias, estas en la Biblio. Tia estas lia fido.

La centra temo de evangelika kredo baziĝas kompreneble sur la vivo, morto kaj releviĝo de la Savinto Jesuo Kristo. En Lia vivo oni trovas ekzemplojn por sekvi, verojn por kredi, agojn por fari, sed pli ol ĉio, oni devas konscii pri la celo de la alteriĝo de la Filo de Dio. Memorante, ke Lia vivo estas tute senpeka, oni konscias, ke Jesuo ne meritis la sorton, kiun Li suferis. Tio plintensigas la asertadon, ke la morto de Kristo estas anstataŭanta morto, vivofero, kies celo estas la plenumo de la Dia promeso, provizi la rimedojn por la savado de la animoj de la homaro. La evangeliko konsideras, ke la respondo de la homo al ĉi tiu suprema ago de sindono troviĝas en la Biblio :

"Kion mi devas fari por esti savita ?"

kriis la filipiĉano malliberejestro.

"Kredu al la Sinjoro Jesuo Kristo kaj vi estos savita."

(Agoj 16:30-31)

La neceso de savo estas centra temo de la evangelika predikado. Kiel tiu plej fama kaj plej ofte citita versiklo en Joh 3:16 diras

"Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidus al Li, ne pereu, sed havu eternan vivon."

Oni memoru, ke Kristo venis, ne por kondamni, sed por ke la mondo estu savita (Joh 12:47). Do ĉiam estas la insisto, ke oni pentu kaj kredu, ke oni petu pardonon pro pekoj kaj pekado, kaj akceptu libervole kompletan pardonon. Jesuo pagis la punprezon, pro kio Dio transdonis al la individua homo la rajton akcepti (aŭ malakcepti) tiun savon, tiun promeson de eterna vivo. Sur la kruco Jesuo kriis, 'Estas finite', la volo de Dio plenumiĝis kaj nenio restas farenda por tiu, kiu celas lokon en la familio de Dio, krom akcepti.

La korpa releviĝo de Jesuo Kristo, tiun unuan Paskan tagon, kompletigas la tutan bildon de la Dia provizo por la savo de la homaro.

"Se Kristo ne leviĝis, via fido estas vana." (1 Kor 15:14)

Sed vana, ĝi ne estas, ĉar dum jarcentoj kaj precipe hodiaŭ, la

forta fido de miloj, ja milionoj, da kredantoj konfirmas al oni la veron de tio, kion oni legas en la Biblio. Multaj konas la regen-rantan povon, kiun Jesuo promesis al tiuj, en la praa kaj en la nuna Eklezio :

"povon, kiam la Sankta Spirito venos sur vin ; kaj vi estos miaj atestantoj en Jerusalemo kaj en la tuta Judujo kaj Samario kaj ĝis la plej malproksima parto de la tero." (Agoj 1:8)

Do, ne estas surprizo, ke grava faceto de la evangelika vivo estas la dediĉo al biblia studado, kiu evidentiĝas, kaj en la publika studo okazanta dum semajna kunveno por tiu celo, kaj en la privata studo kaj legado. En la Biblio mem estas multaj admonurĝoj al la serĉado de la Skribaĵoj.

"Via vorto estas lumilo por miaj piedoj,

Kaj lumo por mia vojo." (Psa 119:105)

"Feliĉaj estas la legantoj kaj la aŭskultantoj de la vortoj de la profetaĵo kaj la observantoj de la skribitaĵoj en ĝi. (Apo 1:3)

"La vorto de Kristo loĝu en vi riĉe." (Kol 3:16)

Oni studas la Biblion por eltrovi, ekzemple, faktojn pri la naturo de Dio, aŭ la diraĵojn de la popolo de Dio dum pasintaj periodoj, kaj estas multe da aliaj kialoj. Sed esence la Biblio ekzistas por meti nin en kontakton kun la vivanta Dio. Ĝi estas unu rimedo per kiu Dio parolas al tiuj, kiuj deziras aŭdi kaj aŭskulti. Kiel oni ne povas aŭskulti la radion, se oni ne funkciigas la aparaton, tiel same oni ne aŭdas la voĉon de Dio, ne malfermante la Biblion. Multe da kredantoj konfesas kuraĝigajn spertojn pro regula kaj laŭsistema legado de la Sanktaj Skribaĵoj.

La evangelika kristano turnas sin al la ĉiutaga legado de la Biblio, esperante kun aŭdeco elfosi iun novan juvelon. Ĉu estas ekzemplo imitinda, peko evitenda, ordono obeota ? Ĉu oni povas trovi promeson de Dio, iun malfacilaĵon esplori, temon pri kiu preĝi ? La eblecoj estas senfinaj, ofte pliriĉigaj kaj kuraĝigaj.

Hodiaŭ, estas tiom da voĉoj allogantaj nian atenton, ke dum neniu antaŭa periodo estis pli necese, ke la homo aŭskultu tion, kion Dio diras. Elĉerpi el la Skribaĵoj la inspiron kaj la povon necesan por resti spirite freŝa, igas la kristanon, kiel la feliĉan homon en la unua psalmo :

"Li nur havas deziron por la leĝo de la Eternulo,

Kaj pri Lia leĝo li pensas tage kaj nokte." (Psa 1:2)

Thomas Neil, Britujo

Kiel dokumento pri la evangelika sinteno al la Biblio, ni donas tiun ĉi tekston de la gazetara servo de la Kongreso pri inspiro kaj aŭtoritato de la Biblio. Ĝi estas tradukita el la revuo ICHTHUS, 1986-1 (134), janvier-février 1986, pp. 18-19.

"La Biblio diris vere." Tia povas esti la konkludo pri tiu ĉi unika evento, kio estis la Kongreso pri inspiro kaj aŭtoritato de la Biblio, okazinta en Paris (Parizo) de la 20-a ĝis la 24-a de novembro 1985.

500 partoprenintoj, inter kiuj multaj junuloj, venintaj el Francujo, Belgujo, Svislando, Britujo, Usono, Afriko, kaj el aliaj lokoj, kunvenis ĉirkaŭ la fakuloj pri la Sankta Skribo: D-ro Roger Nicole, teologo el la Fakultato Gordon Conwell en Boston, la arkeologo Alan R. Millard, el la universitatoj de Liverpool kaj Jerusalema, Prof. Henri Blocher, el la Evangelika Fakultato pri teologio de Vaux-sur-Seine, Past. Pierre Courthial honora dekanato de la Reformita Fakultato pri teologio de Aix-en-Provence, la dekanato Pierre Berthoud kaj la Prof. William Edgar el la sama fakultato, Prof. J. M. Nicole, biblia tradukisto, el la Biblia Instituto de Nogent-sur-Marne, Prof. P. A. Dubois, direktoro de la Biblia Lernejo de Genève (Genevo), Prof. Alfred Kuen, biblia transskribisto, el la Instituto Emmaüs (Svislando).

Tiu ĉi renkonto estis organizita de la teologiaj fakultatoj, de la bibliaj institutoj kaj de la reprezentantaj organoj de la francilingva evangelika protestantismo.

Ĝin akompanis publika konferenco kaj biblia ekspozicio. La fortaj punktoj el la konkludoj de tiu ĉi kongreso povas resumiĝi tiel:

- La aŭtoritato de la Biblio devenas de ĝia dia inspiro, kiu neniel malpermesis al la bibliaj verkintoj ilian personecon aŭ iliajn literaturajn stilojn.

- La dia inapero de la biblia teksto ne devenas de la subjektiva neceso

alvoki al neeraroma aŭtoritato, sed de la fakto, ke Dio tra la sanktaj verkintoj estas la aŭtoro de tiu ĉi teksto. La referenco al la Biblio estas do la referenco al la rivelita penso de Dio.

- Akordo estas ebla inter la eraroblo de multaj kopioj, kiuj alvenis ĝis ni, kaj la neeraroma de la originala redakto de la tekstoj. Tra la tradukoj, la Biblio alvenas al ni kiel Vorto de Dio, laŭ la fideleco de la ĉi-lastaĵo je la originala redakto.

- La scienca rigoreco povas kuniri kun la fido je la verco de la Biblio. La malakordoj inter la scienco (nuna, sekve relativa, stato de la konoj) kaj la Biblio povas deveni de scienca nesufiĉeco, de nesufiĉa kono, aŭ de apriora aliro al la Biblio, same kiel de ĉiuj tiuj ĉi elementoj samtempe.

- La historieco de la Biblio estas objektiva kaj, prikalkulante la literaturajn formojn, ne povas esti asimilata al bonintenta fikcio. La kredoblo de la Biblio estas speciale apogata de la kontrolebla plenumiĝo de ĝiaj multaj profetaĵoj, lumigante tiel la tutmondan historion, kaj de la rezultoj pli kaj pli multnombraj de la arkeologiaj malkovroj.

- La Biblio restas universale la fonto kaj la normo pri moralo kaj juro, ne per dekreto de eklezia aŭtoritato, sed per la dia aŭtoritato, kiu estas propra al ĝi.

- Ĝi tiel respondas, kiel ĉiam, al la problemoj de la nuna mondo, pli kaj pli sen referenco.

- Ĝi ankaŭ kaj precipe estas, por la ĉiuepoka kaj ĉiurasa aŭ ĉiunacia homo, la Bonan Novaĵon de la Dio de Amo, kiu povas lin savi kaj liberigi per Jesuo Kristo, Sinjoro kaj Savanto.

KIE LA RELIGIO DE LA BIBLIO MAĤSIMILAS AL LA ALIAJ ?

"Sonas voĉo de kianto: Pretigu en la dezerto la vojon de la Eternulo, rektigu en la stepo irejon por nia Dio." (Jes 40:3)

Ĉiuj homoj kiuj sciis pri tiu ĉi krio atendis, atendis, atendis Lin... Kaj alvenis ŝajne simpla homo, kiu estis eble alta aŭ malalta, brun- aŭ nigra-barba (ni jam ne scias). Tamen restas Liaj vortoj eternaj, kaj ili elturnis la angulojn de la tuta mondo.

Kiu estis Li, kiu, simpla filo de simpla ĉarpentista familio, verŝajne vestita en simpla vestaĵo, aspektis kiel la plej simplaj homoj, kiu, starante antaŭ la homoj, tridek-jara, diris tian parolon, kiu enhavis ĉiujn filozofiajn trezorojn, kiujn ni povas trovi ĝis tiama epoko de la homaro, kiu eĉ donacis sekvindan vojon al ĉiuj vivantoj ĝis la fino de nia mondo ?

Sendube, tute stranga afero estas tiu ĉi subite aperinta homo. Vi ne forgesu, ke kvankam Jesuo rolis kiel admirinda infano (Lk 2:41-47), Li tamen pasigis ie longan tempon, kiam oni tute ne aŭdis pri Li. Tiu tempo daŭris ĉirkaŭ dek ses aŭ dekok jaroj. Tiu homo posedas homogenan, elformiĝitan filozofion, tian saĝecon, el kiu ĉerpante Li povas respondi al ĉiuj demandoj.

Ni konsideru la plej grandajn filozofiojn kaj filozofojn ankaŭ religi-fondintojn. Ĉiuj havis ian infanaĝon, lernis de iu aŭ de iuj, almenaŭ aŭdis pri aliaj filozofiaj strukturoj, pri aliaj similaj religioj. Se iu nun pensus subite pri judismo, tiu palpadas al malĝusta direkto. Kial ? Ĉar esplorante radikojn de Jesua etikaro, tuj ni povas rimarki, ke ĝi estas pli proksima al budhismo ol al judismo. Ne hazarde naskiĝis konata teorio pri Jesuo: li pasigis longan tempon en tia medio, kie Li havis eblecon akiri profundajn konojn pri budhismo¹. Tiun ĉi hipotezon ŝajnas atesti tiuj listoj, kiujn religiesploristoj preparis pri simileco inter budhismo kaj kristanismo, surbaze de la grandaj paroladoj de la du religifondintoj.

La alia granda hipotezo, pri kiu ni ne silentu kvankam multaj homoj, aŭdante pri tiu temo, nur ridetas, estas, ke Jesuo ne estas tera homo sed astronauto, kiu restis sur nia tero ial. De kie venis tiu ĉi absurda penso ? Precipe la subite aperinta tute preta filozofia strukturo kaj etiko, kiu estas radikale diferenca de la estanta etikaro en tiama epoko de la naskiĝloko de Jesuo, estas tute stranga al tiuj, kiuj ne akceptas la ekziston de Dio. Do ili provas doni kalrigon alimaniere. Grava estas al ni, el tiu hipo-

KIE LA RELIGIO DE LA BIBLIO MALSIMILAS AL LA ALIAJ ?

tezo, nur penso : tera homo ne kapablas eltrovi tian kompleksan filozofian strukturon.

Menciinda estas koncepto de Helmuth von Glasenapp (*Die fünf Weltreligionen*, Köln, 1972), kiu ne akceptas tiujn ĉi teoriojn, eĉ laŭ li, Jesuo konis nur la plej simplajn problemojn de sia kadro, kaj tute ne konis aliajn religiajn doktrinojn krom la judaj. Laŭ Glasenapp, Jesuo sciis nenion pri kulturo, artoj, politiko, ktp.

Opinioj, vidpunktoj, estas do tute aliaj, ofte malaj laŭ diversaj esploristoj. Nur tial estas interesaj tiuj ĉi teorioj, ke ni povu vidi klare, ke subita apero de preta, matura teorio de Jesuo, faras ankaŭ nun surprizon inter esploristoj. Sendube, tute malkultima afero estas apero de instruisto, kiu neniam lernis, kiun neniu instruis.

Se ni legas plurfoje kaj atenteme la Evangeliojn, tuj ni povas rimarki : la instruo de Jesuo havas parencecon ne nur kun budhismo, sed ankaŭ kun aliaj kredaroj, kiuj ekzistis aŭ naskiĝis sur nia tero. De kie venas tiuj ĉi similecoj ? Nu, la respondo estas sufiĉe simpla. Se iu provus krei al la homaro eternajn leĝojn, celante pacon de la homo, internan kaj eksteran, me kredas, ke tiuj leĝoj estus tre similaj al la instruo de Jesuo, kaj ke tiuj estus tre similaj ankaŭ al la instruoj de la aliaj religifondintoj, eĉ tutcerte estus troveblaj inter kreinta idearo kaj idearo de la grekaj, ĉinaj, hindaj kaj aliaj saĝuloj. Kie estas ĉefa diferenco do inter Jesuo kaj la aliaj saĝuloj ? Tie, ke Jesuo donis uzeblan etikaron ne nur al la sola homo, ne nur al malgrandaj homgrupoj, aŭ al nacioj, sed al la tuta homaro, al ĉiuj homoj sur la tuta tero, estu tiu homo ĉina, hinda, nigrulo, blankulo, tute egale. Kie do ni povas trovi diferencojn inter doktrinoj de Jesuo kaj de aliaj ? Tie, kie intereso de la unuopa homo aŭ kliko diferencas de la tut-homara intereso. Konsideru ni la diversajn doktrinojn. En ĉiuj ni povas trovi egoismajn aŭ grupajn interesojn, sed en la instruo de Jesuo, tute ne. La budhismo kredas en memefektivigo, la judismo kredigas, ke ilia nacio estas la elektita, la plej multaj orientaj religioj heroldas ĝustecon de la privata vojserĉado, kaj ekzistas tiuj, kiuj montras komunan vojon, sed nur ĝis intereslimo de sia raso, nacio aŭ simple lando sia.

En historio de kristanismo, ni povas vidi, ke en tiu ĉi momento, kiam la Instruo fariĝis je intereso de sola homo, aŭ kiam ia kliko provis uzi ĝin sur sia flago por kaŝi sian grupintereson, tiam la Instruo en tiu momento fariĝis maltaŭga kiel ilo, kaj eĉ fariĝis celo de malamo. Ni pensu pri pacemaj misiistoj kaj ni pensu pri perfortaj misiaj laboroj. Okazis, ke tiuj jezuitoj, kiuj en multaj

EVANGELIAJ KAJEROJ

landoj en Eŭropo fariĝis malamindaj, en la plej sovaĝa kadro inter indianoj faris prosperan socion, kiun propraj kredfratuloj nuligis. Sur ambaŭ flagoj estis signo de kruco.

En ĉiu homa animo estas trovebla loko por akcepti la instruon de Jesuo (aŭ la homa animo estas mem la Instruo), sed neniu povas uzi ĝin kiel perfortan armilon taŭgan por efektiviĝi sian egoisman celon.

"Mi donis al ili Vian vorton ; kaj la mondo malamis ilin, ĉar ili ne estas el la mondo, kiel mi ne estas el la mondo." (Joh 17:14)

Ĉu nia mondo povas ami homojn, kiuj ne estas egoistoj ? Ĉu la mondo nuligas homojn kiuj ne rebatas ? Ĉu ĉiuj kristanoj sentas malamon, vidante aliajn homojn, kiuj estas malkapablaj akcepti la ideon de senlima interna kaj ekstera paco ? Ĉu ŝanĝiĝis nia mondo iomete post Jesuo ? Ĉiu donu sian propran respondon ! Verŝajne la donotaj respondoj estos tre similaj unu al la alia.

Tute nova religio naskiĝis do kiam Jesuo aperis. Ĝis apero de Jesuo, ĉiuj religioj estis dependaj de ilia ekzistanta medio kaj de la ĉiama politika strukturo. Memkompreneble estis, ke egiptoj kredis egiptajn diojn, judoj kredis la Sinjoron יהוה, grekoj kredis diojn de Olimpo, kaj ne estis devigo elekti. Sed al tiu, kiu fariĝis kristano, necesis propra decido, kiu signifis radikalan rompon de ĉiuj tradicioj kaj neadon de kutimaj dioj kaj ceremonioj. La kristanismo, en momento de naskiĝo, estis tia religio, kiu aperis ne en jam ekzistanta komunumo, kiel ideologio de tiu komunumo, sed mem estis primara komunum-kreanta kaj varbanta faktoro.

Konsiderante la unuajn jarcentojn de kristanismo, oni tuj rimarkas ke, la ideo de kristanismo ne konas landlimojn. Tamen, en ĉiuj landoj, kie ĝi aperas, ĝin atakas la kreduloj kaj estroj de la oficiala aparato. Ne necesas demandi kial, Jesuo mem donas al ni la respondon : la Vorto de Dio "ne estas el la mondo" (Joh 17:14). Sendube la historio de kristanismo havis malfacilajn jarojn, kiam la kristanismo estis jam mem potenco, kaj ne laŭ la vorto de Jesuo la Eklezio volis direkti siajn kredantojn. Tamen ni povas diri, ke tre gravaj jaroj estis tiuj, ĉar ili donas al ni moralinstruon neforgeseblan : la Instruo de Jesuo estas maltaŭga ilo por perfortuloj, potencamantoj, malpacieneculoj.

En nia jarcento denove komencas prosperi kristanismo kaj ankaŭ aliaj religioj. Le respondo estas simpla. Ĉiuj homoj, ĉu pli frue, ĉu malpli frue, ekkomprenis, ke neniu ŝtatformo donas respondon al

KIE LA RELIGIO DE LA BIBLIO MALSIMILAS AL LA ALIAJ ?

la homo pri la plej gravaj homaj demandoj, eĉ ne al la demando : 'Kiel ni povas vivi por resti homo'? La homaro estas malbenita per materio, suferante pro sia egoismo, kaj ne povas trovi alian vojon en tiu ĉi mondo, ol tiun, kiu ne estas el tiu ĉi mondo. Ĉiuj homoj kiuj ne ricevis dian donacon serĉadas la Kredon, kaj aŭ trovas, aŭ ne trovas, laŭ sia personeco. Unu, inter la plej belegaj ekzemploj, vivvojoj estas vojo de Simone Weil (*simon vej*). Ŝi, la juda, neniam baptita virino, kiu tre bone konis orientajn kaj okcidentajn religiojn kaj filozofiojn elektis la vojon kaj la instruon de Jesuo. Ŝia vivvojo estas ankaŭ nia vojo, vojo de hodiaŭa homo, kiu renkontiĝas kun Jesuo. Ekzemplo ŝia certigas, ke la plej malfacila vojo, la vojo de Jesuo, estas irebla de ĉiuj homoj ankaŭ nun. En ni ĉiuj ekzistas duboj, sed en niaj plej malfacilaj horoj, ni turnu niajn okulojn al Jesuo, kiu scias respondi al ni. La vivo de Jesuo kaj ĉiuj vortoj de Li estas respondo al niaj demandoj. Ni nur provu stari antaŭ Li kun malfermita koro. Vivante kune kun Li, ni povas trovi amikojn, kiuj ne pikos ponardon en nian koron. Kio estis la vivo de la homaro ĝis Jesuo ? Eterna timo ! Timo pro dioj, timo pro materio, timo pro aliaj homoj. Alvenis Jesuo, kaj Li instruis homon malkaŝi koron kaj kredi, kaj eĉ kun kredo morti, ne suferante pro timo.

"Vi aŭdis, ke estas dirite : Okulon pro okulo, kaj denton pro dento ; sed mi diras al vi : Ne rezistu al malbono ; sed al tiu, kiu frapas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian. Kaj se iu deziras procesi kontraŭ vi, por forpreni vian tunikon, lasu lin preni ankaŭ vian mantelon. Kaj se iu devigas vin iri unu mejlon, iru kun li du. Donu al tiu, kiu petas de vi ; kaj ne deturnu vin de tiu, kiu deziras prunti de vi. Vi aŭdis, ke estas dirite : Amu vian proksimulon, kaj malamu vian malamikon ; sed mi diras al vi : Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj ; por ke vi estu filo de via Patro, kiu estas en la ĉielo." (Mat 5:38-45)

Nature venas tuj la demando : Ĉu oni povas vivi tiel ? Nur per demando, ni povas respondi al demando : Ĉu oni povas vivi alimaniere ? Ĉu oni povas vivi kiel homo alimaniere ? Ĉu ĉiuj suferaraj ne venis pro tio, ke homaro vivis kaj vivas alimaniere ? Ĉu ne estas pli feliĉe vivi kiel sklavo libere en animo, ol kiel riĉulo tremante pro ebla perdo de sia trezoro ?

"Ne provizu al vi trezorojn sur la tero... ĉar kie estas via trezoro, tie estos ankaŭ via koro." (Mat 6:19-21)

EVANGELIAJ KAJEROJ

En la instruo de Jesuo estas tre grave, ke disĉiploj sendependiĝis de cirkonstancoj de naskiĝloko, de nacio, ktp. Jesuo mem povas klare vidi la suferon de la disĉiploj, sed tamen Li certe scias :

"Kaj tiu ĉi evangelio de la regno estos predikita tra la tuta mondo, kiel atesto al ĉiuj nacioj." (Mat 24:14)

Ĉu estas imagebla, ke simpla vilaĝano, kiu nenion scias pri la mondo (laŭ Glasenapp) tiel energie diris tiujn vortojn, pri sorto de sia teorio ? Memkompreneble ne. Sed en la vortoj de Jesuo ni ne povas trovi ian malcertecon.

Jesuo donis al Siaj disĉiploj vojon malfacile ireblan. Sed kiu religio donas al kreduloj facilajn leĝojn ? Tamen, ni povas trankvile diri, ke la vojo de Jesuo estas preskaŭ la pleje plej malfacile irebla. Ĉu ekzistas pli malfacila leĝo ol :

"Vi aŭdis, ke estas dirite : okulon pro okulo..." (legu atenteme denove Mat 5:43-45)

Plej multe da religioj (kiel ni jam menciis) donas konsilojn al memstarantaj homoj, konsilojn, kiuj servas interesojn de nacio, potenculoj, ĉiama politiko, ktp., kaj provas pacigi la unuopan homon kun sia medio. La Instruo de Jesuo estis kaj estas fremda en la mondo, ĉar ĝia esenco diferencas ne nur de la intereso de nacio, politiko, ktp., sed ankaŭ de la intereso de la unuopa homo. En la Instruo de Jesuo sonas intereso de la tuta homaro.

Tie ĉi, ni trovas tiujn diferencojn, kiuj signifas ĉiam la plej grandajn malfacilaĵojn, se oni volas sekvi la vojon de Jesuo. Ankaŭ budhismo atentis al la homaro, ekzemple, sed rezignas elaĉeti la homaron. Vojo de Jesuo al elaĉeto estas vojo de la tuta homaro, vojo de Budho estas vojo de la unuopa homo. Ĉu ni povas fariĝi disĉiplo de Jesuo ? Sendube jes, sed nur en tio, ke ni kapablas akcepti intereson de la homaro kontraŭ niaj propraj intereso. Ĉiuj kristanaj eklezioj, nur en tio estas kristanaj, se ili kapablas efektiviigi intereson de la tuta homaro, ofte kontraŭ propraj ekleziaj intereso. Ĉiuj religioj nur en tio estas akcepteblaj al veraj kristanoj, kiam tiuj posedas komunan intereson kun homaraj intereso. Ankaŭ tie ĉi ni povas trovi komunecon inter marksismo-leninismo kaj kristanismo.

Memkompreneble, al unuopa homo la Instruo de Jesuo estas malfacile akceptebla, ĉar ĉiuj homoj vivas bandaĝite per intereso. Tiuj intereso estas multspecaj, propraj, familiaj, kaj depende de la loko de unuopa homo en ŝtato, naciaj, landaj, ktp. Eĉ faras konfuzon en la kapo de homo la diversaj ideoj el kiuj oni tre malfacile kapablas trovi konvenan al la ĉiutaga vivo. En ĉiuj homoj vivas deziro pliproksimiĝi al aliaj homoj. Konata estas

KIE LA RELIGIO DE LA BIBLIO MALSIMILAS AL LA ALIAJ ?

la varbefiko de diversaj faktoroj (la psikologio kaj la sociologio sufiĉe profunde esploris jam ĉi tiun temon), kiuj varbas homgrupe-tojn. En ĉiuj homgrupe-toj ni povas trovi ian komunan intereson aŭ interesigon pri iu temo. Tiuj grupe-toj ĉiam formiĝas laŭ ŝanĝo de efikoj kaj intereso. Ankaŭ ŝanĝiĝis multe tiuj grupe-toj de homoj, kiuj ariĝis ĉirkaŭ diversaj religioj. Oni ofte diras, ke tiuj ŝanĝoj estas evoluo de religio. Tamen mi havas iomete dubon. Ĉu historia evoluo de budhismo, katolikismo, ktp. ne signifas malproksimiĝon de la originala fonto ? Laŭ mi sendube jes ! Kara leganto, esplorante religihistoriojn, vi ankaŭ povas trovi argumentojn, laŭ kiuj, se iu religio tro malproksimiĝis de sia originala doktrino, ĝi jam perdas ankaŭ sian originalan enhavon. Memkompreneble, post iom da tempo, aperas reformuloj, kiuj plejparte ne volas alian, sed nur pliproksimiĝi al la originala doktrino. Tiuj profetoj en historio de religioj, preskaŭ ĉiam faras tiajn ŝanĝojn, kiuj disrompas la ĝis tiam ŝajne homogenan grupon, kaj kreas novan, lasante la malnovan. Ni ne pensu, ke tiuj novaj grupe-toj estas sendependaj de la originala grupe-to. radikoj estas komunaj, nur la sfero de ilia intereso estas alia. Tiel povas okazi, ke katolikismo havas multajn branĉojn, sed vane estis kaj estas kvereloj inter diversaj tendencoj. La esenco tamen povas resti komuna. Nature, la kvereloj ĉiam plifortiĝas se la sfero de intereso iĝas pli proksima al la ĉiutaga vivo ol antaŭe. Bedaŭrinde, historio de katolikismo havis malĝojajn jarojn, kiam frato batalis kontraŭ frato. Tamen mi pensas, ke pliproksimiĝas la tempo, kiam komunan intereson havos ĉiuj homoj sur la tero : zorgi la pacon, kaj tiu faktoro devigos ĉiujn homojn pripensi sian kredon kaj trovi en tiu kredo la komunon kun aliaj kredoj.

Mi kredas, ke ĉi tiu komuna pensado povas fariĝi bazo de la komuna religio de la homaro, ĉi tiu komuna pensado (ĵetante proprajn interesojn) montrons al ni la veran Instruon de Jesuo. Ĉu estas facila tiu ĉi vojo ? La respondo estas jam donita :

"Eniru tra la mallarĝa pordo, ĉar larĝa estas la pordego kaj vasta estas la vojo kondukanta al la perejo, kaj multaj tra ĝi eniras. Ĉar mallarĝa estas la pordo kaj malvastigita estas la vojo kondukanta al la vivo, kaj malmultaj ĝin trovas." (Mat 7:13-14)

Bedegi Győző, Hungarujo

1) Legu libron de Nicolas Notovitch : *La Vie inconnue de Jésus Christ*. - Paris, 1894. La vie nouvelle, en *Revue de philosophie religieuse et de culture humaine*, 1979, n-roj 50,

51. Jesus-Forschung : Neue Theorien und Erkenntnisse über das esoterische Leben Jesus ; War Jesus ein Magier ; Der Nazarener hat gesiegt en monata revuo *Esotera*, 1974/5-6.

EVANGELIAJ KAJEROJ

KION SIGNIFAS VORTO DE DIO ?

En la Malnova Testamento, Vorto de Dio ordinare signifas la mesaĝon, kiun Dio donas al profeto, por ke tiu konsciigu la homojn pri ĝi.

"Kaj Li diris al mi : Ho filo de homo, iru al la domo de Izrael, kaj parolu al ili per Miaj vortoj." (Jeŝ 3:4)
Ne malofte la vokita profeto klopodas eviti la taskon. Ĝi ŝajnas tro peza.

"Mi diris : Ho ve, Sinjoro, ho Eternulo ! Mi ne povoscias paroli, ĉar mi estas juna." (Jer 1:6)
Dio tamen promesas helpi kaj subteni la vokitan profeton.

"Ne timu ilin ; ĉar mi estas kun vi, por savi vin, diras la Eternulo." (Jer 1:8)
Iam la profeto ricevas la taskon ĉizi la dian vorton sur tabulo (Jes 8:1), aŭ, pli poste, skribi ĝin sur rulaĵo (Jes 30:8).

La homoj neglektas la diraĵojn de la profetoj.

"... ĉar ili ne atentis Miajn vortojn, kaj Mian instruon ili forpuŝis." (Jer 6:19)
La popolo tamen ŝanĝos sian sintenon. Iam estonte, laŭ Amos, ili vere serĉos la dian vorton :

"Jen venos tagoj, diras la Sinjoro, la Eternulo, kaj Mi sendos malsaton en la landon, ne malsaton pri pano kaj ne soifon pri akvo, sed soifon por aŭskultado de la vortoj de la Eternulo." (Amos 8:11)

Kia do estas la enhavo de la vorto de Dio laŭ la malnovtestamentaj profetoj ? Unue, la profetoj kritikis la kul-ton. La popolo miksis la malnovan izraelan javeismon kun la kanaana okcident-semida religio. Ili verŝajne partoprenis oferadon kune kun la kanaanidoj, apud sia propra religio. Laŭ la profetoj, tio ĉi estis severa krimo kontraŭ la dia leĝo. Se la popolo ne pliboniĝos kaj reiros al pura javeismo, Dio forlasos sian popolon. Due la profetoj kritikis socian maljustecon.

Vorto de Dio havas ankaŭ tute alian signifon en MNT. En Genezo, Dio kreas la mondon simple per vortoj.

"Kaj Dio diris : Estu lumo ; kaj fariĝis lumo." (Gen 1:3)
Tie ĉi la dia vorto estas forto de Dio, kiu per si mem kaŭzas grandajn ŝanĝojn en la mondo.

Grave estas noti, ke en MNT oni *neniam* uzas la terminon vorto de Dio por iu kolekto de skribitaj tekstoj. Do la MNT ne diras pri si mem, ke ĝi estas tia vorto de Dio.

La Nova Testamento, same kiel la malnova, uzas la esprimon vorto de Dio en diversaj signifoj. Same kiel en la MNT, ĝi povas signifi mesaĝon senditan de Dio al profeto.

"... venis la vorto de Dio al Johano, filo de Zeĥarja, en la dezerto." (Lk 3:2)

Kiam Jesuo parolas pri la vorto aŭ pri la vorto de Dio, li parolas pri la mesaĝo, kiun li peras. Precipe Johano volonte uzas la terminon vorto. Jesuo diris :

"La vortojn, kiujn mi parolas al vi, mi parolas ne de mi mem ; sed la Patro, restanta en mi, faras Siajn farojn." (Joh 14:10)

La prologo de la evangelio laŭ Johano uzas la esprimon vorto en tute alia senco. Li akceptis la terminon *λογος* (*logos*, vorto) el la spekulativa greka filozofio. Ĝia origina signifo estis vorto, ĝi tamen havis ankaŭ aliajn signifojn, kiel ekzemple : racio, inteligenteco, Dio¹. Johano opinias, ke Kristo estas kreita de Dio jam antaŭ la kreo de la mondo. Antaŭ sia naskiĝo sur la tero li estis *λογος* (vorto). Estas malfacile kompreni kiel la juda Johano akceptis la spekulativemon de la greka filozofio. La respondo povas esti, ke li dum kelkaj jardekoj iom post la 50-a jaro loĝis en Efeso kaj en aliaj lokoj en Malgranda Azio por prediki al la judoj. Kompreneble li renkontis ankaŭ grekojn. Tiuj ne plu kredis je sia malnova religio, sed serĉis novan kredindan. Johano komencis priskribi sian religion per grekaj filozofiaj terminoj por allogi la religiemajn grekojn.

Johano verŝajne havis ankaŭ judajn ideojn en siaj pensoj, kiam li skribis pri la vorto. Laŭ la MNT, Dio kreis la mondon dirante vortojn. Tiuj ĉi vortoj, laŭ Johano, estis Jesuo. Inspiris lin eble ankaŭ juda spekulativo pri la saĝo de Dio. Laŭ judaj skribaĵoj Dio kreis la saĝon antaŭ ĉio alia. Poste oni ofte parolis pri la saĝo, kiel pri memstara estaĵo (Sen 8:22 ; Saĝ 9:4).

Sendube Johano ne nur reinterpretis kristanismon por la grekoj. Li ĝin multe influis. La vorto de Dio ne kiel antaŭe estis mesaĝo de Dio, sed, post interpretado de Johano ĝi estis la peranto de la mesaĝo, Jesuo mem.

Rimarkinde estas ke same kiel en la Malnova Testamento, ankaŭ en la Nova oni *neniam* uzas la esprimon vorto de Dio por iu libro de la kolekto, kiun ni nomas la Biblio. Nur unu Biblio-libro, nome Apokalipso, diras pri si mem, ke ĝi estas mesaĝo de Dio. Tamen ankaŭ ĝi konsentas, ke temas pri homa priskribo de Dia revelaciaĵo (Apo 1:19).

En sia dua epistolo al Timoteo skribas Paŭlo :

"Ĉiu skribaĵo (estas) inspirita de dio (kaj) ankaŭ utila por instruo..." (2 Tim 3:16)²

Kiam Paŭlo parolas pri la skribaĵoj, li parolas nur pri la MNT, ne pri la nova, kiu ankoraŭ ne ekzistas.

La esprimo vorto de Dio en la Biblio estas uzata en multaj diversaj signifoj, tamen neniam en la senco, je kiu ĝi ofte estas uzata nun : la Biblio mem.

Leif Nordenstorm, Svedujo

1) PAULI (Evaldo). - *Mil jaroj de kristana filozofio*. - Florianópolis (BR) : Eldonejo Simpozio, 1985. - 260 p. ; 21 cm. En tiu ĉi libro vi trovos bonan priskribon pri la signifo de la vorto *λογος* : ĉe diversaj helenaj filozofoj.

2) La interkrampaj aldonoj estas miaj aldonoj, ĉar la Esperanta traduko, laŭ mi, tie ĉi ne estas fidela.

Por ilustrati la artikolon de Leif Nordenstorm, jen du eroj :

Artikolo *Word* (Vorto) en *The new compact Bible dictionary*, edited by T. Alton Bryant.

Vorto, Vorto de la Sinjoro, *Lógos* estas uzata pri Jesuo, kiel la Revelacio de Dio (Joh 1:1 ; 1 Joh 1:1 ; Apo 19:13 ; Heb 1:2). Li estas la supera kaj definitiva Vorto aŭ Revelacio de Dio. Antaŭ ol Li venis en la mondon, la Vorto de Dio venis al la homoj tra la patriarkoj (Gen 15:1), tra la leĝisto Moseo (El 4:30 ; 20:1), kaj tra la profetoj (Nom 22:38 ; 2 R 7:1 ; Jes 1:10 ; Jer 1:2). La Vorto de la Sinjoro estas kreiva (Psa 33:6 ; Gen 1:3,6,9,11,14,20,24,26 ; Heb 11:3). La Vorto de Dio estas certa (Psa 119:89 ; Jes 40:8) por ĉiam, kaj ne povas esti nuligita (Joh 10:35). Vortoj estas distingitaj disde povo (1 Kor 4:20 ; 1 Tes 1:5) kaj disde faroj (Mal 2:17 ; 1 Kor 4:20 ; 1 Joh 3:18), ĉar la Vorto de Dio estas farota, same kiel aŭdota kaj preparolota (Jak 1:22-25).

Citaĵo de J. I. PACKER. - *Fundamentalism and the Word of God* (fundamentismo kaj la Vorto de Dio). - I. V. F., 1958. - pp. 88-89, tirata el René PACHE. - *L'inspiration et l'autorité de la Bible* (la inspiro kaj aŭtoritato de la Biblio). - St Léger : Emmaüs, 1967. - p. 80.

La biblia nocio pri Skribo estas do tiu de mesaĝo veninta el Dio, unika kvankam kompleksa, verkita per die inspiritaj esprimoj ; mesaĝo, kiun Dio prononcis kaj kiun li ankoraŭ prononcas. Laŭ la analogio de la biblia uzo, estas do evidente, ke nomi la Skribon la Vorto de Dio estas tute pravigata. Konsekvence, se ni ne vidas la Biblion kiel certan kvanton da presita papero, sed kiel skribitan dokumenton, portantan mesaĝon ; kaj se ni konsideras la inspiritan libron kiel literaturan produkton, vortan esprimon de la penso, tiam ... estos korekte nomi la Biblion (aŭ la Skribon) la Vorto de Dio, kaj aserti, ke tion, kion ĝi diras, Dio diras.

Kultura Centro Esperantista
Centre culturel esperantiste
Esperanto-Kulturzentrum
Centro culturale esperantista
Center culturel esperantist
Esperanto Cultural Centre

Postiera 27
Postfako 771
CH-2301 La Chaux-de-Fonds
Svislando
Telefono 039 2674 07
Postkonto 23-2921

KCE KULTURA
CENTRO
ESPERANTISTA

IFA Internacia Fiera Altlernejo
GEP Gastejo Edmond Privat
KEL Komisiono «Esperanto Lernejo»
Pro Esperanto

Kultura Centro Esperantista, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

INTERNACIA FERIA ALTLERNEJO de KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

I-a Kristana Kultur-Semajno Esperantista 1987 oktobro 26-30

Nia eŭropa kulturo havas siajn fundamentojn, sur kiuj staras nia vivo kaj el kiuj kreskas nia estonteco. Kultura Centro Esperantista donas al ni kristanoj la eblon pripensi fundamentojn de nia kristana okcidentujo kaj sperti trajtojn de kristana kulturo. Ni invitas ĉiujn kristanojn kaj interesigantojn.

Celoj de la I-a Kristana Kultur-Semajno Esperantista:

- Gregoria ĉantado de la psalmoj - praktiko kaj teorio (d-ro Kuhnigk/Eichkorn).
- Bibliaj rondoj. Komentario pri la psalmoj. Komentario pri Luko (d-ro W.Kuhnigk, OSB).
- Ekzemploj kaj tradukoj pri la nova ekumena traduko de la Biblio.
- Pritrakto de kristana fakterminaro. Recenzoj de kristanaj kaj religiaj publikaĵoj.
- Sacerdoto Max Josef Metzger (1887-1944), pioniro de ekumenismo, pacifisto, esperantisto kaj martiro por la paco (Eichkorn).
- Unu jarcento de Esperanto kaj 2 jarmiloj de kristanismo, konsiloj por pluaĵ jarcentoj.
- Kristana antologio en Germana Antologio (Bleicher-Verl.1985, ISBN 3-88350-503-x). En tiu libro enestas arego da kristanaj literaturaĵoj germanaj de mil jaroj (Eichkorn).
- La arto de skulptaĵoj pri Kristoforo tra jarcentoj (Siegfried Krüger).

Ni atentigas jam nun nian 2-an Kristanan Kultur-Semajnon Esperantistan en la sama loko je 24.-28.10.1988. Prelegemuloj informu pastron Eichkorn:

Gvidado kaj informoj programaj: Pastro B.Eichkorn, Kolpingstr.8, D-7790 Messkirch.
Aliaj informoj rekte ĉe Kultura Centro Esperantista:

EVANGELIAJ KAJEROJ

LA BIBLIO EN MIA VIVO

"Kiam ajn MI uzas vorton," diris Humpty Dumpty iom malestime, "ĝi signifas precize tion, kion ajn mi deziras ke ĝi signifas, nek pli, nek malpli."

"La demando estas," diris Alica, "ĉu oni RAJTAS doni tion da malsamaj signifoj al vortoj?"

Tiu stranga aserto pri la signifo de vortoj troviĝas en la fantazilibro *Alice through the looking-glass* (Alica tra la spegulo, de Lewis Carroll). La ovoforma Humpty Dumpty (*hempti dempti*) estas unu el la multaj stranguloj, kiujn la knabino Alica renkontas malantaŭ la spegulo. Tamen, oni povas facile kredi, ke multaj Humpty-Dumpty-oj ekzistas en la realeco, precipe inter homoj, kiuj predikas, parolas, aŭ skribas pri la kristanismo. Ili - ne, NI estas pli taŭga - uzas vortojn kiel kristano, eklezio, fido multsignife, kvankam oni kutime supozas, ke ĉiu uzanto de tia vorto donas al ĝi la saman signifon. Tiamaniere, homoj kun tute malsamaj kredoj konfuzas prenas la saman titolon: KRISTANO. Mi persone konas, aŭ almenaŭ scias pri homoj kiuj kredas, ke la Sinjoro Jesuo Kristo estas vere Dio, kaj pri homoj, kiuj taksas Lin ordinara homo; homoj kiuj kredas, ke Kristo vere reviviĝis post Sia morto, kaj homoj kiuj diras, ke post la morto de Kristo, la disĉiploj kunmetis fabelon pri reviviĝo por kuraĝigi sin; homoj kiuj kredas, ke per ceremonio, bonfarto aŭ memvolo oni povas kristaniĝi, kaj homoj kiuj kredas, ke nur per la graco de Dio, pekuloj povas kristaniĝi, k.t.p., k.t.p., kaj ĉiuj el ili prenas la titolon KRISTANO. Kiu pravas? Kiel ni povas esti certaj? Kaj kiamaniere ĉio ĉi tio rilatas al la titolo de ĉi tiu artikolo? Nu...

Ek de infanaĝo mi supozis, ke mi estis kristano. Mi ĉeestis Diservojn kaj dimanĉolernejojn, kaj kantis kiel knabsoprano en la preĝeja ĥoro. Tie mi kantis, interalie, la himnon *I was made a christian when my name was given* (Mi kristaniĝis kiam mi ricevis mian nomon, t.e. en ceremonio de 'Sprucbapto' kiel bebo). Dum juneco mi lernis el la Biblio pri la mirakloj, la paraboloj, ktp., sed neniu instruis min pri konvertiĝo al Kristo (la nova naskiĝo pri kiu Jesuo parolis al Nikodemo (Joh 3:3). Neniu diris al mi, ke mi estas pekulo, sen ia povo pravigi min antaŭ la perfekte sankta Dio. Anstataŭ tio, oni instruis min, kaj per vortoj, kaj per ekzemplo, ke per bonfaroj kaj ceremonioj mi povas senpekiĝi.

Sed biblikredanta amiko komencis konversacii kun mi pri tiaj aferoj. Li asertis, ke la Biblio ne estas kolekto de religiaj ideoj kaj skizoj, kiuj (pro la mallarĝaj komprenpovoĵ de la verkintoj)

inkluzivas inter ĝiaj paĝoj mitojn kaj aliajn malveraĵojn. "Plikorekte," diris mia amiko, "la Biblio estas la Vorto de Dio."

Ne estus eble koni Dion, aŭ scii ion pri Li, se Li ne volus montri Sin al homoj. Sed feliĉe Li ja montris kaj montras Sin, kiel ni povas legi en Heb 1:1-3 :

"Dio, kiu multafoje kaj multamaniere parolis en la tempo antikva al niaj patroj en la profetoj, en tiuj lastaj tagoj parolis al ni an filo, kiun Li nomis heredanto de ĉio, per kiu ankaŭ Li faris la mondaĵojn, kiu, estante la elbrilo de Lia gloro kaj plena bildo de Lia substanco, kaj subtenante ĉion per la vorto de sia potenco, kaj farinte la elpurigon de niaj pekoj, sidiĝis dekstre de la Majesto en altaĵoj."

Dum la epoko de la Malnova Testamento, Dio montris Sin per vizioj kaj tipoj. Kiel mi ĵus skribis, en la epoko de la NOVA Testamento, Dio montras Sin per la Sinjoro Jesuo Kristo. Tiu Sinjoro oftege citis la Bibliion (nur la Malnovan Testamenton kompreneble), kaj akceptis ĝin kiel la vero.

Mia amiko ankaŭ provis konvinki min, ke laŭ la Biblio, kristanigo ne estas ekstera afero de signoj, ceremonioj, ktp., sed ŝanĝo interne farata de Dio mem.

Iom post iom, mi agnoskis, ke la Biblio estas plene kaj vere la Vorto de Dio ; ĝi, ne estante homfaritaj tradicioj, estas la aŭtoritato, per kiu ni povas scii la veron. Mi elkomprenis, ke (malgraŭ ĉeesto ĉe Diservoj dum jaroj) mi ne estis kristano ; mi sciis iom PRI la Sinjoro Jesuo Kristo, sed ne KONIS Lin. Mi agnoskis, ke mi estas pekulo kiu bezonas Savanton. Mi ne komprenis multe pri biblia kristanismo (ĉu NEbiblia kristanismo povas ekzisti ?).

Tamen, mi komprenis, ke neniel per propra forto mi povus pravigi min. Mi bezonis Jesuon kiel Savanton.

"Vi nomos lin JESUO ; ĉar li savos sian popolon de ĝiaj pekoj." (Mat 1:21)

Mi deziris peti savon de Dio, sed estis malfacile, ĉar ĝis tiam preĝo por mi signifis ion presitan en preĝlibro. Nun mi volis paroli al Dio uzante miajn proprajn vortojn. Kion mi diru ? Kompreneble, mi ne memoras la precizajn vortojn, sed mi agnoskis simple al Dio ke mi estas pekulo, kaj meritas nur Lian koleron, kaj petis Lin savi min per Lia graco kaj per la meritoj de Jesuo Kristo. Dio ja respondis al mia alvoko, kaj nun, esti kristano estas multe pli ol ceremonioj kaj aliaj eksteraĵoj.

Kaj la Biblio estas multe pli ol tediga kolekto de religiaj skribaĵoj. per ĝi, Dio instruas min, korektas min, kuraĝigas min.

Per ĝi mi povas kontroli la multdiversajn hodiaŭajn doktrinojn, por scii ĉu jes aŭ ne ili fontas el Dio, same kiel la homoj en Berea kiuj :

"... ĉiutage esploris la Skribojn por konstati ĉu tiuj aferoj (kiujn Paŭlo kaj Silas instruis) estas veraĵ." (Agoj 17:11)

Kompreneble, ĉar la Biblio estas la Vorto de Dio, ĝi havas nekompareblan efikon en mia vivo - almenaŭ tian efikon ĝi devus havi.

Kune kun mia edzino, mi legas parton de la Biblio ĉiutage. Ni preĝas, ke Dio helpu nin kompreni la Vorton, ĉar sen Lia helpo neniuj povas malkovri la veron de la Biblio.

"... la natura homo ne akceptas la aferojn de la Spirito de Dio ĉar ili estas por li malsaĝeco..." (1 Kor 2:14)

Ni ankaŭ preĝas por helpo, por ke ni ne nur akiru scion en la MENSIO, sed konsilon por la vivo.

La Biblio instruas nin pri Dio, pri ni mem, kaj pri kiel ni devus vivi. Ekz. ĝi instruas min, ke Dio estas Spirito, ke mi estas pekulo, kaj ke mi devas adori Dion per mia tuta forto. Tamen ĝi ankaŭ instruas min, ke pro mia pekemo, mi ne povas ami Dion, nek adori Lin per mia tuta forto - mi bezonas Kriston, la sola Savanto.

La Biblio donas al mi principojn por la vivo. Ekz. kiel kristano, mi ne devas havi memfidon, sed fidon en Kristo. Per la Biblio mi lernas, ke mi devas ami ne nur miajn amikojn, sed ankaŭ miajn malamikojn. Mi ankaŭ lernas, ke (kien ajn mi iras) Dio vidas min ; ne nur ekstere, sed eĉ en miaj pensoj, kaj ke kion ajn mi faras, mi faru ne nur por plaĉi al homoj, sed por Dio.

En la Biblio mi lernas la grandan ŝuldon, kiun mi ŝuldas al Dio.

"Tiun, kiu ne konis pekon, Li faris peko pro ni." (2 Kor 5:21)

La Sinjoro Jesuo Kristo, tiu kiu neniam pekis, tiu kies ĝusta loĝejo estas en plena gloro, lin la Patro 'pekigis' pro ni, kaj lin la Patro punis anstataŭ nin, se per graco ni saviĝis.

Tiaj faktoj signifas, ke kristanismo estas pli ol regularo, pli ol kredaro, ĝi estas nova vivo ! La Sinjoro kuraĝigas min per Sia Vorto, kaj korektas min per la sama Vorto. Preĝante por liaj disĉiploj, Jesuo diras :

"Konsekre ilin per la vero ; Via Vorto estas vero." (Joh 17:17)

Sed, kion ajn pri la tedaj partoj de la Biblio ? Ĉu mi legas ilin ? Kia rilato ili havas kun mia vivo ? (Mi skribas nun pri partoj kiel la lastaj ĉapitroj de Josuo, en kiu ni legas longajn

LA BIBLIO EN MIA VIVO

listojn de urboj, ktp.). Jes, tiaj partoj ŝajnas tedaj, tamen ni devas memori, ke la TUTA Biblio estas la Vorto de Dio, kaj tial estas utila

"... por instruo, por admono, por korekto, por disciplino en justeco." (2 Tim 3:16)

"La Biblio en mia vivo" estas bona titolo, ĉar per la Biblio la Sankta Dio komunikas al pekema mi. Sed eble eĉ pli bona estus "la vivo en mia Biblio", ĉar per ĝi, Dio montras al mi la Sinjoron Jesuon Kriston, kiu diris :

"Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo ; neniu venas al la Patro krom per mi." (Joh 14:6)

David J. Lamb, Britujo

EVANGELIAJ KAJEROJ

La Biblio : facila libro

La legendoj estas daŭregaj. Unu inter aliaj diras ke, la Biblio estas libro tiel komplika, ke oni sola ne povas ĝin legi kaj kompreni. Multaj personoj senkuraĝiĝas pro tiu ĉi jam preta penso kaj ili neniam provas malfermi la Skribojn.

Tamen mi konas personojn, kiuj ne estas intelektuloj nek ekleziuloj : laboristoj, oficistoj, dommastrinoj kaj eĉ infanoj. Ili ĉiuj legas la Biblion, ĝin komprenas kaj tiel ricevas grandan profiton.

La Biblio ne estas nur por la intelektuloj:

Mi ne sola asertas tion, sed ankaŭ Jesuo :

"Dio kaŝis tion for de saĝuloj kaj prudentuloj, kaj mal-
kaŝis al infanetoj." (Lk.10:21)

Intelektulo povas do konfuziĝi pri la Biblio, kaj infano trovi en ĝi la vorton de Dio por si.

Tio skandalis jam la judajn teologojn, kiam ili ĉeestis kun Petro kaj Johano, kiuj estis "malkleruloj kaj nesciuloj" (Agoj 4:13). La religia mondo inversiĝis : paroĥanoj klarigis la Biblion al la paroĥestro !

Mi povas doni konsilon al la legantoj. Por legi la Biblion kun profito, oni ne devas nur ĝin ricevi per cerbo kaj intelekto, sed ankaŭ per koro, fidante al Dio, kiu sola vivigas la legadon.

La Biblio estas nutro:

Jesuo nin antaŭsciigis :

"Ne per la pano sole vivas homo, sed per ĉiu vorto, kiu eliras el la buŝo de Dio." (Mat 4:4)

Por vivteni, ni do bezonas la nutraĵojn kaj la Biblion. Kiam ni neglektas la legadon de la Skribo, ni estas duonmortitaj por Dio.

La Biblio estas necesega nutro por nia vivo, kiel lakto por bebo (1 Pet 4:2). Sed neniu atendas, ke bebo komprenu, kio estas lakto, por doni ĝin al li. Li devas vivi kaj kreski ! Kompreno venos pli poste, li devas esti nutrita, aŭ li baldaŭ mortos.

Tio pensigas al mi duan konsilon. Antaŭ ol vi legos la Biblion, ne atendu kompreni ĝiajn literaturajn kategoriojn, ĝian tekstan interpreton, ĝian historian kuntekston, eĉ se tio povas esti tre utila. Nutru vin tutsimple per ĝi, kaj vi kreskos !

KONTRIBUAĴOJ

La Biblio estas la revelacio de Dio.

Jesuo devis malfermi la menson de la disĉiploj, por ke ili komprenu la Skribojn (Lk 24:45). Tamen ili vivis dum pli ol tri jaroj kun li, ricevante ĉiutage lian instruon. Ni devas paŝi sur la sama vojo.

La du disĉiploj, kiuj vojaĝis al Emaus, havis la saman sperton. Ili lasis al ni siajn konkludojn :

"Ĉu nia koro ne brulis en ni, dum li parolis kun ni sur la vojo, dum li klarigis al ni la Skribojn ?" (Lk 24:32)
Jesuo leviĝis el la morto. Li vivas, kaj tion, kion li faris por la du vojaĝantoj, li ĉiam kapablas fari por ĉiu.

Kaj jen tria konsilo. Kiam vi legas la Biblion, preĝu la Sanktan Spiriton por ke li malkaŝu al vi, kion Dio volas doni ! Fidu al Jesuo, por ke li malfermu vian menson !

Konkludo:

La Biblio estas facila libro, kiam ni legas ĝin korekte kaj kun simpla koro. Mi provis doni al vi klekajn simplajn konsilojn. Kun malmulta persisto, vi kapablas trovi en la Skribo vian necesan spiritan nutron.

La Biblio estas la Vorto, kiun Dio adresas al ĉiu homo. Ĝi devas do esti facile komprenata de ĉiu. Tiuj, kiuj neglektas ĝian legadon, deĵoriĝas. Tion Jesuo bone diris :

"Ĉu vi ne eraras pro tio, ke vi ne scias la Skribojn nek la potencon de Dio ?" (Mk 12:24)

Mi devas praktike konkludi. Legu do la Biblion ! Legu ĝin sinsekve kaj ĉiutage ! Vi baldaŭ miros pro la rezulto kaj pro la bonŝanĝo en via vivo.

Jacques Lemaire, Belgujo

EVANGELIAJ KAJEROJ

La bibliaj simboloj en la eklezia arto

"La Prezidanto volis ankoraŭ danki al Philippe Cousson, ĉar en la Universala Kongreso en Lucerno, li mem starigis KELI-budon ĉe la enirejo kaj provizis ĉiujn ĉeestantajn KELI-anojn per la fiŝ-simbolo por ke oni demandu pri tio kaj vi havu okazon iom preparoli pri kristanismo."

La ĉi-supra citaĵo, kiun mi elfiŝis el la protokolo de la jar-kunveno de KELI en Bienenberg (okazinta la 7-an de aŭgusto, 1979, aperinta en la novembra numero de *Dia Regno*) instigis min verki ĉi-tiun artikoleon por konigi al la kredantaro iujn kuriozaĵojn el nia kristana tradicio.

Certe malmultaj scias, ke al la simbolo "fiŝo", greke *ICHTHUS*, oni atribuis specialan signifon, kiu tekstas :

Iesus Christus, Theou Vios Soter, Esperante :
"Jesuo Kristo, Filo de Dio, Savinto."

Tamen la fiŝ-simbolo ne estas la ununura disvastiĝinta en la kristanaj eklezioj. En la unuaj jarcentoj oni kreis ĝenerale ne por la arto kaj ĉiuj verkoj staris en la servo de la religio, havante la taskon ĝin plibeligi. La celo de la arto estis reliefigi la instruojn de Kristo entenatajn en la Evangelioj. De tie devenas apero de la simboloj, kiuj ludas plu gravas rolon en la eklezia arto. Ili tiam, kvankam nerekte, forte influis la etendiĝon de la kristanismo. La paraboloj, per kiuj Jesuo instruis, alprenis la formon de pentraĵoj kaj skulptaĵoj. Kristo, kiel sciante, konsideris sin "bona paŝtisto," "semisto," "ŝafido," kaj la apostolojn "fiŝistoj de homoj," k.t.p.

La Nova Testamento ampleksas parabolojn kaj eldirojn de nia Sinjoro, kiuj facile estas prezenteblaj en formo de pentraĵoj kaj skulptaĵoj. Cetero la unuaj kristanoj eltrovadis iom post iom novajn esprimojn/simbolojn, kiuj fariĝis adekvataj motivoj por la renaskiĝinta eklezia arto. Bestoj, kreskaĵoj, objektoj estis tiaj simboloj, kiuj implicis la esencan ideon de la religio.

Ne eblas ĉi-tie mencii ĉiujn. Al ili i.a. apartenas : ŝafo kaj paŝtisto, kolombo, koko, serpento, vito, palmo, lilio, kaliko, arkeo kaj kruco. Simboloj oni konsideris ankaŭ la literojn A (*alfa*) kaj Ω (*omega*), kiuj estas la unua kaj la lasta literoj de greka alfabeto, kaj la monogramon de Kristo, *Χ*, formitan el la grekaj literoj CH (*chi*) kaj R (*rho*).

Kun la simboloj, ni renkontiĝas plej frue en la romaj katakomboj, kie ili estas amase troveblaj sur la muroj. Nur en la kvina jarcento p.K. respeguliĝas en la eklezia arto la bibliaj okazintaĵoj havantaj edifan religian sencon kaj prezentantaj la eternan vivon, la releviĝon de la homo, la krucvojon.

Tiel la Bibliaj simboloj, do, vivas inter ni. Ĉirkaŭrigardu en viaj preĝejoj, tombeaj kapeloj, kaj sur tomboj, kie ripozas viaj proksimuloj, kaj vi vidos ilin. Ili priornamas altarojn, katedrojn, baptoĉizojn, komunajn ujojn; ili videbliĝas sur vinjetoj de la Sankta Skribo kaj de religitemaj libroj kaj gazetoj; ili estas ĉizitaj sur tombaj monumentoj.

Ĉie, kie la Dia Vorto estas predikata, tie ankaŭ neeviteble la simboloj akompanas ĝin. Ili havas kvazaŭ avertigan karakteron en la surtera vivo de la kristanoj.

Jan Szurman, Pollando

La plej vendata (sed ne legata) libro
Pensoj pri la legado de la Biblio

Ĉu vi iam eniras ies domon kaj jen sur la kaftablo (kie vi devas vidi ĝin) kuŝas Biblio? Plejofte estas tre luksa kaj okulfrapa eldono. Kio estas ĝia valoro? Ordinare, nenio! Tiel, kiel la bone konata Benjamin Franklin (*benĝmin frenklin*, Benjamin Franklin) rimarkigis: "Libro estas nur bloko da papero ĝis la legado." Nu, supozu ke vi demandas vian gastiganton pri la Biblio sur la kaftablo. Sendube li diros ion similan al: "Ho jes, estas tre bela libro, ĉu ne?" Ha, sed se vi demandus, ĉu li legas ĝin ofte, eble la respondo estus: "Nu, verdire, nur okaze. Bonvolu kompreni ke mi estas tre okupata nuntempe. Sed, tiel, kiel vi jam scias, ĉiun dimanĉon oni legas ĝin al ni en la preĝejo." Ĉu vere? Bedaŭrinde jes.

Tro multaj kredas ke la dimanĉa aŭskultado sufiĉas, sed tio ne veras. Se viaj infanoj ĉeestus la lernejon dum malpli ol du horoj semajne, kion ili lernus? Kion iu povas lerni dum la ĉiusemajna Diservo? Nur malmulte! Ĉu vi eĉ memoras la temon de la lasta prediko? Ordinare, ne. Tial, kiu povas supozi ke oni memoras la legaĵon el la Biblio de tiu tempo?

Kelkaj kredas, ke pro ilia kristaneco, la legado de la Malnova Testamento ne necesas. Tiuj, kiuj kredas tiel, forgesas ke Jesuo kaj ĉiu el Lia tempo posedis nur la Malnovan Testamenton. Se vi kredas ke tio estas memevidenta fakto, mi devas konsenti. Bedaŭrinde, tamen, ne estas memevidenta al multaj, kaj tio estas unu el la kialoj de la nelegado de la tuto. Por Esperantistoj, estas alia kialo legi la Biblion, ĉefe la Malnovan Testamenton. Zamenhof mem tradukis la Malnovan Testamenton, tial ni posedas bonegan modelon de la lingvo por nia instruado.

Estas multaj senkulpigoj, sed ne unu kialo por ne legi la Biblion. Konsideru ĉi tion: multaj homoj legas la Biblion ĉiutage. Ĉi tiuj ricevas dudek kvar horojn, same kiel ĉiuj el ni, kiuj estas "tre okupataj." La malsameco inter la legantoj kaj la nelegantoj estas la uzmaniero de la tempo.

Jen estas sugestoj por faciligi la taskon.

1. Deziru kaj preĝu ke vi legos la tutan Biblion dum unu jaro.
2. Kalkulu kiom da paĝoj oni bezonas legi por legi la tuton dum unu jaro.

Se vi legus ĉiun tagon, dividu per 365 la tutan nombron da paĝoj (Bonvolu memori adicii la paĝojn de la Malnova Testamento al

tiuĵ de la Nova Testamento, ĉar en la plej multaj Biblioĵ oni ne nombras la paĝojn ek de la unua en la Malnova Testamento ĝis la lasta en la Nova Testamento, ĉar oni nombras tiujn de la du partoj aparte). Se vi decidis legi nur dum la labortagoj, tiam dividu la nombron da paĝoj per la nombro da tiaj tagoj.

3. Aĉetu dorsgluitan Biblion. Vi povas apartigi la paĝojn pli facile (Bonvolu kompreni ke la libro mem ne estas sankta, nur ĝia enhavo ; estas pli bone trakti ĝin tiamaniere, ol permesi al ĝi kuŝi sur la kaftablo, kie ĝi nur kolektas polvon). Tio permesas al vi porti kelkajn paĝojn en la poŝo aŭ mansako. Tiam, kiam vi veturas al aŭ de la laborejo, aŭ atendas en vico, vi povas uzi la tempon por legi.

4. Komencu la legadon. Ne senkulpigu vin mem pro iu kialo escepte grava, malsano via aŭ familia. Jes, la genealogioj, la priskribo pri la tabernaklo, k.t.p. enuas, sed legu kaj lernu !

Eble vi evitus la enuon se vi legus alterne unu libron el la Malnova Testamento kaj unu el la Nova. Pro la fakto ke la Malnova enhavas dekdu librojn pli, kaj ke vi iom detruus la kontinuecon, mi sugestas ke tion vi ne faru. Tamen, vi povas kunmeti ambaŭ, se vi kunigas la pli malgrandajn librojn el la Malnova Testamento (ekz. Rut, Obadja, Jona, k.a.) kaj legas ilin tiel, kiel unu kunmetaĵon.

5. Ne zorgu ke vi ne komprenas ĉion. Neniu komprenas ĉion. Nur preĝu por kompreno. Iom post iom vi lernos kaj komprenos.

6. La plej grava kialo por la tralegado de la Biblio estas ke ĝi estas la Vorto de Dio. Ĉu estas pli bona kialo ?

Post la unua legado, tuj komencu la duan. Tiamaniere vi kreas dumvivan kutimon.

Edwin C. Harler Jr., Usono

FIORENZA (Elisabeth Schüssler). - *In memory of Her - A feminist theological reconstruction of christian origins.*
- New York : Crossroad, 1985 & London : SCM Press, 1986 .
- 357 pp. ; 23 cm. - ISBN 0-8245-0667-7 (pbk).

Kristanoj konfesas, ke Jesuo estas la Kristo, t.e. la Mesio, t.e. la Sanktoleito. Sed kiu lin sanktoleis, kaj kie, kiam, en kiuj cirkonstancoj ? En la Pasiono-rakonto de Marko, tri disĉiploj ludas gravan rolon : unuflanke du el la Dekduo (Judas kiu perfidas Jesuon, kaj Petro kiu lin malkonfesas) kaj aliflanke la sennoma disĉiplino kiu Jesuon sanktoleas. Kvankam pri Judas kaj Petro klare memoras ĉiu kristano, la trian oni preskaŭ forgesis, malgraŭ la mala aserto siatempe de Jesuo mem (Mk 14:9). La profeta, signiva ago de la virino malaperis preskaŭ el la Evangelio. Ĉar ŝi estis virino. Malaperis eĉ ŝia nomo.

La rakonton mem transdonas ĉiuj kvar kanonaj Evangelioj, sed la redaktintoj tiom ĝin poluris, ke ĝi fariĝis akceptebla por la tiutempa patriarka grek-romia kultursfero. La kvara Evangelio (Joh 12:1-7) identigas ŝin kun Maria de Betanio, kiu fidele amika al Jesuo, per tiu ĉi oleado, montras sian amon al Li ; Luko ŝanĝas la fokuson de la virino kiel disĉiplino al la virino kiel pekulino (Lk 7:36-50) ; Mat 26:6-13 bone sekvas Mk 14:3-9.

Se la origina rakonto estus dirinta ke iu virino oleis la piedojn de malpli hazarda gasto, tiun okazaĵon oni ne transdonus en la evangelian mesaĝon : la origino prefere estis la rakonto de virino, disĉiplino, kiu sanktoleis la kapon de Jesuo, samkiel la profetoj en la MNT sanktoleis la kapon de la juda reĝo : profeta ago indikanta ke Jesuo estas la Mesio. Tio estis politike danĝera rakonto : kaj ĝuste tial la redaktintoj kolpodis tiom por sendanĝerigi ĝin. Marko per la tuj ĉirkaŭaj rakontoj simple transmetas la respondecon pri la morto de Jesuo for de la romianoj al la judaj gvidantoj, krome teologie interpretante la mesiecon de Jesuo per sufero kaj (akceptata) morto. Tiel Marko senpolitikigas la mesiecon de Jesuo.

Tamen, origine la rakonto estis ankaŭ politike signifa ; kaj grave en ĝi rolis ... unu virino.

La recenzata verko, el kies enkonduko mi ĉerpis la ĉi-supran ekzemplon, estas verŝajne la unua vere serioza, scienca verko, kiu ĉiupaŝe atentis pri la realeco frukristana de la rolo de virinoj.

Feminisma Teologio jam ekzistas plurajn jarojn, sed ĝis nun mankis la plene scienca baza verko. Jen do ĝi !

La aŭtorino (prof. pri NT kaj teologio ĉe University of Notre Dame, Indiana, Usono) gvidas la legantaron tra funda esploro pri la vortigo de NT (oni ja uzas virajn pronomojn plurale, ankaŭ se enestas virinoj : tiuj ĉi lastaj kvazaŭ nevidebliĝas, k.t.p.), tra historiaj realaĵoj tiuepokaj, tra baraktadoj pri la konservado de vira (patriarka) kulturo, k.t.p. Tiamaniere, kaj ŝi tion faras vere plej detale kaj skrupule/singardeme, ŝi akiras novan, feminisman hermeneŭtikon - kiu ebligas al ni, kvazaŭ revidebligi la rolon de virinoj en la ekkristanismo. En dua parto, ŝi skizas bildon pri la Jesuo-movado kiel "disĉipleco de ge-egaluloj." Por multaj legantoj certe estos nova, kiom vasta kaj grava estis la aktivado de virinoj, gvidado de lokaj eklezioj, predikado, profetado, k.t.p. Kaj ĉion ĉi ŝi daŭre ilustras abunde per citoj. La tria parto de la verko bildigas la grandan batalon fare de la patriarkaj estraj rondoj por ankaŭ interne de kristanismo reteni sian pozicion : jen la flankenŝovo de la virinoj marĝenen, la stablo de hierarkio nurvira, sed ankaŭ la protestoj (eĉ en NT) kontraŭ tiu ĉi procezo.

Entute : verko nepre leginda kaj studinda fare de ĉiu kristano, kiu pretas serioze preni la mesaĝon de Jesuo mem.

Gerrit Berveling, Nederlando

La religia vivo en Pollando

Realigas la revo de la tutmonda esperantistaro : jubilei ĉi-jare la centan datrevenon de Esperanto en la naskiĝlando de ĝi kaj de ĝia aŭtoro. La 72-a Universala Kongreso de Esperanto venigos al Pollando - jam por la kvina fojo - multnombrajn diverŝajn kaj diverskonfesiajn adeptojn de la Internacia Lingvo el ĉiuj mondpartoj. Pollando ĝis nun kvarfoje rolis kiel Esperantujo, gastigante Universalaajn Kongresojn de Esperanto : la unua okazis en 1927 (deka datreveno de la morto de D-ro Zamenhof), la dua en 1931, la tria en 1937 (dudeka datreveno de la morto de Zamenhof, kaj kvindek-jariĝo de Esperanto), la kvara en 1959 (centa datreveno de la naskiĝo de Zamenhof). La ĉi-jara U.K. okazos por la tria fojo en la pola ĉefurbo, post tiuj de 1937 kaj 1959.

Ĉiu kongresano havos raran eblecon omaĝi al la Granda Filo de la Homaro (kiel Zamenhofon nomis Unesko en 1959) vizitante lian mirakle saviĝintan tombon, kiu trapasis la kruelan duan mondmiliton. Interese estas scii, ke en la varsovia loĝejo de D-ro Zamenhof okazis la unua Esperantlingva konversacio inter Zamenhof kaj la inĝ. Antoni Grabowski, fama literaturisto kaj tradukisto.

Por la kongresanoj estos unika okazo informiĝi surloke pri la ĉiutageco de la vivo (socia, kultura, politika, religia), kiu postsekvis la ĝenerale konatajn laboristajn konfliktojn en la jaroj 1980/1981 kaj pri la karakterizaj fenomenoj, specifaj simptomoj kaj trajtoj de la vizitata lando kaj de ĝia popolo (historio, geografio, flandro, faŭno, regionaj folkloro kaj

moroj). Pri la sociaj, kulturaj kaj politikaj aktivecoj troveblas svarmo da informoj en ĉiaspecaj gazetoj kaj gvidlibroj. Tamen la temo, kiun mi intencas prikonsideri - la religia vivo - estas preskaŭ tabuo, kaj tiun breĉon mi celas pleniĝi per mia kontribuaĵo, esperante ke ĝi akiros plenan aprobon fare de la religianoj, kiuj dum internaciaj esperantistaj renkontiĝoj en internacia etoso amase partoprenas Diservojn. Memorinde estas, ke dum la 44-a U.K. en 1959 la ekumena Diservo okazis en la evangelia aŭsburga preĝejo de la Sankta Triunuo en Varsovio, en kiu predikis la aŭda pastro Fritz Renheim kaj la romkatolika meso en Częstochowa, kien oni veturigis la partoprenantojn.

Laŭleĝe aktivas en Pollando 33 eklezioj kaj religiaj unuiĝoj, kiuj originas el diversaj - ankaŭ nekristanaj - religiaj tradicioj, klasifikeblaj en tri grupojn : al la unua grupo apartenas la plej multnombra eklezio, la Romkatolika, al la dua ok eklezioj aliĝintaj al la Pola Ekumena Konsilantaro, membro de la Ekumena Konsilantaro de Eklezioj, en Genevo, la trian grupon konsistigas : eklezioj kaj religiaj unuiĝoj, registritaj en la Oficejo por Konfesiaj Aferoj agantaj en la tuta lando, kaj konfesiaj unuiĝoj, konsiderataj ordinaraĵ asocioj havantaj lokan karakteron.

Entute religianoj sumigas je proks. 36 000 000
romkatolikoj (laŭtakse) 34 900 000
ortodoksanoj (?) 852 000
ceteraj kristanoj (proks.) 210 000
nekristanoj (muzulanoj, moseanoj, budhistoj, karaitoj) 5 000.

I. ROMKATOLIKA EKLEZIO (*Kościół Rzymskokatolicki*)

Sekretariato de la Episkoparo de Pollando :
01-015 Warszawa, Skwer ks.Kardynała Stefana Wyszyńskiego, Prymasa Polski
Prezidanto de la Ĉefa Konsilantaro de la Episkoparo de Pollando :
kardinalo Józef Glemp, primato de Pollando
Teritoria divido : 27 diocezoj, 776 dekanajoj, 8 101 paroĥoj.

Kultejoj : 10 675 preĝejoj, 4 439 kapeloj
 Konfesia klerigo : Lublina Katolika Universitato kaj Akademio de la Katolika Teologio (8 fakultatoj, 610 scienculoj, 5 494 studentoj), 58 seminarioj (8 218 lernantoj), 14 ĝeneral-klerigaj kaj fakaj lernejoj (administrataj de 2 viraj kaj 12 virinaj ordenoj).
 Pastroj : 16 872 diocezoj (inkl. 93 episkopojn, en tio 3 emeritoj), 5 697 ordenaj (inkl. 1 094 eksterlande)
 Ordenoj kaj kongregacioj : 45 viraj (11 384 monaĥoj), 104 virinaj (22 580 monaĥinoj)
 Ekleziaj periodaĵoj : 73 (entute unuopa eldonkvanto 1 254 574 ekz.)
 Kredantoj : 34 900 000 (takse laŭ "Annuario Pontificio 1986")

II. EKLEZIOJ MEMBRIGITAJ AL LA POLA EKUMENA KONSILANTARO (vicigitaj laŭ la nombro da kredantoj)

1. POLA AUTOCEFALA ORTODOKSA EKLEZIO (*Polski Autokefaliczny Kościół Prawosławny*)
 Sidejo de la Metropolita Kurio :
 03-402 Warszawa, al. Świerczewskiego 52
 Prezidanto de la Episkopara Sinodo : Varsovia kaj tutpollanda metropolito Bazyl
 Teritoria divido : 5 diocezoj, 21 dekanajoj, 242 paroĥoj kaj filioj
 Kultejoj : 313 preĝejoj kaj kapeloj
 Konfesia klerigo : 1 seminario (30 lernantoj)
 Pastroj : 248 (inkl. 14 emeritojn)
 Klostroj : 2 (9 monaĥoj kaj 13 monaĥinoj)
 Prizorgdomo : 1
 Ekl. periodaĵoj : 2 (eld.kv. 4 000)
 Kredantoj (laŭtakse) : 852 000
2. EVANGELIA AUGSBURGA EKLEZIO - luterana (*Kościół Ewangelicko-Augsburski*)
 Sidejo de la Konsistorio : 00-246 Warszawa, ul. Miodowa 21
 Episkopo : pastro Janusz Narzyński
 Teritoria divido : 6 diocezoj, 121 paroĥoj, 169 filioj (predik-stacioj)
 Kultejoj : 181 preĝejoj, 148 kapeloj
 Pastroj : 107 (inkl. 16 em.)
 Katekistinoj (mag. pri teologio) : 17 (inkl. 1 em.)
 Diakoninoj : 1 (*Eben-Ezer* en Dziągiewów kun 35 diakoninoj)
 Prizorgdomoj : 4 ; Ripordomoj : 1
 Ekl. periodaĵoj : 1 (*Zwiastun*, kun eld.kv. 13 500)
 Kredantoj : 75 000
3. POLKATOLIKA EKLEZIO (*Kościół Polskokatolicki*)
 Sidejo de la Eklezia Konsilantaro : 00-544 Warszawa, ul. Wilcza 31
 Prezid. de la Eklezia Konsilantaro : episkopo Tadeusz R. Majewski
 Teritoria divido : 3 diocezoj, 16 dekanajoj, 92 paroĥoj
 Kultejoj : 97 preĝejoj kaj kapeloj (inkl. 1 sepultejo)
 Pastroj : 114 (inkl. 6 episkopojn)
 Ekl. periodaĵoj : 2 (eld.kv. 26 500)
 Kredantoj : 48 300
4. MALNOVKATOLIKA EKLEZIO DE MARIAVITOJ (*Starokatolicki Kościół Mariawitów*)
 Sidejo de la Ekl. Konsilantaro : 09-400 Płock, ul. Wierzyńska 27
 Ĉefepiskopo : pastro Stanisław Kowalski
 Teritoria divido : 3 diocezoj, 3 paroĥoj
 Kultejoj : 55 preĝejoj kaj kapeloj

Konfesia klerigo : 1 seminario (7 lernantoj)
 Pastroj : 30 (inkl. 4 episkopojn)
 Laikaj ekleziaj laborantoj : 60
 Ordenoj : 1 virina (52 monaĥinoj)
 Ekl. periodaĵoj : 1 (eld.kv. 3 500)
 Kredantoj : 24 800

5. UNUIĜINTA EVANGELIKA EKLEZIO - parte pentekostana (*Zjednoczony Kościół Ewangeliczny*)

Sidejo de la Eklezia Konsilantaro : 00-441 Warszawa, ul. Zagórna 10
 Ĉefpresbitero : pastro Edward Czajko
 Teritoria divido : 123 komunumoj
 Kultejoj : 146 preĝlokoj
 Konfesia klerigo : 1 biblia lernejo (14 kursanoj)
 Pastroj : 272
 Prizorgdomo : 1
 Ekl. periodaĵoj : 1 (eld.kv. 7 500)
 Kredantoj : 17 100

6. POLA KRISTANA BAPTISTA EKLEZIO (*Polski Kościół Chrześcijan Baptystów*)

Sidejo de la Ĉefa Eklezia Konsilantaro : 00-865 Warszawa, ul. Waliców 25
 Prezidanto de la Ĉefa Konsilantaro : Pastro Piotr Dajludzionek
 Teritoria divido : 9 regionoj, 128 rondo (grupoj)
 Kultejoj : 63 kapeloj kaj preĝdomoj
 Konfesia klerigo : 1 seminario (22 lernantoj)
 Pastroj : 61
 Prizorgdomo : 1
 Ekl. periodaĵoj : 1 (eld.kv. 3 500)
 Kredantoj : 6 100

7. EVANGELIA REFORMITA EKLEZIO - kalvinana (*Kościół Ewangelicko-Reformowany*)

Sidejo de la Konsistorio : 00-145 Warszawa, al. Świerczewskiego 76 a
 Episkopo : pastro Zdzisław Tranda
 Teritoria divido : 10 paroĥoj, 4 filioj
 Kultejoj : 6 preĝejoj, 7 kapeloj
 Pastroj : 5
 Laikaj ekleziaj laborantoj : 34
 Prizorgdomo : 1
 Ekl. periodaĵoj : 1 (*Jednota*, eld.kv. 3 000)
 Kredantoj : 4 500

8. METODISTA EKLEZIO (*Kościół Metodystyczny*)

Sidejo de la ĉefaj aŭtoritatoj : 00-561 Warszawa, ul. Mokotowska 12
 Ĝenerala Superintendanto : pastro Adam Kucza
 Teritoria divido : 3 regionoj, 60 paroĥoj kaj filioj
 Kultejoj : 55 kapeloj kaj preĝdomoj
 Konfesia klerigo : 1 seminario (10 lernantoj)
 Pastroj : 38
 Laikaj ekleziaj laborantoj : 39
 Prizorgdomo : 1
 Ekl. periodaĵoj : 1 (eld.kv. 2 000)
 Kredantoj : 4 250

La Pola Ekumena Konsilantaro fondiĝis la 15-an de novembro 1946. La estraro de P.E.K. (*Polska Rada Ekumeniczna*, 00-790 Warszawa, ul. Willowa 1) enhavas la

NOTICIOJ

reprezentantojn de la aliĝintaj eklezioj jene :

Prezidanto : pastoro Adam Kuczma (metodista ĝen. superintendanto)
Vic-prez. : pastro Janusz Narzyński (evangelia aŭsburga episkopo)
metropolito Bazyl (ortodoksana)
Sekretario : Tadeusz R. Majewski (polkatolika episkopo)
Kasisto : pastoro Edward Czajko (evangelika ĉefpresbitero)
Ĉefdirekt. : pastro Zdzisław Pawlik

Teologiaj studentoj por la nomitaj 8 eklezioj kaj krome por la Eklezio de la Adventistoj de la Sepa Tago (vd. sube) trejniĝas en la Kristana Teologia Akademio en Warszawa (Varsovio, *Chrześcijańska Akademia Teologiczna*, 00-246 Warszawa, ul. Miodowa 21) en tri sekcioj : evangelia, ortodoksa kaj malnovkatolika, havantaj entute 146 studentojn. Finstudinte, ili fariĝas magistroj pri teologio kaj povas ankaŭ doktoriĝi. Rektoro de la Akademio estas Prof. D-ro Pastro Jan B. Niemczyk.

Kredantoj de la 8 eklezioj membrigitaĵ en P.E.K. kune : 1 032 100.

III. CETERAJ EKLEZIOJ KAJ RELIGIAJ UNUIGOJ

A. EKLEZIOJ KAJ RELIGIAJ UNUIGOJ REGISTRIITAJ EN LA OFICEJO POR KONFESIAJ AFEROJ

1. EKLEZIO DE LA ADVENTISTOJ DE LA SEPA TAGO (*Kościół Adventystów Dnia Siódmego*)

Sidejo : Warszawa
Prezidanto de la Ekl. : Stanisław Dąnbrowski

Kredantoj : 8 200, predikantoj : 84,
komunumoj : 20, preĝlokoj : 3

2. EKLEZIO DE KRISTO (*Kościół Chrystusowy*)

Sidejo : Sopot
Prez. de la Sup. Kons. : ĉefa evangelizisto Walenty Dawidów
Kredantoj : 5 350, predikantoj : 26,
komunumoj : 20, preĝlokoj : 3

3. KATOLIKA EKLEZIO DE MARIAVITOJ (*Kościół Katolicki Mariawitów*)

Sidejo : Felicjanów
Prez. de la Ĉefara Kons. : arkiepisk. Józef M. Rafael Wojciechowski
Kredantoj 3 900, pastroj : 29,
paroĥoj k. filioj : 32, preĝlok. 35

4. UNUIGO DE LIBERAJ ESPLORANTOJ DE LA SANKTA SKRIBO (*Zrzeszenie Wolnych Badaczy Pisma Świętego*)

Sidejo : Kraków
Prez. de la Estraro : Henryk Kamiński
Kredantoj : 2700, diakonoj : 309,
rondoj, gr. : 92, preĝlok. : 3

5. ORIENTA EKLEZIO MALNOV-RITA (*Wschodni Kościół Staroobrzędowy*)

Sidejo : Suwałki
Prez. de la Ekl. Kons. : Tymoteusz Filipow
Kredantoj : 2600, predikantoj : 2,
komunumoj : 4, preĝlokoj : 5

6. RELIGIA LIGO MUZULMANA (*Muzułmański Związek Religijny*)

Sidejo : Białystok
Prez. de la plejsupera Kolegio : Stefan Mucharski
Kredantoj : 2 400, predikantoj : 5,
komunumoj : 6, preĝlokoj : 2

7. LAIKA MISIA MOVADO "EPIFANIA" (*Świecki Ruch Misyjny "Epifania"*)

Sidejo : Poznań
Prez. de la Ĉefa estraro : Wiktor Stachowiak
Kredantoj : 2 100, diakonoj : 427,
rondoj, gr. : 79, preĝl. : 146

8. RELIGIA LIGO DE LA MOSEA KONFESIO (*Związek Religijny Wyznania Mojżeszowego*) - juda

Sidejo : Warszawa
Prez. de la ĉefa estraro : Mozes Finkelstein
Kredantoj : 1 800, rabenoj : 0,
komunumoj : 16, preĝlokoj : 23

9. EKLEZIO DE LIBERAJ KRISTANOJ (*Kościół Wolnych Chrześcijan*)

Sidejo : Bielsko-Biała
Prez. de la Ekle. Kons. : Józef

EVANGELIAJ KAJEROJ

Folwarczny
Kredantoj : 1 800, predik. : 0,
komunumoj : 85, preĝl. : 24

10. NOVAPOSTOLA EKLEZIO (*Nowoapostolski Kościół*)

Sidejo : Gdynia
Prez. de la estraro : Edward Starosta
Kredantoj : 700, predik. : 35,
komunumoj : 12, preĝl. : 8

11. EKLEZIO DE LA KRISTANOJ DE LA SABATA TAGO (*Kościół Chrześcijan Dnia Sobotniego*)

Sidejo : Bielsko-Biała
Prez. de la Ekl. Kons. : Bronisław K. Ciesielski
Kredantoj : 500, predik. : 22,
komunumoj : 30, preĝl. : 5

12. PROTESTANTA KOMUNUMO DE LA REGIONO BIESZCZADY - pentekostana (*Protestancka Wspólnota Regionu Bieszczadzkiego*)

Sidejo : Wola Piotrowa
Prez. de la ĉefa kons. : Andrzej Byrt
Kredantoj : 450, predik. : 7,
rondoj, gr. : 3, preĝl. 1

13. ASOCIO DE ESPLORANTOJ DE LA SANKTA BIBLIO (*Stowarzyszenie Badaczy Pisma Świętego*)

Sidejo : Warszawa
Prez. de la ĉefa estraro : Ryszard Damian
Kredantoj : 400, diakonoj : 48,
rondoj, gr. : 27, preĝl. : 6

Kaj 7 nemenciitaj, kredantoj : 1 100.

B. KONFESIAJ UNUIGOJ KONSIDERATAJ KIEL ORDINARAJN ASOCIOJN

Ili estas 4 havantaj lokan karakteron (al unu mankas kredantaro) kun malpli ol 150 membroj.

Warszawa havas de kelkdedoj da jaroj polan filion de la Brita kaj Alilanda Biblia Societo, kiu troviĝas ĉe la strato Nowy Świat 40, kie ĝi disponas pri vendejo.

Ĉiaspecan protestantan literaturon distribuas la sola evangelia librejo *Logos*, inaŭgurita en junio 1983 en Cieszyn, ul. Wyższa Brama 29, dum la solenaĵoj dediĉitaj al la 500-a datreveno de la naskiĝo de Martin Luther

Fontoj :

- 1) *Studia i Dokumenty Ekumeniczne*, 4/1986, kwartalnik Chrześcijańskiego Stowarzyszenia Społecznego. Instytut Prasy i Wydawnictw NOVUM. Warszawa, 1986.
- 2) *Kalendarz Ewangelicki 1987*. Zwiastun - Wydawnictwo Kościoła Ewangelicko-Augsburskiego. Warszawa, 1986.
- 3) *Wielka Encyklopedia Powszechna*. Państwowe Wydawnictwo Naukowe Warszawa.
- 4) enketoj de la aŭtoro.

Jan Szurman, Pollando

en la dua numero

EKOLOGIO - kiel ni administras la teron

La sopiro de la kreitaro (Rom 8:19-22) (Knäver Z.)

La malbona administranto (G. Berveling)

La jubilea sistemo laŭ la Biblio (J. Gishron)

Ekologio de la Biblio (A. P. Tabacki)

Schaeffer : The pollution and the death of man -
recenzo (C. McKown)

La moderna homo inter ekologio kaj ekonomio (J.
Koopmans)

La teknikista kaptilo - intervjuo (J. Ellul)

Homa respondeco pri la klimato ? (M. Jackson)

Kristana influo en la germana ekologiisma movado
(O. Gessner)

Kristano kaj verdulo (M. Mullarney)

antaŭvidita apero : oktobro 1987

ABONOJ

ono por du numeroj, t.e. unu jaro (vi indiku ekde kiu numero) :
80 FRF.

poŝta konto : Philippe Cousson, 244 45 X en Limoges (Francujo)
adreso : Philippe Cousson, Le Hameau des Plaids, Nouvillé-
Maupertuis, 86340 La Villedieu du Clain, Francujo
per poŝta ĝiro aŭ internacia poŝta mandato.

al - Jacques Lemaire, rue des Déportés 100, 6180 Courcelles,
Belgujo

- Herberto Ubat, Caixa Postal 10, 78260 Chapada dos Guimaraes,
MT, Brazilo

- F.E.B.C. National Giro 65274 0006, Britujo

Thomas Neil, 82 Glasgow Rd, Kilmarnock, Britujo KA3 1UN

- Kristillinen Esperantoliito, poŝta k. 4306 45-4, Finnlando

Kristillinen Esperantoliito, Kivikatu 8 CS1, 15700 Lahti, Finn.

- C.C.P. : F.E.E.L., 10456 15 U, Paris, Francujo

André Bachelier, 6 impasse des Marronniers, 93600 Aulnay sous

Bois, Francujo

- Sonderkonto Esperanto, 1092 04-206 Hamburg, F.R. Germanujo

Astrid Hanke, Am Friedrichshain 37, 2280 Westerland/Sylt, F.R.G.

- Esperanto centro, POBox 23 180, 91 231 Jerusalem, Israelo

- Seiziro Kawamura, Green Town Makishima 7-501, Makishima-cho,

Motoyask hiki 40-1, Uji-shi, Kioto-fu, 611 Japanujo

- Korea sekcio de KELI, CPO Box 3047, Seoul, Koreo

- K.E.L.I., ĝiro-konto poŝta 5506132, Nederlando

Leen Hordijk, vanHogendorplaan 4, 3135 CD Vlaardingen, Nederl.

- Godwin I. Oboh, Esperanto Int. School, Illeh, PO Box 62,

Ekpoma, Bendel, Niĝerio

- Kristelig Esperantoforbund, poŝtĝirkonto 5194576, Norvegujo

Vidar Vik, Ekebergun. 225, Oslo 11, Norvegujo

- Ernst Venter, PO Box 828, Phalaborwa, Sudafriko 1390

- Kristliga Esperantoförbundet, poŝtĝirkonto 9 14 39-0, Svedujo

Gustav Stenholm, Domprostgatan 18 B, 532 00 Skara, Svedujo

- KELI Svisa sekcio (Z en), poŝta ĉekkonto 80-52203-8 Zürich, Svis.

Lina Reutemann, Iddastr. 34, 9008 St Gallen, Svislando

- Edwin C. Harler Jr., 47 Hardy Rd, Levittown Pa 19056, Usono

pere de UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015
Bj Rotterdam, Nederlando, pere de la konto phco-m. (vidu en la
jarlibro 1986, ĉe la paĝo 29).

daŭre serĉas perantojn en aliaj landoj.

ARTIKOLOJ

Rudolf HORSKY : Jan Hus kaj la Biblio	3
Alain G. MARTIN : La reformaciistoj kaj la statuso de la Biblio	9
Adolf BURKHARDT : Johann A. Bengel kaj la Biblio	15
Theotima ROTTHAUS : La Biblio post la Dua Vatikana Koncilio	21
Gerrit BERVELING : La Biblio - literatura verko	27
Jeremi GISHRON : La Biblio en juro kaj politiko en la ŝtato Israelo	31
David FEATHERSTONE : La Bibliaj Societoj - kial ? kiam ? kiel ?	43
John F. TWILLEY : Prediki la Vorton de Dio	47
Thomas NEIL : Biblia aŭtoritato - radiko de evangelikeco	53
BEDEGI Győző : Kie la religio de la Biblio malsimilas al la aliaj	57
Leif NORDENSTORM : Kion signifas Vorto de Dio	63
David J. LAMB : La Biblio en mia vivo	67

KONTRIBUAĴOJ

Jacques LEMAIRE : La Biblio : facila libro	71
Jan SZURMAN : La bibliaj simboloj en la eklezia arto	73
Edwin C. HARLER : Pensoj pri la legado de la Biblio	75

RECENZOJ

Gerrit BERVELING : FIORENZA : In memory of Her	77
--	----

NOTICĴOJ

Jan SZURMAN : La religia vivo en Pollando	79
---	----